

František Kožík

LUMO EN TENEBROJ

(biografia romano pri Komenio)


El la ĉeĥa originalo tradukis

Zdeněk Rusín kaj Miroslav Malovec

Lingve kontrolis **Jaroslav Mařík**

Jaroslav Mráz

Josef Vondroušek



Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1992. — 121 p. + 5 p.

ENHAVO

Reveno el studado

Feliĉaj jaroj

En kaŝejoj

En ekzilo

Vojaĝo en Londonon

Migrado de honoro kaj ankaŭ de paradoksoj

Lukto kun la tempo

Malbonaŭgura paco

Lernejo en Sárospatak

Detruo de Lešno

Rifuĝejo de maljunaĝo

Rebonigo de la homaj aferoj

Transdono de la torĉo

REVENO EL STUDADO

Li fermis la okulojn kaj profunde enspiris.

Jes, eĉ se oni alkondukus lin ĉi tien kun tukokovritaj okuloj, certe li divenus, kie li estas. Obtuzo susurado de piceoj, musko mole cedanta sub liaj paŝoj, intima alparolo de birdoj ... La elspiro de la tero estis subite tiom varma, kvazaŭ oni duonigus bulon de freŝbakita pano. Kaj Johano Amoso klare sentis: Mi estas hejme. Falis de sur li penado de la lastaj horoj de la vojaĝo, streĉo, kiu lin akompanis tra la landlimaj padoj, kaj kiam li kun trankviliĝo perceptis la ĝuan senton de reveno. Tial ĉio ĉirkaŭ li ekaromis pli penetre, pli konate kaj pli bonvene.

Forĵetinte la mansakon kaj bastonon, kaj laca de vojaĝo kaj ekscitiĝo, li sinkis sur granitan ŝtonegon. Sian koron li aŭdis bati.

Kion li estis forlasanta? Al kio revenanta? Kion renkontonta?

La naska Moravio ankoraŭ malproksimis, post Prago kaj post la tuta Bohemio, sed ĝis tie al la landlimo ĝi sendis al li mesaĝon per kurbaĵoj branĉoj de prunelarboj, ekflorantaj en tufoj da blankaj steloj. Enspirinte ilian dolĉamaran aromon, kvazaŭ li kliniĝus al sia infanaĝo.

Tiun li volis alvoki. Sed kiam li alrigardis ĝin en la pasintecon, ĝi kvazaŭ salte kaŝiĝus tuta en fumo de incendioj.

La unuaj jaroj, ĝis kien atingas liaj rememoroj, estis belegaj, orumitaj per zorgemo kaj amo de la gepatroj. La patron estimis ĉiuj en Uhersky^o Brod, kaj li enportadis disciplinon en la familion, sed ankaŭ bonkoran afablecon, kian kulturis inter si reciproke la membroj de la Unuiĝo de Ĉeĥaj Fratoj. Tamen la malbona sorto embuskis kaj per insida fulmo ĝi trafis tiun ĉi trankvilan vivon. Neniam forgesos Johano Amoso la momenton, kiam en humidan kaj profundan kavon de tombejo sinkis ĉerkoj kun la korpoj de la patro kaj patrino. Tio ne okazis en la sama tago, tamen tiom mallonge unu post la alia, ke ambaŭ momentoj en la rememoro nedisigeble kunfandiĝis. Tiam li estis apenaŭ dekdujara. Oni predikis al li pri Dia volo kaj kristana humileco, sed li fuĝis malproksimen de la homoj, en fosaĵon post la urbaj remparoj por ĝissate tie plori, por flustri almenaŭ en la teron, en surdan, mutan kaj tamen kompatan teron sian knaban bedaŭron.

Oni disigis lin de liaj fratinoj, la bela familia vivo estis for. La orfon Johanon prenis al si lia onklino en Stražnice, kaj tie li vizitadis lernejon. En unusola klasĉambro klopodis instruisto kun diversaĝaj lernantoj, instruis ilin legi kaj kalkuli, plej ofte li kantis kun ili psalmojn. El izoliĝema nostalgio kaj malamo

kontraŭ la malfeliĉo, kiu lin persekutis, naskiĝadis en Johano neklara ĝis nun sopiro ekscii pri la mondo kaj pri la vivo kiom eble plej multe, por ke li povu kompreni, kial la homo devas submetiĝi al tiom multaj suferadoj, kaj kiel la homa menso povas ilin venki. Sed en tiu ĉi lernejo la vojo al sciado estis plena je dornoj. Kiom multe pli bone sciis la patro respondi liajn sciavidajn demandojn! En la lernejo kvazaŭ oni intencus sufoki en la lernantoj la sopiron pri scioj.

Johano ne restis longe en Stražnice. Imperiestro Rudolfo, favoranta la katolikojn, tiam venis en konflikton kun sia frato Matiaso, kiu volante konkeri la regadon provizore mienis kvazaŭ protektanto de la protestantoj. El Hungario invadis Moravion bandoj de Stefano Boĉkaj por trudi al la moravia nobelaro aliancon; li ne sciis fari ĝin alie ol per forbruligado de vilaĝoj kaj ruinigado de bienoj. Kun la hordoj de solduloj venis ankaŭ bandoj de rabistoj dungitaj de komercistoj. Kaj Moravio, "ĝardeno paradiza", kiel oni nomis ĝin tiam, dezertiĝis kaj pereadis, skrapvundata per iliaj kruelaj manoj. Tristaj informoj pri forbruligitaj vilaĝoj, forkondukitaj virinoj kaj knabinoj kaj morttorturitaj viroj, kiam ili ne volis konfesi pri kaŝitaj greno kaj kusenoj, cirkulis tra la regiono, kaj ĉiuj estis verdiraj. Iun tagon aperis subite regimento de Hungaroj ĉe la remparoj de Stražnice, kaj la timigita urbo fariĝis facila predo. Tra noktaj arbaroj fuĝis tiam kun aliaj la dekkvarjara Johano malproksimen, kien ne plu atingis brilo de la brulanta Strážnice, ĝis Nivnice, kie li ankaŭ havis parencojn.

Li bedaŭris ne nur la torturatan regionon, li bedaŭris ankaŭ sian neniigitan sopiron pri klerigado. Sed feliĉe la Unuiĝo de Ĉeĥaj Fratoj jam antaŭlonge adiaŭis postulojn de Petro Chelčický° pri malriĉeco kaj simpla menso de siaj membroj; ĝia instruo, daŭriganta pensojn de Magistro Jan Hus, allogis eĉ nobelojn sopirantajn rebonigon de la eklezio, kaj tio signifis kaj partoprenon en la publika vivo kaj pli grandan zorgon pri edukado de la junularo. Kruela persekutado, kiun suferis ĉi tiu plej pacama el la evangeliaj eklezioj, instruis la membrojn al reciproka sinoferejo. Tial do, kiam la talento de la forlasita knabo ne restis ne rimarkita de klerikoj kaj gvidantoj de la Unuiĝo kies protektanto en Moravio estis la potenca sinjoro Karlo pli aĝa el Žerotí°n transiris Johano el la manoj de siaj vilaĝaj protektantoj en la latinan lernejon en Přerov.

Ankaŭ tie li atentigis pri si per sia diligenteco kaj fariĝis ŝatata lernanto de la ĉeĥfrata episkopo Lanecius, kiu, por honori lin, duonŝerce, duonserioze, promesis doni al li post kelka tempo kiel edzinon sian etan filinon Johanjon.

La latinigitan nomon Amosus (treege amata, amato) akceptis poste Komenio kiel sian duan nomon en la formo Amos. Li dediĉis sin fervore al la latina lingvo, ĉar ĝi estis lingvo, pere de kiu estis eble alproprigi al si la plej bonajn ideojn, kiujn ĝis tiam la homoj eldiris; li do konatiĝis kun Katono, Seneko, Cicerono, Ovidio, Vergilio kaj kun aliaj filozofoj kaj poetoj.

Ĉar li estis senĉese unu el la plej bonaj lernantoj, ĉar la travivitaj malfeliĉoj igis lin serioza kaj ĉar malkontenteco pri la sorto sugestis al li avidon pri scienco, sendis lin la Unuiĝo kun kelkaj aliaj junuloj al altlernejo en Herborn, kiu sub regado de la familio Oranĵa kaj sub forta influo de la nederlanda klereco havis kaj bonan famon, kaj eminentajn profesorojn.

Komenio estis dankema pro la bonfaremo de potenculoj el la Unuiĝo. La hungaraj invadintoj forbruligis ankaŭ la bienan korton, kiun heredigis al li la patro kaj el kiu ĝis nun venadis pagoj por lia eduko. El la patra heredaĵo restis al li nur parto de kampoj, kiujn administris liaj fratinoj, kaj vinberejo ĉe Blatnice, kiun amis la patro, kaj al kiu Amoso ankaŭ estis kore ligita. Alie li havis nur kelkajn librojn aĉetitajn per ŝparita mono kaj firman volon, ke per sia diligenteco li repagos al ĉiuj, kiuj lin fidis.

Kun tiu ĉi decidiĝo li forlasis antaŭ kvar jaroj la patrujon.

Nun li revenas. Estas la jaro 1614, kaj li proksimiĝas al sia dudekdujariĝo. Li ekstaros antaŭ tiuj, kiuj lin forsendis al studado. Ĉu li povos rigardi en iliajn vizaĝojn kun trankvila konscienco? Ĉu li utiligis tempon kaj ĉiujn eblecojn dum la jaroj travivitaj en fremdaj universitatoj?

Kvankam en Herborn regis severa disciplino, estis por la junulo sopiranta pri libereco sufiĉe da okazoj, kiel sin distri kaj gajiĝi. Ne, Johano Amoso ne estis tedulo kaj ankaŭ ne liaj amikoj el Ĉeĥio, nek eksterlanduloj, kiuj poste fariĝis liaj amikoj; ili ne povis plendi, ke li vidigas malgrandan societemon. Elparkeradi tezojn, el kiuj unu ofte celis kontraŭ la alia, tio lin naŭzis; li tute ne fanfaronis pri tio, kion li ellernis el libroj, li sciis paroli pri ĉiuj ĉi sciencaĵoj simple kaj sprite, ofte li eĉ dubis pri tio, kion la ceteraj senpripense akceptis.

De tempo al tempo li mem ekmiris, kio penetrigas en lian animon tiom da maltrankvilo. Pluraj el liaj konatoj estis vere piaj, akceptantaj sian vivon kvazaŭ legante ĝin el la Skribo, kaj ilia humileco estis samtempe ilia orgojlo, ĉar ili certis, ke ĝuste pere de ili ĉio okazas tiel, kiel ĝi okazas. Aliaj estis disciplinmaj kaj diligentaj: ili aŭskultis lekciojn, eldiradis regulojn, kolektis sciojn. Sed Johano Amoso ne sciis akcepti la vivon kiel la unuaj, nek studadon kiel la aliaj. Lia spirito estis ĉiam en maltrankvilo kaj trudis al li la bezonon enpensiĝi, prijuĝi, ne fidi.

Kelkfoje ripetiĝis al li en sonĝo stranga vizio, eble pro tio, ke li enlitiĝis kun menso ekscitita per legado kaj per propraj konjektoj. Li sonĝis, ke li vidas antaŭ si la mondon kiel ebenaĵon dronantan en mallumo. Sed sur tiu ĉi ebenaĵo ekzistis vivo; homoj kliniĝis al siaj taskoj, laboris, faris siajn metiojn, pene klopodis sur kampoj. Sed sporade kvazaŭ ekbrilus lumo en la tenebro. Jen ekstaris viro, turnis la vizaĝon, sur kiun falis radio de supre, al la ĉielo, ekparolis kaj montris

al la homoj vojojn kaŝitajn ĝis nun en la tenebro. Aliaj viroj tie armis en obskuro de la mondo siajn okulojn per teleskopaj vitroj por povi elŝiri el la ĉielo misteron de la steloj, aliaj miksis likvojn en retortoj, aliaj esploris la homon kaj ekzamenis liajn ostojn kaj angiojn, aliaj fine metis la frunton en la polmojn kaj meditis kaj turmentis la cerbon per rezonadoj. Sed ĉiuj, kiuj tiel eniris en duelon kun diversaj sekretoj de la naturo kaj mondo, montris al la homaro, ke la mondo estas pli vasta, ol oni konjektadis, kaj ju pli ili multiĝis, des pli hele estis en la tenebra mondo.

Johano Amoso estis scivola pri ĉio. Li aŭskultis la lekciojn de la juna profesoro Johano Henriko Alsted ne kiel de instruisto, sed kiel de bona amiko, kiu konsilis al li, kiamaniere plej facile ampleksi ĉiujn sciojn kaj kunigi ilin en sistemon; de li ankaŭ Johano lernis firmigi la memoron per elskribaĵoj el libroj. Pasie li kolektis informojn pri tio, kiujn novajn malkovrojn alportas tiu aŭ alia scienco kaj kiel la homoj proksimiĝas al solvo de misteroj, kiujn kaŝas la naturo. Li studis Aristotelon. Li konatiĝis kun ĉio, kion prezentis la tiutempa fiziko. Sed li ne kontentiĝis per tio, ke li eminentiĝis en disputadoj; li opiniis la manieron de instruado longdaŭra kaj nesistema. Kun intereso li ekprenis verkon de la germana reformisto Wolfgang Ratke, kiu venis kun postulo pri ĝenerala instruado kaj en la gepatra lingvo. Por Johano Amoso ĝi estis konfirmo pri tio, pri kio li mem multfoje pensis.

En Herborn oni ofte parolis pri la situacio en la eklezioj kaj pri la politika evoluo. Komence de la 17 a jarcento ja ĉiam pli akre ekstaris unu kontraŭ la alia du grandaj tendaroj, la katolika kaj la protestanta. Kaj kvankam je ambaŭ flankoj multiĝis tiuj, kiuj post ducent jaroj de malamikeco deziris repacigon kaj trankviligon, tamen estis en ludkampo ankaŭ iliaj intereso, regad aspiroj de reĝoj, de princoj kaj de riĉaj familioj; kaj do ŝajnis, ke tiuj ĉi du potencaj tendaroj povas decidi sian disputon sole per armiloj. Dolore malkontenta pri la stato de la aferoj, kiu donis la superecon al pli forta glavo, ne al pli bona ideo, Johano kun profesoro Piscator (li nomiĝis ĝuste Ludoviko Filipo Fischer) serĉis en la Biblio, kio estas antaŭdirita, kaj kiel konsolon li akceptis predikadon pri baldaŭa alveno de la reĝolando de Kristo sur la teron kaj pri la miljara regno de justuloj.

Kun kreskanta maltrankvilo pensadis Johano Amoso pri sia hejmo. Kiam li estis foriranta al Herborn, donis la tiel nomata "majestaĵo" de imperiestro Rudolfo al la ĉefaj landoj eblecon fari kontrakton inter ambaŭ malamikaj tendaroj. Sed apenaŭ Johano Amoso enskribis sin en la altlernejo, jam venis el Prago informoj pri novaj malpaciĝoj. La katolikoj ne volis kontentiĝi pri la fakto, ke la imperiestro permesis konfesi la t.n. ĉefan konfesion, kaj ke li donacis al nekatolikoj eĉ universitaton; estis neakceptebla por ili eĉ la penso, ke la subuloj rajtus konfesi alian religion ol ilia mastro. Kontraŭ la protestantisma unuiĝo

ekstaris unuiĝo katolika kaj la disputo, kiu reviviĝis en Ĉeĥio, lante disvastiĝis en la tutan Eŭropon. Iniciale de imperiestro Rudolfo invadis lia nevo, la batalema episkopo Leopoldo de Passau, kun sia armeo Bohemion kaj penetris en Pragon (1611). Liaj armeestroj volis forbruligi ĝin; sed fine Rudolfo ne kuraĝis fari tion kaj la heroo rezisto de ĉeĥoj devigis la armeon de Leopoldo foriri. Baldaŭ poste estis kronita la nova ĉeĥa reĝo Matiaso. Sed li trompis la protestantojn, kiuj lin subtenis; li malobservis la "majestaĵon" kaj klopodis nur garantii en la ĉeĥlingvaj landoj regadon de Habsburgoj. Ĉar la ĉeĥa nobelaro vidis sekurigon de siaj rajtoj ĝuste en la evangelianismo, la konfliktoj profundiĝis, la katolika tendaro ne sekretigis sian kreskantan batalemon, la futuro promesis nenion bonan.

Johano Amoso konis la simplajn homojn de sia lando, li ja elkreskis meze de ili. Li sciis, kiel meditemaj kaj bonkoraj ili estas, kiom ili amas sian modestan hejmon kaj trankvilan vivon en ĝi, kiel ili estas atentemaj kaj kiom ili sopiras instruiĝon. Ili volis ekkoni kaj konfesi la veran kristanan kredon, esperante, ke ĝi alportos al ili ankaŭ pli bonan vivon. Sed tiudirekte ne diferencis sinjoro protestanta disde sinjoro katolika: ambaŭ same malestimis la regatan popolon, kies vivtasko estis nur labori kaj obei; krom maloftaj esceptoj ili ankaŭ samopiniis, ke la klereco estas ofte danĝera pordego al tento. Kaj tial la malalta kampula klaso, kvankam el ĝi devenis jam tiom multaj raraj viroj, estis lasata sen gvido, sen konstanta prizorgo. La ĉeĥa lingvo perdiĝis sub la lavango de la germana kaj latina, kaj kiu ne sukcesis eniri en latinan lernejon, tiu havis minimuman ŝancon ekscii ion pri la mondo.

Li parolis pri tio kelkfoje kun siaj amikoj en la universitato. Sed kiamaniere vi volus esprimi aferojn, ili miris, por kiuj la ĉeĥa lingvo eĉ ne havas nomojn? Kiel vi volus esprimi pensojn, por kiuj sufiĉas nur la latina? Ili dubis, ne kredis. Sed Johano Amoso konis la literaturon de pasinteco kaj sciis, ke ĝi ĉiam klopodis paroli en lingvo komprenebla por la popolo. Tiel ĝi poemis, rakontis, kantis. Tomaso de Ŝti^one^o kapablis disvolvi pere de la ĉeĥa lingvo plej profundajn rezonadojn de la homeco. Libroj de Jan Hus penetris en la vivon kaj gvidis en batalon. Ankaŭ nun estis la sama celo, ebligi partoprenon en instruado al ĉiuj, ankaŭ al la plej simplaj. Kaj Johano Amoso, ĝuste pro tio, ke li vivis multajn jarojn inter la homoj, kiuj sciis ĉeĥlingve ridi, koleri, disputi, konsili kaj preĝi, lernis bone regi la gepatran lingvon kaj ne dubis pri ĝi.

Kaj tiel sub la influo de malestimoj kaj riproĉoj naskiĝis en li intenco, kiu kreskis kaj fortiĝis kaj fine firme fiksiĝis en lia animo: mi kompilos vortaron. Mi kompilos grandan vortaron ĉeĥa latinan, en kiu mi pruvos, ke la ĉeĥa lingvo scias esprimi ĉion, kion la dokta latina. "Trezo de la lingvo ĉeĥa" li nomis en la animo sian estontan verkon. Trezo ĉar li kolektos en ĝi ĉiujn tajlitajn gemojn de vortoj, juvelojn de proverboj kaj sentencoj, delikatajn agrafojn de

esprimoj kaj lertajn parolturnojn. Trezoro ĉar kiam li prezentos ĝin al la ĉeĥa publiko, ĝi lumigos ĝin per brilo de ĉarmo kaj fiero kaj ĉiuj ekkonos, ke la ĉeĥa lingvo ne estas nur vokoj de koĉeroj, preĝoj de maljunulinoj kaj kantoj de infanoj, sed ke ĝi estas lingvo bone preparita, per kiu eblas elrakonti ĉion, kio en la Dia mondo estas bela kaj inda je homa nomo.

Kaj ankoraŭ unu potencon intencon li ekhavis, kiam li vidis, kiom da libroj oni ofertas al studentoj en germanaj urboj. Li konvinkiĝis pri tio denove en Heidelberg, en "rezidejo de Muzoj sur Nekaro", kien li transiris en la lasta jaro de siaj studoj, unue por aŭskulti lekciojn de profesoro Pareus, kiu okupiĝis pri vizio de la mondpaco, due por ĉeesti nupton de la deksepjara Frederiko Palatinata, sur kiun estis metita la espero de evangelianoj, kun Elizabeta, filino de la angla reĝo. La ĉeĥoj havas preskaŭ nenion, li ekkonsciis en lernoĉambroj kaj dum promenadoj, nenion pri natursciencoj, pri la historio, pri la geografio... Sed se ili indas ekstari samnivele en la vico de eŭropaj nacioj, ili devos ricevi ŝtupojn, sur kiuj ili ascendas. Kaj Johano Amoso firme decidiĝis: mi kolektos ĉiujn rezultojn de scienca serĉado, la tutan saĝon, kiun la mondo atingis, kaj mi verkos Teatron de Ĉiuj Aferoj. La ĉeĥa junularo ne bezonos vagi de tezo al tezo, sed ekposedos kun klara supervido ĉion, kion la sagacaj cerboj ĝis nun elminis el tenebroj, kaj la tuta nacio subite scios pli multon. Ho Dio, ĉu mi kapablos krei tian verkon?

Nur antaŭnelonge li atingis la dudekunuan jaron. Sed Alsted ne estis ja multe pli aĝa, kaj ĝis kie li venis per sia necedema diligenteco! Ankaŭ mi devigos min al ĝi, enkapigis al si Johano Amoso. Tiamaniere mi honoros la memoron pri miaj gepatroj, ĝi estos dankesprimo al la ĉeĥfrata unuiĝo, mi tiel proklamos klare, ke mi fieras esti ĉeĥo.

La grandaj intencoj, kiujn li anime pritraktis, liveris al li novajn fortojn. Iam li kulpigis sin, ke li ne estas sufiĉe pia kaj humila. Sed kvankam li klinis sin antaŭ la saĝo kaj revelacio de la Skribo kaj antaŭ la instruo de Kristo, ekzaltis lin kuraĝo de sciencaj esploroj kaj li sopiris partopreni en la batalo kontraŭ la nesciado.

En Heidelberg instruis ĝis antaŭ nelonge ĉe la universitato profesoro Christmann, pri kiu oni diris, ke li posedas manuskripton de la Kopernika verko pri movoj de ĉielaj korpoj. En la studentaj rondoj oni bone sciis, kion instruis Koperniko: ke ne la Tero, kiel asertis la eklezio, sed la Suno estas la centro de la universo. La pola sciencisto mem longe hezitis konfidi sian verkon al preso; la unuan represaĵon oni alportis nur al lia mortlito. La eklezio ja rimarkis la danĝeran instruon kaj kondamnis ĝin. Eĉ Martin Luther nomis Nikolaon Kopernikon frenezulo. Se la Tero ne estas centro de la universo, kio do validas pri kreo de la mondo kaj de la homo? La juna Komenio samopiniis kun la ceteraj, ke estas necese kondamni, kio oponas la Skribon. Kaj tamen la

manuskripto de Koperniko lin incitis, des pli pro tio, ke oni diris, ke la familio de Koperniko devenas de ie ĉe Mlada^o Boleslav en Bohemio. Johano Amoso volis scii, kiel povis la fama astronomo en la klostro de Frauenberg aliri al sia hereza konvinko kaj al provo refuti instruon daŭrantan jarcentojn. Unu januaran tagon de la jaro 1614, kiam li jam antaŭvidis sian hejmravenon, li direktis siajn paŝojn al la vidvino de profesoro Christmann kaj proponis al ŝi ĉion, kion li havis. Li ricevis la manuskripton, kaj malgraŭ la danĝeraj teorioj, li traviglis super ĝi multajn vesperojn.

Poste, kiam venis la printempo kaj la tempo por reveni en la patrujon, Komenio havis nenion por pagi al la koĉeroj. Sed li ŝatis piediri; li ĉiam asertis al siaj amikoj, ke tia moviĝo hardas la sanon de la tuta korpo, alportas multajn neatendatajn renkontojn kun homoj kaj ekkonon de la naturo kaj ke ankaŭ la pensoj, kiam oni paŝas, fluas pli facile. Li konfidis do sian valizon al la kompanoj kaj kunprenis nur kelkajn plej necesajn aĵojn; sed li aldonis al ili ankaŭ la valoregan volumon de la Kopernika manuskripto, en kiun aparte li enskribis la tagon, en kiu li estis akirinta ĝin.

Li tramarŝis kelkajn centojn da kilometroj de hejmravena vojo, kun la okuloj klarvidaj por printempaj mirakloj, kun la volo ĉiam pli kaj pli firma. Sporade lin transportis afabla koĉero; sed antaŭ la landlimo li deĉariĝis kaj la reston de la vojo li jam paŝis piede.

Li ekstaris sur montodorso, de sur kiu malfermiĝis antaŭ li la panoramo de Bohemio.

Li salutis siajn rememorojn el la infaneco, rigardis reen, adiaŭis la instruistojn kaj la jarojn de studado. Li memorigis al si la grandajn taskojn, kiuj lin hejme atendas.

Klininte sian vizaĝon al kunmetitaj polmoj, li arde preĝis.

Poste li denove ekprenis la mansakon kaj bastonon kaj firme ekpaŝis.

FELIĈAJ JAROJ

Per diafanaj matenoj eniris trankvilaj aŭtunaj tagoj en la valon de Fulnek.

Varma vetero permesis al la juna instruisto elpaŝi kun la lernantoj eksterdomen, sur la deklivon super la lernejo, kie la knaboj havis sidilojn el gazonpeco, kie sonadis kantoj de vagemaj kanabenoj kaj la suno tralumis la ĝis nun verdajn branĉojn de kverkoj. Kaj sufiĉis preni en la manon falintan folion, trovi

forlasitan neston aŭ ekvidi sur la firmamento sagoforman aron da anasoj, kaj la instruisto ekrakontis, metis demandojn, ekzamenis la inĝenion de la lernantoj kaj instruis ilin, dum ili ne konsciis, ke ili lernas.

En sia instrua metodo li elprovis la lernantojn kaj sin mem jam en Přerov, kiam li fariĝis instruisto en la sama lernejo, kiun li frekventadis antaŭ jaroj. Li ne metis batilon sur la tablon, kiel oni kutimis en ĉiuj lernejoj de vasta ĉirkaŭaĵo, li ne kriis kaj ne minacis per pugnoj; li venadis al siaj lernantoj kun rideto kaj gajnadis ilian favoron, ĉar li sciis diveni, kio ilin allogus, li ne estis malpacienca kaj komprenis ankaŭ ilian emon al ludoj kaj konkursoj.

En la jaro 1616 li estis ordinata pastro kaj baldaŭ poste oni nomis lin administranto de la eklezia anaro kaj de la lernejo en la nordmoravia urbeto Fulnek, en kiun la urbanoj de Přerov sendadis siajn filetojn por lerni germane. Li ne veturis tien sola; li ekkonis en Přerov junan virinon, kies ĉarmo kaj karaktero al li tre ekplaĉis. Ŝi estis Magdalena Vizovska^o, duonfilino de la urbestro de Přerov. En somero de la jaro 1616 festis Johano Amoso kaj Magdalena sian geedziĝon, seriozan, sed plenan de feliĉaj promesoj por estonteco.

Ĉarmaj estis ankaŭ la printempoj en Fulnek, kiam en abelujoj vekiĝadis abelaj kantoj. Magdalena estis bona, pacienca edzino por viro kun multaj diferencaj intereso kaj ne malfortiĝanta sopiro je agoj. La tempon, kiun ne forprenis de li la instruado kaj pastraj taskoj, forprenis la laboro pri lernolibroj aŭ pri la historio de la suzerenoj de Žerotíⁿ. Johano Amoso estis neniam ekscitita kaj kruda kaj en lia ampleto trovis Magdalena profundon de sekureco. Kiam naskiĝis la unua infano, knabo, tiam en timo, zorgo kaj ĝojo de Johano rekonis Magdalena lian amon pli klare, ol kiel malkaŝus ĝin centfoja amdeklaro.

La feriojn ĉiam uzis la juna instruisto por vojiri hejmen, al Moravia Slovakio; li vizitis la tombojn de la gepatroj kaj de la fratinoj, salutis konatojn, aŭskultis kantojn, kiuj sonadis dum lia infanaĝo. Li daŭrigis la vojon kaj trairis iom post iom la tutan Moravion. Malkontenta pri ĝisnunaj mapoj, kies erarojn li pruvis, li firme decidiĝis, ke li desegnos pli bonan mapon, pli versimilan. Dum siaj vojoj li ne nur mezuris la distancojn, sed ankaŭ la profundon de popola saĝo, kaj notis ne sole fluon de riveroj, sed ankaŭ sukoplenajn popoldirojn, proverbojn, interesajn esprimojn kaj komparojn. Liaj poŝoj kaj valizoj estis plenaj de notoj, kiujn li post la reveno ĉiam reskribis por la preparata Trezoro.

Sed la sentencoj, kiujn li aŭdis el la buŝoj de vilaĝaj homoj, ne estis por li nur rigida frazo, kiun li fride envicigus en sian kolekton. Li bone sciis, kiu kion kaj kial diras. Li estis ja spirita administranto de siaj konfidoj kaj instruis iliajn infanojn; krome li konis ankaŭ la vivkondiĉojn en aliaj bienaj distriktoj. Ĉiam kaj ĉiam li konsterniĝis pro la tristoplana vivo de la servuta popolo, pro ĝia mizero kaj senpovo. Li estis pro tio profunde ĉagrenita kaj ofte li kuraĝis fari

incitajn riproĉojn kontraŭ la suzerenoj; multfoje li provis savi iun malfeliĉulon el lia mizero per sia propeto aŭ protesto. Sed la malbona stato de aferoj estis tro ĝenerala, por ke povu helpi lia interveno. Li revenadis hejmen afliktita pro senpovo de siaj fortoj kaj tamen kun nova spitema decidiĝo.

Kiel helpi? La simpla vorto de predikisto ne sufiĉis. Ĉu do per la plumo? Li ankoraŭ neniam elprovis ĝin por simila tasko. Sed ĉu ekde kiam la mondo ekzistas ne prenadis por helpo la plumon viroj, kiuj ne havis potencon kaj regopovon, sed en kies animoj, spite al tio, aŭdiĝis kompato kaj sopiro pri justeco? Li konis Leterojn al Saturno de Lukianos, en kiuj malriĉuloj plendis kontraŭ la riĉaj. Ĉu do ne esprimi en tia disputo ĉion, kio en la ekzistanta mondo ŝarĝas honestan homon kaj ekscitas lin kiel stato kontraŭleĝa, nekristana, nehoma?

Li provis tion. Kaj la unuan fojon li ekkonis tiun feliĉan senton, kiu trapenetras la animon, kiam oni komencas verki laŭ sia pura konvinko kaj kiam ĉiu skribita frazo ankoraŭ plifortigas la decidiĝon. Li skribis Vokado de opresataj malriĉuloj al la ĉielo, kaj kernaj, vivaj vortoj rekte invadis en lian plumon. Multaj havas plenajn grenejojn kaj provizejojn, ke ili eĉ musojn misedukas; ni dume mortas pro malsato. Ili havas ŝrankojn plenajn de peltoj, jupoj, manteloj kaj supervestoj, eĉ tineoj ilin manĝas; ni dume duonnudaj iradas. Ili havas kestojn plenajn de arĝento kaj de oro, sed anstataŭ uzi ĝin, ili ĝin rigardas...

Subite li embarasiĝis. Sub lia mano kreskis akuzoj, pri kiuj li estis konvinkita, ke ili estas pravaj. Tamen ĉu li trovos presiston por tia verko? Ĉu li ne aŭdis de la sinjoroj el la Frateca Unuiĝo, alie noblaj kaj honestaj, plendojn kontraŭ la servutuloj, pri ilia pigreco kaj malobeemo? Ĉu ili permesos presi la libron, kiu la tutan kulpon pri ĉiuj malbonoj en la mondo ĵetus nur sur tiujn, kiuj havas potencon kaj posedaĵojn? Li volis mediti juste kaj sen antaŭjuĝoj. Certe la servutuloj havas multajn homajn mankojn, kiuj kaŭzas ĝenojn al la regantoj. Li povas mencii pri ili, estu aŭdata ankaŭ la alia flanko, aŭdiĝu do ankaŭ plendoj de la potencaj. Estas ĝuste, ke la leganto mem decidu, je kies flanko troviĝas la vero.

Li ne verkis pro sia ambicio. Li volis helpi al servutuloj, kiuj mem ne scias helpi sin. Al kiu do estas destinita lia libro? Al la superularo. Jes, tiujn ĉi legantojn li ne rajtas fortimigi. Eble degelos la glacio sur la koroj de la plej kruelaj suzerenoj. Ili eble ektimos kaj rekonsciiĝos. Fine li nomis sian verkon Leteroj al la ĉielo kaj klarigis tion: Kion ni kompatindaj faru, se ne eblas trovi en la mondo iun, kiu nin kompatus aŭ almenaŭ ploradon nian aŭskulti volus? Li estis konvinkita, ke tiel adresita libro trovos plej facile aŭdon ĉe tiuj, por kiuj ĝi estas destinita kiel admono, riproĉo, kiel arda mesaĝo en la konsciencon.

Ĉiuj en Fulnek amis la junan predikiston pro lia karaktero kaj agemo; pro lia pacemo lin estimis ankaŭ civitanoj de alia konfesio. La lernejo staris tuj apud monaĥejo de aŭgustenanoj, ne estis eble, ke la administranto de la lernejo kaj la prioro de la monaĥejo longe evitu unu la alian. Sed la aŭgustenanoj povis konstati, ke la juna administranto ne estas kirasita per tia pikarta obstinemo, kiun ili timis; ili konvinkiĝis, ke li estas ja persistema, sed ankaŭ tolerema, ke li ja ne cedas de siaj principoj por aĉeti ies favoron, sed ke li ne ofendas kaj ne humiligas, ke li estas komprenplena ankaŭ al alikonfesiuloj kaj klopodas helpi al ĉiu, kiu bezonas helpon. Ili lernis respekti lin. La personeco de la ĉeffrata paroĥestro, kiu ĝis nun ne atingis sian tridekan jaron, donis sian karakteron al vivo de la tuta urbo.

Sed nur mallonga spaco estis destinita por tiu ĉi feliĉa tempo de unuaj spertoj en la lernejo kaj de kolektado de fortoj por pli grandaj taskoj.

La streĉiteco inter malamikaj religiaj tendaroj en la ĉeflingvaj landoj kreskis. Kvankam la reĝo Matiaso ĉiam pli senkaŝe favoris la katolikojn, la ĉefa nobelaro ne trovis sufiĉe da konkordo kaj decidemo por rifuzi lian posteulon Ferdinandon, dukon de Stirio, pri kies nerepacigeblo rilate al la evangelianoj ili bone sciis. Ili postulis nur aprobon de la majestaĵo; kaj Ferdinando ĝin hipokrite aprobis, ĉar la jezuitoj, kiuj lin edukis, donis al li rajton false ĵuri. Apenaŭ finiĝis la kronadceremonio en la Praga kastelo, la evangelianoj komencis esti senigataj je oficoj, iliaj preĝejoj estis fermataj kaj detruataj. La kapoj falos surteren, proklamis la superuloj de la katolika flanko. Nur poste ekkomprenis la evangeliaj suzerenoj, kiel facile ili fariĝis viktimoj de ruzo, kaj ke ili devas levi sin al kontraŭstaro.

En majo 1618 kunvenis en la Praga Carolinum kongreso de suzerenoj kaj kavaliroj, kvankam ĝin Matiaso malpermesis. La rezistemuloj interkonsentis fari "mallongan proceson" kontraŭ la gubernatoroj de Bohemio, Slavata kaj Martinic, kiuj volonte plenumis la ordonojn de Matiaso. Tondra disputo en la Praga kastelo finiĝis per tio, ke la gubernatoroj kaj ilia skribisto estis elĵetitaj el fenestro. Kvankam neniu el ili estis lezita, komenciĝis tiel la malamikeco de la ĉefa nobelaro kontraŭ la reĝa potenco Habsburga, post kio jam ne estis eble reveni al repaciĝo.

La registaro de tridek direktoroj, kiu estis elektita, ekzilis el la lando jezuitojn, sed alie ĝi montris nedecidemon asertante, ke ili ne ekstaris kontraŭ la imperiestro, sed kontraŭ liaj malmoralaj konsilistoj. La suzereno de Žerotín, la protektanto de la juna pastro de Fulnek, estis ĉiam sincere fidela al la ideo de reformacio, sed nun li ne troviĝis en la vicoj de la kontraŭimperiestraj opoziciuloj. Li kadukiĝis pro maljuneco kaj malsanoj kaj ne kredis al malserioza milita entrepreno; pro tio li igis Moravion reteni la malamikecon kaj provis persvadi la ĉefajn suzerenojn, ke ili rezignu pri la batalo; sed en Prago oni

mokis lin kiel timemulon. Kaj oni nomis lin perfidulo, kiam la moravia parlamento sub lia influo permesis al unu el la imperiestraj armeoj transiron de Moravio.

Matiaso volis intertrakti kun la ribeluloj, sed la jezuitoj postulis de Ferdinando, ke li ekstermu ilin. Hispanio donacis pli ol duonmilionon da ormoneroj por malhelpi al la ĉeĥoj liberiĝi de sub la Habsburga jugo. Ĉiuflanke estis kolektataj regimentoj de soldistoj.

En Bohemio estis kolektita batalpreta landarmeo, sed la nobelaro pli sopiris helpon de eksterlando. Ilia soldataro, gvidata de Matiaso de Thurn, penetris dufoje preskaŭ ĝis Vieno, sed ĝi devis retrocedi. Kaj kiam fine venis el Nederlando promeso helpi, al Prago mankis mono kaj vana estis la penado inklinigi la anglan reĝon Jakobon I, kiu sin mem proklamis "kreanto de paco", por plifortigi la ĉeĥan insurekcion.

En julio 1619 la ĉeĥa parlamento fine senigis Ferdinandon de la ĉeĥa reĝa krono, ĉar li akiris ĝin "per ruzo kaj superforto" kaj proponoj pri nova reĝo fine koncentriĝis je Federiko Palatinata. Tiu ĉi lasta venis en Pragon kun sia edzino kaj kun la filoj kaj lasis kroni sin. Baldaŭ poste li estis akceptita kiel reĝo ankaŭ de la moravia nobelaro en Brno.

Johano Amoso subite troviĝis sur unu el la malfacilaj disvojiĝoj, kiujn la vivo tiel abunde preparis por li. Ĝeroti^on havis lian respekton kaj dankemon, sed per kuraĝaj esperoj li flamis por Frederiko Palatinata, kaj li ankaŭ ĉeestis la solenan akcepton de la nova reĝo. Kion li sentis en tiuj maltrankvilaj tempoj plej forte, tio estis angora sopiro, ke la evangelianoj komprenu la ordonon de la epoko kaj unuiĝu; per speciala skriba propono li tiam provis helpi la ideon, ke la malnovaj husanaj tradicioj kuniĝu kun la ideoj novaj.

Abundis kialoj por timi. Post la morto de Matiaso estis Ferdinando elektita Romia imperiestro kaj tiu ĉi elekto kompreneble tre helpis al la katolika tendaro. Dum la vintro eniranta en la jaron 1620 li certigis por si la decidan plimulton. Ferdinando kontraktis kun la "jezuita princo" Maksmiliano Bavara, ke la ligo por promesita militakiraĵo en Palatinato kaj princ elektista titolo por Maksmiliano postenigos novajn dudek tri mil soldatojn. Papo Paŭlo V donacis por subigi la ĉeĥojn duonmilionon da ormoneroj, kaj la hispana Filipo la III. aldonis tutan milionon. El Italio proksimiĝis novaj valonaj kaj napolaj regimentoj. Eĉ la reĝo Sigismundo III promesis varbi kontraŭ la ĉeĥoj en Pollando. Kaj neatendata aliancano de la imperiestranoj fariĝis eĉ la protestanta saksa princo elektisto Johano Georgo, al kiu la imperiestro por tiu ĉi perfido promesis Luzacion. La armeestroj Buquoy, Dampierre kaj Marradas proksimiĝis al la centro de Bohemujo.

La armeo de la direktoroj konsistis nur el solduloj, cetere malbone pagataj. Samtempe la nobeloj konservis sian fieregan konduton kontraŭ reprezentantoj de la urboj kaj en la lando kreskis ĥaoso. En kelkaj regionoj la kamapanaroj, turmentataj de fremdaj rajdistoj, leviĝis por armita kontraŭstaro. En la regiono de Taŭbor kreiĝis taĉmentoj sub blankaj ruĝaj flagoj, kaj la kamparanestroj signalis al Prago, ke ili batalos kontraŭ la imperiestranoj, se la servutuloj ricevos liberecon. Sed la sinjoroj en milita konsilantaro eksentis teruron pro tia postulo.

Printempe rekomenciĝis milita aktiveco. La stato de retrocedantaj ĉeĥaj regimentoj estis ĉiam pli malbona, kaj multiĝadis dizertuloj. Anglio ekipis el monokolektoj de urbanoj kaj pastroj regimenton de Gray, en kiu estis ĉirkaŭ dumil aventuremuloj. En julio perfidis Bohemion germana protestanta unio, kiu kontraktis kun la ligo pri neŭtraleco kaj lasis libera la vojon por nova armeo de Maksimiliano Bavara. La imperiestraj armeoj estis multe pli grandnombraj ol la ĉeĥa armeo.

Eĉ al Fulnek, ĝis antaŭ nelonge trankvila, alflamis la ondoj de malamo. Oni sciis, ke Komenio favoras Frederikon Palatinatan. Ĉiu evangeliano estis nun malamiko. Tiuj, kiuj antaŭe salutis la ĉeĥfratan pastron kun rideto, kriis nun post li insulton. Kiam li volis aranĝi ekskurson en arbaron, dispelis ilin la incititaj malamikoj per ŝtonoj. La abelujojn, kiujn Komenio alveturigis el Slovakio, por instrui abelbredadon al civitanoj de Fulnek, li trovis unu tagon renversitaj. For estis la tempo de pacaj tagoj kaj de trankvilaj noktoj.

El raraj sciigoj informiĝis la evangelia komunumo, kio okazas en la lando. Tio ne estis bonaj informoj. La armeo konsistis el solduloj vestitaj en ĉifonoj, la oficiroj estis avaraj, la armeestroj scipovis havigi nek grenon, nek panon. En la nomo de la nacio parolis nur streta socia tavolo saturita de egoismo kaj poltroneco, la nobelaro lasis ĉion je nesperta juna reĝo, al kiu ili donis eĉ ne plej etan helpon.

Tristan novembran tagon de la jaro 1620 okazis proksime de Prago milita konfrontiĝo, el kiu evoluis batalo. Ĝi daŭris nur du horojn, kaj falis tie ĉirkaŭ mil kvincent viroj. Sed ĝi finiĝis per absoluta malvenko de la ĉeĥa armeo. La imperiestra armeo estis pli bone vestita, pli bone pagata kaj pli batalema ol tiuj, kiuj havis truajn ŝuojn, estis malsataj kaj ne havis municion.

Frederiko Palatinata, kiu festenis dum la batalo en la Praga kastelo kaj tostis kun anglaj ambasadoroj je feliĉa estonteco, kvazaŭ perdis la kapon. Defendi Pragon aŭ ĝin transdoni, tio ne estis la temo de febraj konjektoj. Sub la aŭstra kalvinano Tschernebl, kiu antaŭe unusola rekomendis doni liberecon al servutuloj kaj gajni ilin por defendo de la patrujo, konsilis, ke la reĝo restu kaj ke oni alfrontu la malamikon per kontraŭatako; li, fremdulo, rememorigis al la ĉeĥaj sinjoroj la ekzemplon de husanoj. Sed sur ceterajn falis malkuraĝo kaj timo pro iliaj

posedaĵoj. Ili pensis nur pri tio, ĉu ili atingos pardonon ĉe la imperiestro Ferdinando; tricent nobeloj subskribis humilan peticion.

La reĝo nokte fuĝis, kaj Prago kapitulacis antaŭ la malamiko. La insurekcio estis entombigita kaj kun ĝi multaj grandaj esperoj. La imperiestro fariĝis posedanto de la ĉefaj landoj kaj kun li la aventuremaj armeestroj, kiuj facile konkeris riĉajn kastelojn, urbojn kaj tutajn regionojn. Maksimiliano la Bavara mem bezonis milon da veturiloj por ŝarĝi ilin per trezoroj rabitaj en kastelaj kolektoj kaj nobelaj domoj. La ekzemplo de la estroj iniciatis, kaj ankaŭ la soldatoj volis kompensi la malagrablan aŭtunan militiron, ili rabis kaj ruinigis.

La lando, kies popolon neniu defendis, angoris en tremiga ekscitiĝo, kiun trafumadis necertaj esperoj pri kompto. Sed ili ne plenumiĝis. Imperiestro Ferdinando II ne konis la ĉefan nacion, li fanatike zorgis pri la savo de la propra animo kaj kondukis laŭ instigoj de siaj jezuitaj konsilantoj, kiuj certigis lin, ke mildeco kontraŭ la herezuloj estas peko. Ankaŭ la hispana ambasadoro Onate, propra iniciatinto de la batalo apud Prago, konsideris la tempon matura por "ekstermo de la hereza nacio". La reprezalioj estis preparitaj pograde, kaj pro tio ili estis pli hororigaj. Kiel estron de la nova registraro la imperiestro nomumis Karlono de Liĥtenŝtejno, kaj arestigis pere de li ĉiujn eminentajn personojn de la insurekcio, kies nomojn al li jam antaŭe Liĥtenŝtejno denuncis. Liĥtenŝtejno plenumis ĉi tiun taskon delikate: li invitigis la sinjorojn kaj kavalirojn per nesuspektinda invitilo, anoncanta, ke li devas ilin konatigi kun certa dekreto, kaj poste li enkarcerigis ilin en la Blanka turo. Li fariĝis ankaŭ prezidanto de juĝa komisiono, kiu devis laŭ la ordono de la imperiestro establi kontraŭ la ribeluloj "specialan, rapidan, mallongan proceson, kiel tion la dimensio de krimoj, kulpoj kaj ofendo de la majesteco imperiestra bezonos."

La unuaj verdiktoj koncernis la fuĝintajn ribelulojn, kies nomoj estis alnajlitaj al pendumiloj de la tri Pragaj urboj. La dua eldiro koncernis la ribelulojn, kiuj dume mortis; la memoro pri ili por ĉiuj tempoj neniigis, proklamita kiel damnita. Al la reĝa krono tiel falis en la manojn 115 nobelaj posedaĵoj; jam tio estis abunda rabaĵo.

Por arestitaj insurekciestroj proponis la ekzekuta komisiono kruelajn verdiktojn ligitajn kun torturado, kiujn devis eĉ la konsilantoj de la imperiestro mildigi. La 21-an de julio 1621 daŭris kvar horojn la ekzekutado de dudek sep kondamnitoj sur la Malnovurba placo en Prago. Estis inter ili Vaclav Budovec, 74-jara, Kapliŝ de Sulevice, kiu havis 86-jarojn; troviĝis inter ili verkisto kaj la plej bona muzika komponisto de tiu epoko Kristoforo Harant de Polžice kaj la glora slovaka kuracisto kaj rektoro de la Karola universitato Johano Jesenius, al kiu oni antaŭ la senkapigo eltranĉis la langon. Post la ekzekuto la kapoj de dek du el la ekzekutitoj estis pendigitaj sur la Ponta turo tiel, ke ses el ili rigardis al la Malnova Urbo kaj ses al la Malgranda Kvartalo de Prago; la ĉefaj urbanoj tiel

devis ĉiutage rememori sian humiligon kaj tremi de timo antaŭ la krueleco de la imperiestra kolero. La morta korpo de Jesenius estis kvaronigita kaj surpikita antaŭ la urba pordego sur palisoj. Ĉio ĉi devis montri, kiel senrespekte volas la venkintoj subpremi la nacion, kiu kuraĝis pensi pri pli libera vivo.

Eĉ Moravion ne kapablis Žeroti°n defendi; ankaŭ ĉi tien atingis la monavidemo de potenculoj kaj rabemo de iliaj solduloj.

Al Komenio rifuĝis por kelkaj semajnoj Nikolao Drabi°k, lia estinta kunlernanto de lernejo en Stra°žnice, kiu estis ankaŭ samtempe kun Johano Amoso ordinita pastro. Sed ankaŭ tiu ĉi angulo ne estis sekura. Iun vesperon frapis sur la pordon fuĝintoj el la suda Moravio kaj per hororplenaj voĉoj anoncis, ke ĉe iliaj kalkanoj postvenas hispanaj taĉmentoj, kiuj senkompate ekstermas ĉiujn evangeliajn pastrojn. Ankaŭ la sinjoro el Žeroti°n sendis al sia protektato senditon kun mesaĝo, ke li tuj forlasu Fulnekon. Incititaj katolikaj civitanoj jam preparis sin bonvenigi la venkintojn kaj mem volis elsarki el la urbo ĉiujn malutilajn herbaĉojn. La vivo de Komenio pendis sur malfirma fadeno.

Magdalena petis la edzon, ke li obeu. Li timis forlasi ŝin, ĉar ŝi jam atendis la duan infanon. Sed kiam ŝi insistis, ke li ne submetu sin al furiozeco de la malamikoj, li fine cedis. Lastfoje li ĉirkaŭbrakis ŝin kaj kisis, lastfoje li karesis la fileton. Post la noktomezo li foriris el la domo, kie li travivis tiel feliĉajn monatojn, bedaŭrinde tiel baldaŭ ĉesigitajn. Li adiaŭis la lernejon. Li rerigardis al la konataj deklivoj, de kie sonis al li per malĝoja eĥo rememoro pri la ĝojaj infanaj voĉoj. Li ekcelis al la montaro.

Ĉe la tagiĝo invadis Fulnekon la hispanaj taĉmentoj.

EN KAŜEJOJ

Kvazaŭ malproksima nereala sonĝo ŝajnis nun la jaroj en Fulnek kvankam en ĝian trankvilon jam sonadis signaloj de angoro!

Kiam Johano Amoso fuĝis tiun maltrankvilan nokton el Fulnek, li ne supozis, ke li foriras por ĉiam. Per la terura ekzekuto de ribelestroj ne satiĝis la venĝemo de la kontraŭuloj. Ili volis piedpreme enterigi ĉiun spitemon kaj por ĉiam forpreni de la ribelema nacio esperon pri ekbrilo de libereco, alkateni ĝin, preni de ĝi ĉiujn fortojn. Pecon post peco transdonis la imperiestraj konsilantoj la malfeliĉan landon al solduloj de fremda sango, pecon post peco ili ŝiris ĝian animon. Estis ekzilitaj ĉiuj evangeliaj pastroj, kaj tiuj, kiuj kaŝis ilin, fordonis sin al kruelaj punoj. Oni ĉasis la ĉeĥlingvajn librojn; sur la placoj brulis ŝtiparoj.

Komenio fuĝis unue al la vilaĝo Žeroti^on apud Šternberk. La sinjoro de Žeroti^on, al kiu la imperiestro tamen restis dankema, havis eblon almenaŭ dum certa tempo protekti la ĉeffratajn pastrojn. Tamen tio ne povis okazi malkaŝe; aperis perfiduloj, kiuj denuncadis al la imperiestraj emisaroj. Kaj tial la servistaro el Žeroti^on kreis al Komenio por la momentoj de pli granda danĝero specialan rifuĝejon en kava trunko de maljuna tilio, kie li povis tranokti kaj eĉ verki.

Johano Amoso alterne uzis multajn kaŝejojn, ĝis fine li atingis la urbon Brandy^s nad Orlici^o. Ne malproksime de la tombo de frato Gregoro, fondinto de la Unuiĝo (1457), konstruigis Žeroti^on preĝejon; en lia domo, kie nun loĝis pluraj ĉeffrataj pastroj, trovis Komenio almenaŭ tian kaŝejon, por ke li havu ombron en ĝi.

Dum la unuaj tempoj de ekzilo li ĉiam vivis anime en sia Fulneka hejmo. Tial la unuaj linioj, kiujn li skribis, celis al Magdalena. Li sendis al ŝi kopion de sia meditado Pri la kristana perfekteco, en kiu li penis konvinki ŝin kaj sin mem, ke plenumi la Dian volon signifas humile elteni ĉiujn kontraŭstarojn, eĉ se ni ne ĉiam komprenas la Dian intencon; li sciis, ke restis nenio alia ol konsoli kaj esperigi, por ke la vivo ne falu en malesperon.

La sendito, kiu portis lian verketon al Fulnek, havis malfacilan revenon. La hispanoj ne malutilis al Magdalena, eĉ la civitanoj ŝin lasis trankvila, sed ĉe la kalkanoj de armeoj iris pesto kaj tiu havas ankoraŭ malpli da kompatemo ol avideco de la fremdaj solduloj. Ĝi falĉis la vivon de Magdalena, eĉ la vivon de ambaŭ knaboj, el kiuj la dua apenaŭ ekvidis la lumon de la mondo.

Antaŭ Komenio kuŝis verko de konsolo, kiun li skribis, sen antaŭsenti tion, al sia morta edzino. Li klinis la vizaĝon humidan de larmoj super ĝi. Kiel ŝi mortis? Kial? Kial li almenaŭ ne povis esti ĉe ŝi, por ke ŝi ne estu tute forlasita en la plej malfacila homa momento? Kial? tio estis vorto de rezisto, de obstino kaj de malespero.

Kiel instruisto kaj kiel eklezia paŝtisto li kutimiĝis pensi ĉiam precipe pri aliaj. Kaj nun li vidis ĉirkaŭ si tiom da malfeliĉoj, aŭdis tiom da ploro de vidvinoj kaj de orfoj kaj estis atestanto de tiom da kruelaĵoj, ke lia sentema spirito eĉ ne povis okupiĝi nur pri propraj vundoj. Li devis seninterrompe pensi pri ĉiuj membroj de la Unuiĝo kaj pri la homoj de ĉefaj urboj kaj vilaĝoj entute. Li sciis pri komunumoj, kie virinoj estis perfortataj kaj forkondukataj, kie estis sen kompato murdataj infanoj, kie kornikoj eksidadis sur korpojn de pendumitoj. En arbaroj pereis fuĝintoj pro malsanoj, cikatroj, teruro. Membroj de dispelitaj familioj renkontiĝadis kaj ofte jam trovis nur la tombojn. La plej honestaj, kiuj ne volis kisi ŝuojn de siaj sklavigantoj, devis foriri kun almozulaj saketoj fremdlanden.

Kolero kaj doloro incitis la sangon de Komenio. Sed memorante sian mision, li frontis kontraŭ la ĝenerala malkuraĝo per propra ekzemplo kaj kredis, ke li plifortigas siajn kunulojn almenaŭ per pacienco kaj humileco, se estis en la vidodistanco nenia povo, kiu kapablus kontraŭstari la venkintojn. Li pravis. Ili alpremis sin al li kaj ĉerpis de li novan esperon aŭ almenaŭ konsolon. En Brandy°s vivis ankaŭ multaj forlasitaj virinoj. Unu el ili, sinjorino Cyrilova°, kies edzo kiel episkopo de la Unuiĝo metis sur la kapon de Frederiko la Palatinata la ĉeĥan kronon, petis Komenion, ke li lernigu al ŝi kaj al aliaj elteni la ŝarĝon de aflikto. Li respondis al ŝi per malampleksa verketo kun nomo Kastelo nekonkerebla estas la nomo de Eternulo; la presejo de la Unuiĝo en Prago ankoraŭ sukcesis sekrete eldoni ĝin.

El la pastroj, kiuj trovis en Brand°ys rifuĝejon, estis Komenio unu el la plej junaj; sed lian nomon ripetis amikoj kaj konis ĝin ankaŭ malamikoj. Tial, kiam ajn estis proksimiĝanta danĝero de nebonvena vizito de la imperiestranoj, foriris Komenio al la trunko sub la arbaro Klopotsky°, kie li descendis sub la teron en etan kelon, por ke la ĉasantoj ne trovu lin; kaj kelkfoje li devis iri eĉ ankoraŭ pli malproksimen en arbarojn, al arbhakista kabano en montaro, pri kiu ne sciis la homoj en la urbo.

La vivo estis malriĉa, ofte kun malsato, seninterrompe en angoro pro ebla perfido. Sed Komenio bonvenigis povi de tempo al tempo malproksimiĝi en solecon. Kial senĉese vidigi rezignon kaj humilecon, se en la animo mordas neĉesanta doloro? Li kuraĝigis aliajn, kiel al li diktis la religia kaj homa devoj; sed al si mem li estis senkompate verdira, en momentoj de soleco li ĉiam ekstaris vid° al vide kontraŭ opoziciulo honesta kaj senkompata kontraŭ si mem.

Kiam la forlasitan kabanon sieĝis la nokto, procesioj de nigraj pensoj scipovis eniri eĉ tra fermita pordo kaj ŝutroj. Venis al li ankaŭ lia pasinteco, malĝoja ne nur pro tio, kio okazis, sed ankaŭ pro ĉio, kio estis entombigita kun ĝi. Se daŭrus la paco, kiel povus flori lia lernejo! Se praviĝus lia instrumentado, certe transprenus ĝin aliaj ĉeĥfrataj institutoj. Li preparus por ili la lernolibrojn. Li aŭdis rakontadon, ke la kapuceno Bonaventura bruligis sur la placo de Fulnek liajn trovitajn manuskriptojn. En amaraj imagoj li vidis, kiel la infanoj helpis al li brulilgi la ŝtiparon kaj kiel ĝin nutris per ĉio lia, kion ili trovis en la lernejo. Li vidis brulantajn siajn predikaĵojn, en la obskuron de la nokto flamis fajro de ŝtiparo kaj ardantaj cindropecoj restis en la animo. Kaj liaj infanoj kantis ĉe la pereiga ceremonio.

Kaj liaj propraj infanoj? Kial ne povis disflori ilia vivo? Kaj Magdalena, bona, senkulpa? Kiom da tiaj puraj kaj piaj Magdalenoj perdas sian vivon en la manoj de tiuj malpiuloj, kiuj pere de siaj agoj mokas ĉion, por kio ili estis senditaj batali? Pereas malhonoritaj, ĉastaj patrinoj, pereas en suferoj knabinoj apenaŭ

kreskintaj, la tuta lando ŝanĝiĝas en tombejon kaj la tenebro densiĝas, kaj de nenie oni povas atendi savon... Ĉu eĉ ne de la ĉielo?

Kaj kiam Johano Amoso por momento ekdormis, ofte subite li eksidis sur la lito, vekita de branĉo krakanta sur la tegmento aŭ de sia propra maltrankvilo, kaj kun gapaj okuloj li rigardis en la tenebron. Kun tremanta mano li ekprenis la biblion, lumigis lampon, febre li serĉis paĝon, sur kiu li trovis konsolon. Lertaj fingroj kvazaŭ parkere malfermis la Libron de Jesaja. Lia nacio estis tiam ankoraŭ sklavigita. Sed la voĉo de Jesaja ne subiĝis al la timo: li antaŭdiris suferojn, sed promesis ankaŭ finan venkon kaj lia profetaĵo plenumiĝis. Ĉu fariĝi Jesaja de la ĉeĥa nacio? Johano Amoso kaŝis la vizaĝon en la manojn kaj enpikis la ungojn en la frunton, en la tempiojn. Je kio ankoraŭ kredi? Lia animo estis frakasita.

Kiel jam plurfoje, li provis rekunmeti ĝin per plumo. Li deziris ekscii tiamaniere veron pri si mem. Antaŭ nelonge li legis dramajn dialogojn de Jan Andreae kaj interparolojn de Just Lipsius, verkitajn de ili ĉe forkuro el la patrujo. Tiu literatura maniero plaĉis al li. Ĝi permesis klare vortigi diversajn opiniojn, kvankam ili skuas unu menson: ĝi ebligis, ke ili konfrontiĝu. Sian verkon Johano Amoso titolis Afliktita.

Afliktita tio estas la homo veanta pro la mizero de la patrujo, eble la aŭtoro mem. La Racio lin volas konsoli sed ĝiaj konsiloj al la Afliktita estas bagatelaj kaj malvarmaj. Tio estas frenezaĵo kaj sensencaĵo. Ĉu la krimulon kaj frenezulon ĝojigos, se ankaŭ aliajn oni pendumas? Kaj tiel la malesperanta homo inkliniĝas al la opinio, ke pli bone ol vivi tiel, estus morti. Subite intervenas en la disputon la Kredo; ĉar ne ekzistas konsolo en tiu ĉi mondo, ĝi konsolas almenaŭ per Dia kompatato. Sed Afliktita estas tiom malakordita, ke li dubas jam pri praveco de la eklezio, kaj pri ĉioscieco de Dio. Dio? li demandas. Se ni vokas, li ne aŭdas kaj aŭdi ne volas. Fine venas Kristo mem kaj pravas sian povon super la tuta estularo. Sed Afliktita ne timas ankaŭ antaŭ li voĉigi sian senfinan triston kaj sian senesperon. Ĉu vi pensas, ke mi havas feran koron? li demandas kun sincera homa doloro.

Kiam Komenio, formetinte la plumon, estis traleganta la paĝojn verkitajn preskaŭ per unu ekspiro, li sentis, kiel plenaj de viva spitemo estas la vortoj de riproĉoj kaj kiel sveneme kaj grize impresas la vortoj de konsolo. Ĝi rezultis de tio, ke li vortigis sangan triston de miloj. La finon ni ne vidas, sed ni vidas antaŭ ni senfundan abismon ian, en kiun ni falas ĉiam pli kaj pli profunden. Ĉar kiom da homoj niatempes estis buĉitaj! Kiom da kaptitoj! Kiom da ili pro malsato, pesto, malvarmo kaj nudeco, tristo kaj aflikto, timo kaj terurigo mortis! ... Sed ekzistas en ĉi tiu mondo nenia espero de helpo.

Oni povas laboregi ĝis fallaciĝo kaj dediĉi ĉiujn fortojn al la bono sed kiom malmulte sufiĉas, por ke la tuta konstruaĵo ŝanĝiĝu je ruinoj? Ne, ne eblas fidi, li meditis, ke ĉi tie sur la tero ni iam atingos la feliĉegon. Nur se ni deturnos nin for de la mondo kaj faros finkalkulojn kun ĉiuj ĝiaj eble plej belaj tentadoj, nur tiam ni eble ĝisvivos trankvilon kaj pacon. Kaj la animo de Johano Komenio kiu estis animo de poeto lante pleniĝadis per ideo pri nova verko. Al ĉiuj, kiuj seniluziigitaj ŝanceliĝis ĉirkaŭ li kaj vane serĉis la rifuĝejon, li volis diri: Ĉesu esperi, ke tiu ĉi vivo, plena de trompiĝoj kaj de malbonoj, iam donos al vi feliĉon, nur tiel vi atingos la paradizon, kiun vi vane serĉas!

Li konceptis imagon de la mondo kiel urbon meze de tenebroj, kies ĉiu strato estas okupita de unu sola socia klaso kaj ĉiuj stratoj kondukas al placo kun palaco de Fortuno. Ĉi tiun urbon li, por instrui ĉiujn, intencis priskribi. Li finis nur sian tridekan jaron, sed multon li jam ekkonis kaj trameditis. Liaj okuloj sciis rimarki hejme same kiel eksterlande mankojn rodantajn la homajn karakterojn, difektantajn la klasojn, metiojn, profesiojn kaj malhelpantajn, ke ekregu ordo kaj trankvilo.

Li komencis verki sian Labirinton de la mondo, por ke li montru vanecon de ĉia klopodado en tiu ĉi mondo. Li estis saturita per volo kaj malamo; li skribis facile kaj la vortoj venadis mem, sed li zorgeme elektis, por ke li esprimu sian penson plej precize. Por la migranto, kiu trarigardas la mondon, li elektis du gvidantojn: en Ĉienpenetranto li enkorpiĝis sian sopiron je ekkono, en Mistifiko falsan rigardon al la mondo, en kiu kaŝiĝas egoisma sopirado je komforto kaj volupto, uzanta kiel armilon la mensogon kaj mokanta tiujn, kiuj suferis pro sia veramo kaj honesteco.

Ĝuste tial, ke li tiom bonege konis la homojn, ke li amis ilin kaj samtempe malamis iliajn malbonajn ecojn, el la nereala alegorio li baldaŭ transiris sur la bazon de tiu ĉi mondo, mondo de pekaj homoj. Kaj tial lia suspiro super iluzio de homa penado ŝanĝiĝis en liaj manoj je akrevida kritiko de misagoj malbeligantaj la vizaĝon de la mondo. Li pruvis, kiom lerte li regas la ĉehan lingvon kaj lingve petolis kun ĝi en ŝercaj vortŝanĝoj. Li akre kondamnis la tiutempan lernejan sistemon, same kiel orgojlon de la sciencistoj. Ĉe la kristanoj trovis lia migranto pli multe da miskvalitoj ol ĉe la paganoj. La superularo sin dediĉas sole al diboĉado kaj ne al bonfarto de la civitanoj. Por ĝia jursistemo li trovis plej malbonan kondamnon: Kelkaj ne havis orelojn, per kiuj ili aŭskultus plendojn de siaj servutuloj, aliaj okulojn, per kiuj ili rimarkus malordon, aliaj nazojn, per kiuj ili flarus intrigojn de ruzuloj kontraŭ la justeco, aliaj langon, per kiu ili parolus anstataŭ la mutaj opresatoj, aliaj manojn, per kiuj ili plenumus la decidojn de la justeco, multaj el ili eĉ ne la koron havis, por fari tion, kion la justeco ordonas. La klason de militistoj li karakterizis la plej malbona el tio, kio estas trovebla en la mondo. La tuta administrado de la mondo baziĝas sur

kvereloj, maljusteco, envio kaj malamo. Mi ekkomprenis, ke tio ne estas la Dia volo, juĝis tiam lia Migranto, ke unuj juvelplenaj, aliaj nudaj iradu, ke unuj de trosatiĝo ruktu, aliaj de malsato oscedu, ke unuj pene perlaboru, aliaj vante elspezu, ke unuj amuziĝu, aliaj lamentu... Nur en la interno oni povas trovi trankvilon kaj konsolon. Revenu en la domon de via koro kaj fermu post vi la pordon, tiel sonis la konkluda instruo.

Johano Amoso finis sian verkon je Kristnasko de la jaro 1623 kaj dediĉis ĝin al la suzereno de Žeroti^on.

Dum la verkado venis senĉese novaj kaj pli novaj informoj pri suferadoj de mizeruloj, kiujn persekutis malsato kaj pesto, kiujn neniigis armiloj kaj flamoj. En nemalproksima regiono fremda soldataro por sia amuzo kunpelis ĉeĥajn homojn, senigis virojn kaj virinojn de ĉiuj vestaĵoj kaj pelis ilin kiel bestojn sur neĝo en arbarojn renkonte al certa morto pro frostiĝo. Kie serĉi helpon kontraŭ tiaj arbitraj agoj? Tiaj okazaĵoj devigis Johanon Amoson, ke li ankoraŭfoje revenis al sia Afliktita kaj komencis verki ĝian duan parton. Li enbuŝigis al Kristo ordonon por obeemo kaj promeson de repago kaj de alveno de novaj tempoj.. Sed la vero restas je flanko de la Afliktita, eĉ se ĝi estus plej trista. Li tamen vidis ne nur la malĝojon de sia propra nacio. Li provis vidi pli foren, trovis pli profundajn kaŭzojn de militaj konfliktoj kaj scipovis prijuĝi, ke ne nur la ĉeĥaj landoj, sed la tuta Eŭropo troviĝas en dolora krizo.

Pri preso de la Labirinto ne eblis eĉ pensi. Sed la sinjoro de Žeroti^on malkovris ĝian poezian valoron kaj li mem igis prepari kelkajn unuajn kopiojn, kiuj poste disvastiĝis inter la fuĝintoj, ĉar ĉe ili la verko trovis profundan eĥon. Ĉe la instruitaj anoj de la Unuiĝo la eĥo pli grandis jam pro tio, ke la poeto en ĝi plenumis unu el devoligaj taskoj: pruvi, kiel riĉa kaj elasta estas la ĉeĥa lingvo, kiel ĝi scias ridi, bedaŭri kaj sarkasmi. Tio ĉi almenaŭ estis unu modesta sukceso en inundo de amareco kaj malespero.

Afliktita estis eldonita en sekreta presejo en Prago, sed tuj kiam la unua ekzemplero venis en la manojn de jezuitoj, ĝi estis enskribita en la indekson de malpermesitaj verkoj, kaj ĝiaj ekzempleroj fariĝis predo de flamoj ne pro konsolaj vortoj de Kristo, sed pro la kruela vero, kiun la verkisto esprimis en la nomo de miloj da suferantoj. Malgraŭ tio kelkaj presekzempleroj penetris en frendlandon kaj la verko pro sia kuraĝo kaj profundeco meritis tradukon; plurfoje la Afliktita estis eldonita germane kaj ankaŭ dane.

Intertempe en pluaj kaj pluaj kasteloj ekloĝis aventuristoj, kiujn favoris la feliĉo en la imperiestra soldoservo, per arestado kaj per alia violento estis la servutuloj devigataj al ŝanĝo de sia religio. Pluaj kaj pluaj ekzilitoj devis trans la limo serĉi rifuĝejon pro kredo heredita de siaj patroj. Eĉ Karlo de Žeroti^on ne povis plu kaŝi la ĉeĥfratajn pastrojn; dragonoj aranĝis ilian persekutadon.

Ankaŭ Komenion atendis sorto de ekzilito. Lia plumo ankoraŭ batalis. Li verkis meditadojn Pri orfeco, ĉar tiom multiĝis orfoj en la ĉeĥa patrolando. Li verkis Dia premo, ĉar kvazaŭ en senkompata premo ŝajnis al li la koro propra kaj la koroj de ĉiuj proksimuloj. Sed la rifuĝejo ne plu estis sekura. La senditoj de la impreniestro komprenigis al Žeroti^on, ke se li ne konvertiĝos de sia kredo, ankaŭ li devos forlasi la patrolandon. Preparata imperiestra jura normo permesis al neniu nobelo kaj burĝo de alia ol katolika kredo restadon en la lando. La servuta popolo ne povis ekziliĝi, ĉar iliaj manoj estis bezonataj por kamplaboroj; sed multaj el ili fuĝis sekrete. El la ĉeĥlingvaj landoj tiam estis devigataj foriri la plej bonaj el la plej bonaj: sciencistoj, karakterfirmaj homoj de ĉiuj tavoloj, homoj, kiuj estimis liberecon de la konvinko, kiuj ne volis hipokriti kaj koruptiĝi.

Johano Amoso en la rifuĝejo de Brandy^os intimiĝis kun la familio de Cyril. Ilia filino Dorotka havis firman naturon, sentime eltenis suferojn, havis kuraĝon de sia patro kaj pripensemon de sia patrino. Somere 1624 Komenio demandis ŝin, ĉu ŝi volus eltenadi kun li la vivon de ekzilito. Ŝi jesis. Aŭtune en Brandy^os ili geedziĝis.

Mallonge poste Komenio forveturis al sekreta kongreso de ĉeĥfrataj pastroj en la vilaĝon Doubravice apud Karkonoŝo (Gigantmontaro) kaj estis tie komisiita, ke li transiru la polan limon kaj traesploru eblon, kien povus la Fratoj el Ĉeĥujo fuĝi antaŭ la persekutado. Tio ne estis facila tasko, sed Komenio ĝin volonte akceptis. Li sciis, ke li serĉas novan hejmon ne sole por si mem, sed ankaŭ por multaj ĉeĥaj familioj. Li sciis, kun kia angoro espero ili observas lin kaj kun ilia angoro kreskis lia forto.

EN EKZILO

Iun januaran nokton de 1628, ĉe la komenco de tagiĝo, Komenio kun siaj kompanoj kaj iliaj familianoj atingis apud Žaclé^oř la landlimon de Bohemio. Sur blankaj ebenaĵoj kuris vento. Ili forskrapis neĝon kaj per ungoj elfosis iom da malmola argilo, kiun ili ligis en tukojn.

Komenio eltraktis por ĉeĥfrataj religiuloj kaj por aro de religianoj, kiu grupiĝis ĉirkaŭ li, permeson ekloĝi en la pola urbo Lešno, situanta ne malproksime de la silezia landlimo; ĝi apartenis al la klera kaj tolerema nobelo Rafaello Leszcynski, kaj vivis ĉi tie jam fratreligiaj grupoj polaj, germanaj kaj ĉeĥaj, fonditaj de Fratoj elpelitaj el la ĉeĥlingvaj landoj jam en la pasinta jarcento. La karaktero de la apuda pejzaĝo similis al Moravio kaj la urbo kun zigzagaj stratetoj kaj mallarĝaj domoj estis kvietiga angulo en la lando regata aliloke de la potenca ordeno jezuita; alveno de ĉeĥaj familioj, kies moraleco kaj diligenteo estis

proverbaj, povis signifi por la urbo pluan ekfloriĝon. Bona estonteco ĉi tie atendis precipe metiistojn; junaj nobeloj plejparte foriris al sveda armeo, plej malbone fartis tiuj, kiuj ne sciis perlabori la vivtenadon per la manoj, kaj ĉefe virinoj, inter kiuj estis multaj vidvinoj kun infanoj.

Plej grandan atenton vekis knabino, kiu vivis ĉe familio de Komenio Kristina Poniatowska, filino de ĉefrata pastro, antaŭ nelonge orfiĝinta; ofte ŝin trafis paroksismoj, ĉe kiuj ŝi havis diversajn viziojn, laŭ kiuj ŝi orakolis. Tiam ekzistis en la mondo multaj tiaj profetoj; teologoj disputis pri tio, ĉu Dio ankoraŭ povas paroli pere de ili same kiel en la bibliaj tempoj, sed la malfeliĉa popolo, precipe en la malfacilaj tempoj de militaj teruraĵoj, volonte aŭskultis tiajn profetaĵojn, kiuj alportis promeson de venĝo kontraŭ superfortuloj kaj senkompataj regantoj kaj konsolon al suferantoj.

Komenio jam dum la altlerneja studado venis en atmosferon, en kiu oni tre serioze meditis pri neceso de alveno de miljara regno de Kristo. Kontraŭ la regavido kaj maltoleremo de la potenculoj kaj kontraŭ la perforto de religioj, la homoj tiel esprimis la kredon pri nevenkebla potenco de la vero kaj pri espero je mizerikordo de la historio. Kaj eĉ se ĝuste pro tiuj ĉi kaŭzoj Komenio opiniis, ke devus veni rapida repaciĝo de ĉiuj kristanoj, tamen lia starpunkto al kredo pri supernaturaj fenomenoj estis dubema, kaj tion li esprimis jam junaĝe en unu de siaj literaturaj verkoj. Sed dum la unua vojaĝo al Lešno li ekkonis unu el tiaj profetoj en tanisto Kotter, kies profetaĵojn fidis eĉ tre kleraj viroj; pro tio li la profetaĵojn de Kotter rapide tradukis kaj ekvojaĝis al Hago por transdoni ilin al Frederiko Palatinata, por ke ili rekuraĝigu lin: ili ja pritraktis ĉefe la revenon de Frederiko en Bohemion kaj la disfalon de malamata imperiestra "Babilono".

Ĵus antaŭ la foriro el la patrujo li estis vidinta ekstazojn de Krystyna Poniatowska; li spertis ankaŭ, kiel sentime ŝi alportis sian mision al Albreĥto Valdštejno en Jiĉi^on, kaj post alveno al Lešno li ĉeestis ŝian ŝajnan morton kaj revenon al vivo. La ekzilitoj, eĉ tiuj, kiuj primokis ŝiajn profetaĵojn, nun ilin trovis veraj: ili tamen montris esperon pri la reveno en la patrujon, rekuniĝo de la familioj, redono de la havaĵoj, de la patrolando, de la gepatra lingvo.

Sed Komenio alportis el sia hejmlando en Leŝnon ankoraŭ unu fortan helpilon. Ne longe antaŭ la foriro el Bohemio li loĝis kelkajn monatojn ĉe nobelo Georgo S^oadovsky^o en Bi^ola^o Třemešna^o. Edukisto de tri filoj de S^oadovsky^o estis pastro Stadius, kiu iam studis kun Komenio en Herborn. Iun someran tagon ili kune foriris trarigardi la faman bibliotekon de Zilveršteinoj en la kastelo en Vlčice, kiu devis baldaŭ aparteni al unu el imperiestraj koloneloj. El multaj centoj da volumoj, kolektitaj en tiu ĉi biblioteko, aparte altiris atenton de Komenio certa libro: en la germana lingvo ĝin skribis Eliaso Bodin, kaj ĝi pritraktis didaktikon, tio estas pri la arto instrui. Komenio konis ĉi afere la ideojn de Alsted, Ratke kaj

Andreae kaj havis plie spertojn el sia propra aktivado en Přerov kaj en Fulnek. La problemo de rebonigo de la malnoviĝinta lerneja sistemo lin ofte tentis.

Per la edukado ŝanĝiĝas infanoj je plenkreskuloj, meditis li, kaj tiuj poste decidas pri sia vivo kaj pri la vivo de aliaj, ili determinas, kia estos la mondo kaj per kio ĝi estos regata. Ĉe Campanella li certiĝis en sia konvinko, ke ĉiaj homaj scioj devas esti sistemigataj, por ke homo venu al tia starpunkto, sur kiu li povus apogi sian respondecon pri evoluo de la mondo. Ĉe Bacon lin kaptis la ideo, kiel celkonscia metodo povas ankoraŭ multipliki fortojn de la homa menso. Ĉu ĝuste en la edukado de la junularo ne estas kaŝita la potenca rimedo, kiel ordigi kaj trankviligi la mondon, plenan de konfuzoj? Pli feliĉe ne eblas malhelpi malbonojn en la homaro, ol ĉe la junularo. Pli feliĉe ne eblas grefti arbojn ol en la junaĝo.

Tiun ĉi ideon subtenis ankoraŭ grava krea impulso: Ni foriros el la patrujo kaj ni lasos ĝin sen zorgo en fremdaj manoj, ĝia popolo ruiniĝos, la klereco malkreskos. Sed foje ni revenos. Kaj poste necesos plenumi grandan verkon de renovigo, por ke en la kompatindan landon revenu la perdita paradizo. Tial, se vi volas havi ordigitajn, verdiĝantajn, florantajn komunumojn, lernejojn, domojn, lernejojn unue fondu kaj aranĝu, ke ili per instruado kaj vera ekzerciĝado verdiĝu kaj laborejoj de veraj arto kaj virto estu.

Kaj tiel Komenio komencis ankoraŭ en la patrujo labori pri skizo de Didaktiko O destinita al la ĉeĥa nacio. Kaj la skizo de tiu ĉi verko kaj espero pri ĝia finigo kaj pli posta utiligo, tio ĉi estis certe la plej valora esperigo, kiun li kunportis ĉe sia trista vojaĝo en fremdlandon.

Sed li havis familion, kaj en la mondon venis varme la bonvenigata unua filineto Dorotka Kristina, Johano Amoso devis zorgi pri la vivtenado. Tial li akceptis post ŝia alveno al Lešno instruistan postenon en gimnazio. Li havis almenaŭ okazon konvinkiĝi, kiel neflekseblaj estas la metodoj de la tiama lernejo, kiel plumpe oni instruas la latinan lingvon, kiel al la lernantoj mankas supervido de naturscienco. Kaj sufiĉis rigardi sen antaŭjuĝo la lernejojn jezuistajn, por ke evidentiĝu, ke sur tiu ĉi vojo la reformacio malprogresis.

Por tiu ĉi grandioza tasko li volis gajni kunlaborantojn. Li provis ligi kontraktojn kun Ratke, kies opinioj imonis al li; Ratke ĵaluze gardanta siajn novaĵojn eĉ ne respondis al li. Tial Komenio skribis al Andrae; la germana filozofo, lacigita de vivosuferado, bonkore invitis Komenion kiel sian posteulon, sed li ne plu kapablis helpi al li. Fine Komenio devis decidiĝi, ke li mem transprenos la intencitan verkon.

Li eklaboris. Frumatene li forlasis liton, enlitiĝis postnoktmeze. La paĝoj amasiĝis. El eroj kaj iniciatoj li penis kunmeti firman sistemon, kiu garantius

edukadon ekde la plej juna aĝo ĝis la aĝo plenkreska. Li sciis, ke li venas kun opinioj, kiuj povas veki malkonfidon aŭ eĉ reziston; tial li penis subteni ilin per enhavoriĉaj argumentoj.

En Didaktiko, dediĉita al la ĉeĥa nacio, li postulis lernejojn por la tuta junularo sen diferencoj, eĉ por knabinoj; ili devas esti laborejoj de humanismo kaj ne torturejoj, en kiuj oni ĝis tiam pene eniĝadis en la kapojn de lernantoj tre mizerajn sciojn. Li deziris, ke la junularo akceptu la instruadon kun ĝojo; alporti prosperon povas nur tiu, kiu samtempe alportas plezuron. En la naturo li trovis multajn pruvojn por montri per ili taŭgecon de naturaj procedoj irantaj de simplaĵo al ioma komplikaĵo. Li estis konvinkita, ke bonan klerigon povas alproprigi al si ĉiu, kiu estas pridonacita per la sanaj sensoj, per la racio, memoro kaj volo.

Rememoroj pri la propra infanaĝo kaj vivo meze de infanoj konvinkis lin, kion kapablas alporti ankoraŭ antaŭ la eniro en lernejon saĝa eduko hejme, por ke la infanoj ne estu forsendataj en lernejon, kvazaŭ oni ion elĵetas per ŝovelilo ... tiel konekse kun la postulo, ke komenco de instruado devas okazi en la gepatra lingvo, estiĝis la libro Informaro de la patrina lernejo. Li deklaris en ĝi: Pli ol oro valoras la infano, sed pli ol vitro ĝi estas fragila. Facile oni povas difekti ĝin kaj fari damaĝon nemezureblan. Ĉiuj, kiuj legis la paĝojn de la manuskripto, estis surprizitaj, multaj el la vortigitaj opinioj estis por ili malkovro; neniam ĝis nun ili aŭdis paroli tiel pri la infanoj kun tia amplezo kaj seriozeco.

Atentinda estis la zorgo, kiun Komenio konsilis dediĉi al la edukado kiel kompreni la arton. Ĉar la infano, apenaŭ ekkomprenante vortojn, komencas en harmonio kaj ritmoj plezuriĝi li rekomendis doni al ili infanajn muzik instrumentojn, sed ankaŭ kreton kaj karbokrajonon, prepari por ili provizon de versoj kaj de kantoj. Li havis ankaŭ spertojn de popola tradicio kaj rememoris, kiel la moraviaj infanartistinoj trankviligas infanojn, se tiuj terenfalas, per ŝerca diraĵo, por ke ili forgesu la doloron kaj ekridu.

Estante poeto (li verkis religiajn kantojn kaj tradukis), li dediĉis jam pli frue ne nur unu verkon al la problemoj de la ĉeĥa poemverkado, al kiu li laŭ antikva modelo rekomendis prozodion. Tre klarvide li konceptis rolon de la sensoj en la arto, kiuj permesas ekkoni la mondon kaj konvinkiĝi pri ĝia ekzisto; ĉi tie li ofte transiris la limojn de religiaj teorioj. En Didaktiko li instruis, ke kion oni devas fari, tion ĉiu devas lerni per farado, por ke la lernejoj estiĝu laborejoj, kie bolas laboro. En tiu ĉi senco li konkludis, ke ankaŭ el la arto povas havi multe pli grandan prosperon tiu, kiu ĝin bone komprenas, do tiu, kiu ĝin mem provas praktiki kaj aktive okupiĝas pri ĝi. La verkistoj intence kaŝas sian arton, kaj tiel la lernantoj apenaŭ povas je la unua fojo penetri en ĝin; sed ili kapablos fari tion, post kiam ili iom ellernos, ekzercante sin per propraj eĉ nelertaj provoj. Al

tia prova krea praktiko li ja postulis aldoni ankaŭ preskribojn kaj regulojn de la arto kompari kun fremdaj modeloj, ekkoni la plej bonajn verkojn de la arto.

Didaktiko kaj Informaro formis parton de ampleksa plano pri ŝanĝo de la lerneja klerigado; sub la nomo Paradizo ĉeĥa ĝi devis esti vico da lernolibroj kaj informaroj por instruistoj. Sed la evoluo de sociaj cirkonstancoj malebligis lian pluan laboradon pri tiu ĉi granda projekto.

En la jaro 1630 la tuta protestanta mondo bonvenigis sur la batalejo de la historio la heroan svedan reĝon Gustavo Adolfo, kiu sukcesis gajni saksojn kaj brandenburgojn kiel aliancanojn. Kiam la saksoj invadis Bohemujon, rapidis tien post ili ankaŭ elmigrintoj ekloĝintaj en Saksujo. Ili venis ĝis Prago kaj post dek jaroj fine estis forprenitaj la kapoj de la ekzekutitoj el la kaĝoj de Ponta turo.

Ankaŭ la ekzilitoj en Lešno estis ekscititaj de la evoluo de la aferoj kaj opiniis, ke venas la atendata momento. Ili komencis prepari sin por ĝoja reveno. Komenio rapide verkis la finon de la ĉeĥa Didaktiko kaj sentis sin kvazaŭ profeto Haggeus, kiu fine de sia babilona kaptiteco donadis al sia nacio konsilojn por konstruado de nova vivo.

Sed Albreĥto Valdštejno, al kiu la imperiestro en premiteco konfidis nelimigitan povon, la saksojn el Bohemujo elpelis. La revo pri la reveno elvaporigis.

Komenio devis reveni al ĉiutaga laboro, kiu senĉese plikreskadis. La Unuiĝo konfidis al li gardadon de la studanta junularo, kaj li devis zorgi pri la presejo, kiun ĉi tien Žeroti^on sekrete transportigis el Kralice. Lia reputacio plikreskis precipe dum la epidemio de pesto, kiu atakis la urbon. La loka loĝantaro kondukis al la malsanuloj kruele: oni eltrenadis ilin malantaŭ la urbon, kie oni lasis ilin al ilia sorto kaj malzorge ilin entombigadis. Komenio tiam dum unu nokto verkis instruon, kiel batali kontraŭ la kontago^o, ĝi estis en unu tago presita kaj disdonita; tio helpis limigi la peston, pli homecan konduton al la malsanuloj kaj proksimiĝon de la pola loĝantaro kun la ĉeĥoj. La administranto de la urbo Jan Schlichtling mem pro tio dankis Komenion.

Al Komenio, eminenta ano de la instruista kolegio, estis konfidataj reguligoj de instruplanoj. Li skribis libron pri la fiziko kaj prilaboris lernolibron de la latina gramatiko. Presita aperis Labirinto de la mondo, la verko, kiu estis en la familioj de la ĉeĥaj elmigrintoj akceptita kun danko kaj admiro. Sed la plej grandan sukceson, kiu lin tuj famigis en la tuta klera mondo, alportis al Komenio la libro, kun kiu li eĉ tian esperon ne ligis. Por ke li faciligu instruadon de la latina lingvo, li elektis kelkajn milojn da plej uzataj vortoj kaj sistemigis ilin en frazoj, kiuj estus facile parkerigeblaj kaj samtempe signifus konatiĝon kun diversaj fakoj de la homa agado. Estas vere, ke jam ekzistis latina hispana Janua, kompilita de irlandaj monaĥoj, sed Janua linguarum reserata (Pordo de

lingvoj apertita) de Komenio ĝin tre superis, jam pro tio, ke samtempe kun la instruo en la gepatra lingvo kaj kun la latina esprimiĝo ĝi donis ankaŭ koniĝon de objektoj kaj de la tutaj sferoj de la homa agado. La eĥo estis eksterordinare viva. Aŭdiĝis Hamburgo, Gdansk, Leipzig. El Sa^orospatak en Transilvanio (Siebenburger, Sepkastel lando) gratulis al li lia iama profesoro Alsted. Komenio plenumis la revon de Mathurin Cordier, kiu jam antaŭ cent jaroj (li mortis en 1564) deziris, ke la lernejo ne estu punlaborejo, sed amuzo, ke la instruisto ne trenu la lernantojn, sed ke li gvidu ilin, kaj ke la lernantoj ne estu devigataj ami la latinan lingvon, sed ke ili amuziĝu per ĝi. Subite oni preparadis novajn eldonojn kaj tradukojn. Baldaŭ estis pretaj la franca kaj angla tekstoj. Komenio estis surprizita de la bondeziroj venantaj de ĉie; post longa tempo de plagoj ĝi estis la unua satisfakcio rilate lian laboron. Sed li ne haltis ĉe tio kaj tuj en la plua eldono, efektiviĝinta en Gdansk unu jaron poste (1633), li faris praktikajn ŝanĝojn.

Kun la ĉeĥa eldono de tiu ĉi interesa latina libro li ligis elekton el proverboj kun la titolo La saĝo de malnovaj ĉeĥoj. Alie li devis la ĉeĥajn manuskriptojn meti flanken; ne estis espero, ke oni utiligos ilin. En konfuzoj de postaj jaroj oni forgesis pri ili, ili perdiĝis kaj nur post ducent jaroj trovis ilin en Lešno la ĉeĥa sciencisto Jan Evangelista Purkyně.

La eĥo, kiun havis Janua, donis al Komenio kuraĝon al ideo, ke li devus siajn didaktikajn proponojn konfidi al ĉiuj, kiuj klopodas pri rebonigo de la lerneja sistemo, kaj kiuj certe bonvenigos la fruktodonajn iniciatojn kun kompreno. Pro tio, kvankam ne perdante la esperon pri hejmraveno, li decidis, ke li tradukos la ĉeĥan tekston en la latinan, internacie kompreneblan lingvon, kaj ke li ĝin riĉigos kaj pliampleksigos, por ke li kreu tiel ĝeneralan arton, kiel oni povas en ĉiuj komunumoj, urboj kaj vilaĝoj de ĉiu ajn kristana reĝlando establi lernejojn... Ankoraŭ pli energie li ripetis la postulon, ke la rajton pri kleriĝo havas infanoj riĉaj kaj malriĉaj, el urboj kiel el la plej izolitaj loĝlokoj. Li deziris unuecajn kaj kompreneblajn lernolibrojn kaj el la titoloj, kiujn li mem preparis, estis divenebla la ĝoja medio, kian li volis krei en lernejo por la infanoj bedon violan, bedon rozan, greftejon. Ĉiu scienca fako devis esti implicita en bazaj reguloj kiom eble plej koncizaj, helpe de klaraj kaj precizaj vortoj. Certe pli multe da nutraĵo donos al homa stomako pantranĉaĵo kun gluto da vino ol trogo plena de herbaĉoj kaj malpuraĵoj. Li rifuzis sciencon sen senco por praktika vivo; saĝa li konsideris ne tiun, kiu konas multajn aferojn, sed tiun, kiu konas aferojn utilajn. Tial grandan signifon li atribuis al la instruistoj, kiuj devas esti konvinkitaj, ke ili staras sur alta posteno de dignece kaj ke al ili estis konfidita nobla ofico, super kiu nenio sub la suno estas pli granda; sed li instigis ilin, ke ĉiu el ili instruu ne tiom, kiom li mem scias, sed tiom, kiom la lernanto kapablas kompreni, ĉar la fortoj devas esti subtenataj, ne subpremataj ... Li konfirmis sian konvinkiĝon, ke per la eduka aktivado oni povus kiel per potenca armilo

kontraŭstari la ĝeneralan malbonon. Jes, la vivon ni devas pasigi ne per lernado, sed per agado. Do ni devas kiel eble plej baldaŭ esti edukitaj por la agado de la vivo, por ke ni ne bezonu ĉesi pli frue ol ni ellernos agi.

Post finpretigo de la latina Didaktiko Komenio dissendis la manuskripton al pluraj eminentaj personoj; li atendis ilian komprenon kaj favoran eĥon. Sed li seniluziiĝis. Multaj liaj postuloj ŝajnis al la recenzantoj troigitaj, precipe la signifo, kiun li atribuis al la instruistoj; embarasita kaj elrevigita per neakcepto de la proponoj li haltigis la preson de la libro.

Proksimiĝis la tempo, kiam la favoraj esperoj denove mortadis kaj antaŭen ŝoviĝis bildo de malserena realeco. La brava Gustavo Adolfo venkis ja Valdštejnon en la batalo apud Lu"tzen, sed li mem falis. Kaj tiun jaron estingiĝis ankaŭ alia stelo, al kiu la ekzilitoj turnis siajn okulojn: mortis "vintra ĉeĥa reĝo" Frederiko Palatinata. Mensogis do la profetaĵoj de Kotter, mensogis la orakoloj de Kristina Poniatowska.

Kelkaj elmigrintoj turnis sian atenton al la kalkulema kaj vantema naturo de Valdštejno, de la imperiestro plurfoje humiligita kaj vundita. Kvankam li servis al la imperiestro, estis Valdštejno ĉeĥo. Senditoj ekrajdis al li kun sekretaj mesaĝoj. Sed perfiduloj ĉion alportis al Vieno kaj Ferdinando la II a murdigis Valdštejnon en Cheb. Ankaŭ tiu ĉi vaga lumo de espero estingiĝis. Kaj en la batalo apud No"rdlingen akiris poste la imperiestra armeo decidan superecon.

La vivo en Leŝno denove kaŭriĝis kaj mutiĝis. El la revoj pri reveno en Bohemujon kaj pri renovigo de lernejoj, komunumoj kaj de la tuta ŝtato restis nur amara cindro.

Sur la tablo de Johano Amoso kuŝis centoj da paĝoj de ĉeĥaj kaj latinaj manuskriptoj, proponoj de la lernolibroj, kiuj ne volis plimultigi la paperon, kiel li diris, sed la saĝecon. La mondo ja estis kontenta pri lia lernolibro de la latina lingvo, ĉar ŝajnis, ke tio povas akceli la vojon al sukceso kaj posedaĵoj. Sed neniun interesas la arto kiel instrui kaj la kuraĝaj ideoj, kiel ligi sciencon kun la eduko, ĉar neniun interesis la celoj, kiujn Komenio volis atingi.

VOJAĜO EN LONDODON

En Heidelberg studis kun Komenio Georgo Hartlib el Londono. Lia frato Samuelo estis riĉa strangulo, kies ŝatokupoj celis al aferoj utilaj kaj dum jaroj li oferis al ili la tutan havaĵon. Bacon mortis antaŭ nelonge; sed liaj ideoj vivis kaj instigis meditemajn cerbojn. Hartlib skribis utopian verkon pri neekzistanta lando Makaria, per ĝi li volis plibonigi industrion kaj terkulturadon en Anglujo,

planis fondi akademion por edukado de sciencistoj, sendis sian amikon John Dury al diversaj eŭropaj landoj, por ke li provu prepari repacigon inter la evangelianoj; li ne rifuzis aŭskulti petantojn el la vicoj de Unuiĝo de Ĉeĥaj Fratoj, kun kies sorto li sentis profundan kompaton.

Pri Komenio li eksciis unue de sia frato, poste de Dury, kaj li opiniis, ke li estas la homo, kiu povus plenumi liajn imagojn. Li aŭdis, ke Komenio preparas post la "pordego de lingvoj" ankaŭ "pordegon de saĝo", nome skizon de universala scienco, por ke li savu la mondon el la mizero de nesciado.

Ricevinte la postulon de Hartlib pri klarigo de siaj planoj, Komenio ekĝojis. Nenion alian li deziris pli ol povi sciigi siajn ideojn kaj konsiliĝi pri ili. Tial li sendis al Hartlib ampleksan skizon. Sed ankaŭ Hartlib ne volis fidi sole al sia saĝo; sen atendi la konsenton de la aŭtoro, li presigis la manuskripton sub la titolo *Conatuum Comenianorum praeludia* (Antaŭludoj de la klopodoj de Komenio). Kaj tiel iam en 1637 ricevis Komenio sendaĵon, super kiu li miregis; li mem apenaŭ aŭdacus presigi la ideojn, pri kiuj li devis supozi, ke ili kunpuŝiĝos kun antaŭjuĝoj kaj vekos diversspecan eĥon. Li ne eraris. Kvazaŭ krabroj atakas min ne nur la filozofoj, sed ankaŭ teologoj, li plendis iom poste.

Liaj zorgoj en tiu ĉi tempo multiĝis, amasiĝadis unu sur la alia, kurantaŭis unu al la alia. Kvankam li laboris senlace, tamen li ne sukcesis ĉion plenumi. Ĉar li estis konsiderata la plej kapabla teologo de sia eklezio, li devis laŭ ĝia komision eniri en disputon kun kverelema parolisto de la ĉeĥaj luteranoj Samuel Martinius el Dražov, kiu kulpigis la Unuiĝon, ke ĝi akceptis la kalvinajn herezojn, kaŭzis per tio skismon inter la evangelianoj kaj plie alproprigis al si la rikolton de monkelektaj farataj por la bono de la ĉeĥaj ekzilitoj. En Vojo de trankvilo Komenio defendis sian eklezion (origine nomatan unuiĝo de la fratoj de Krista leĝo) ne nur per perfekta kono de la Skribo, sed ankaŭ per la sana saĝo kaj per tio, ke antaŭ la abstraktaj teologiaj spekulacioj li favoris kristanajn farojn kaj efektivigon de principoj de la Skribo en la praktika vivo, kio cetere estis tradicia en tiu ĉi religia socio, fondita de Štiřny, Hus, Blahoslav.

Sanan komprenon por la vivo pruvis Komenio ankaŭ en la verketo

Faber fortunae (Faranto de fortune), per kiu li bonvenigis la novan urbestron Bohuslav, filon de Rafael Leszynski.

Venis novaj devoj kaj novaj taskoj. Kiam Johano Amoso estis elektita rektoro de la lernejo en Lešno, li volis utili al ĝi per studa novaĵo, pri kies utileco li estis firme konvinkita; li enkondukis studentajn teatrajn prezentadojn kaj li do devis por ili verki kaj surscenigi dramojn. Kiel temon de la unua li elektis historieton de la greka filozofo Diogeno, lian ŝanĝiĝon de facilanima junulo je filozofo; la pedagogian intencon li ligis kun arta imago, alloge li ŝanĝis scenojn kaj dramajn

renversojn, specialan akcenton li metis sur la epizodon inter piratoj kaj sur renkontiĝon de Diogeno kun Aleksandro. Li atendis entuziasman reeĥon de la ĉirkaŭaĵo; anstataŭ tio la rigoraj samreligianoj riproĉis al li paganan temon. Li do devis tondi la flugilojn de sia poeta spirito kaj por sekvonta ludo li elektis temon "Abrahamo". Sed la malagrablajoj ne finiĝis kaj en la admonoj, riproĉantaj al li efektivigon de dramaj ludoj, ĉiam pli ofte revenis nekomprenebla suspekto: Kion propre signifas tiu ĉi universala scienco de Komenio?

Jam disvastiĝis sciigoj pri presezempleroj de lia universalscienca skizo, kiun dissendis la anglo Hartlib, kaj la rigoraj samreligianoj riproĉis lin, ke li tro fidis la homan intelekton. Kalumnioj kaj duboj amarigis liajn tagojn de laboro kaj noktojn de ripozo kaj li devis konvinkadi sian ĉirkaŭaĵon pri sia ortodokseco. Li provis ilin certigi, ke eblas ankrumi en la Kredo kaj tamen iri per vojo de scienco al pli bona ordigo de la mondo. Li sciis, ke en la disciplino firme staras forteco de lia religio, sed la sopiro pri la vero lin pelis al libera pensado.

Antaŭ ĉio estis rigore juĝata lia rilato al polaj socinianoj (laŭ Faŭsto Sozzini), nomataj ankaŭ antitriunuanoj. Ĝi estis movado, kiu rifuzis la instruon pri la sankta Triunuo kaj la dieco de Kristo, komence ankaŭ postulis likvidon de la privata posedo kaj de servuteco kaj kondamnon de militoj. Troviĝantaj mem en internaj kontraŭdiroj, estis la socinianoj persekutataj de ĉiuj, kaj nur komence de la 17-a jarcento ili stabiliĝis kaj entreprenis plurajn provojn pri proksimiĝo kun la Unuiĝo. Johano Amoso ilin konis jam en Přerov, kiam li estis deksepjara. Tiam polaj nobeloj postlasis tie la tiel nomatan kateĥismon de Rakow, kiu enhavis fundamenton de ilia instruo, antaŭ ĉio la demandon pri homeco de Jesuo. La patreca amiko de Komenio Lanecius la libron forbruligis, sed eblas supozi, ke Johano Amoso ĝin legis antaŭ la forbruligo, kaj ni scias jam, kiel volonte li en tiu ĉi aĝo submetiĝis al duelo kontraŭ tento. Pli poste li mem koncedis, ke li devis kontraŭ tiu ĉi ĥimero batali multajn jarojn. La socinianoj evidente supozis Komenion kiel homon inklinan al iliaj opinioj, kaj ili en Leŝno faris kelkajn provojn favorigi lin al si; tiucele lin vizitis Kristiano, la frato de Schlichtling, administranto de Leŝno kaj rektoro Joachim Stehman de Rakow, kiu lin devigis legi verkojn de socinianoj, minacante lin per invito al "Tribunalo de Kristo". Komenio koncedis, ke li falis en plurajn tentojn, sed la kredo venkis en li. Kontraŭ suspekto pri socinianeco li devis defendi sin unue en la defendo de Unuiĝo[^] kontraŭ Samuel Martinius, due kiam liajn Preludojn atakis pola nobelo Hieronimo Broniewski. En la jaro 1638 li refutis iniciate de Johano Schlichtling la libron de la sociniano Melchior Schafer pri la problemo de resurekto de Kristo, kaj tio estis ĝuste en la tempo, kiam la lernejo en Rakow estis fermita kaj en Polujo la socinianoj estis persekutataj, Komenio estis tiam certe esence okupata de vizio pri sia scienca sistemo, kaj la teologiaj disputoj estis por li pli multe devo diktata de la religia misio; estas interese, ke liaj

argumentoj en la respondo al Scha"fer estas sufiĉe nenaturaj, kaj plie estas karakterize, ke li ne hezitis akcepti en la lernejon de Leŝno lernanton el sociniana familio. Tre supraĵaj estis ankaŭ pruvoj, kiujn li penis amasigi por rajtigi la dogmon pri la sankta Triunuo en la verketo, kiu rezultis el la diskuto kun Jonaso Schlichtling. Ankoraŭ en la jaro 1641 lin tentis klera sociniano Johan Ludwig Wolzogen, kiu klopodis montri al li kolizion inter la teologiaj dogmoj kaj la preparata universala scienco.

Komenio tiel staris senĉese inter du fajroj, kaj tiam, kiam li sentis teruron pro la etanimeco, de kiu li ne povis atendi komprenon por siaj planoj, li faris decidon, per kiu li samtempe formetis sian ekzistad garantion: li petis liberigon de siaj lernejaj devoj. Li esperis, ke per libera laboro li pruvos plimulton kaj foje konvinkos ĉiujn. Sed la situacio solviĝis alimaniere.

Iun julian tagon de la jaro 1641 li ricevis leteron de Hartlib kaj lia alvoko eksonoris kiel liberiga fanfaro de signaltrumpeto. "Venu, venu, venu!" skribis Hartlib. "Temas pri la gloro Dia." Li tiom interesiĝis pri la restado de Komenio en Anglujo, ke li sendis tri leterojn, ĉiujn per alia vojo, kaj li esperis, ke almenaŭ unu el ili atingos la celon. Li invitis en ili Komenion, ke li venu Londonon al kunveno, en kiu li klarigus principojn de la universala scienco.

Komenio volonte decidiĝis por la vojaĝo, ĉar ĝi promesis al liaj grandaj planoj finan liberiĝon el katenoj de Leŝna etanimeco kaj de malforteco pri la propra certeco. La invito impresis ankaŭ la doĵenojn de la Unuiĝo kaj ili ekopiniis, ke necesas ĝin akcepti.

Ne facile Komenio adiaŭis la familion, en kiu al la pli aĝa Kristinka aliĝis filineto Betuŝka, ne facile ankaŭ kun la fratoj, kies medio fariĝis propra al li. Sed en Gdansk li kuraĝe surŝipiĝis por transmara navigado. Ĉi lasta ne estis feliĉa. Baldaŭ eksplodis ŝtormo, kaj kvankam la velŝipo jam preskaŭ atingis la bordojn de Skandinavio, la ventego ĝin repelis al Gdansk. Komenio ne lasis sin fortimigi kaj surŝipiĝis denove.

Poeto en li ebriiĝis per majestateco de akvoj, per iliaj koloraj ŝanĝiĝoj, per kaptuniĝoj de profundaĵoj kaj pro alteco de la ĉielo super ili. Lia explorema spirito admiris la homan inĝenion, kiu klopodas regi la naturon, bridi la venton; scivole li observis la laboron de la ŝipanoj, demandis ilin, interesiĝis pri ilia terminaro.

Li ofte staris sur la pruo de la ŝipo kaj rigardis renkonte al la malproksimaj horizontoj super la senfina limo de akvoj. La fajfado de la vento en la velaro estis daŭra akompano de liaj pensoj. La restado sur la ligna skatoleteto, skuata de la maro, trudis al li senton de la homa eteco. Kaj tamen ŝajnis al li strange, ke li, simpla pastro de frateca Unuiĝo, veturas renkonte al granda insula lando, kiu

volas aŭskulti lian mision. Kiam li iam alpaŝis al la laboro, estis en li nenio pli ol ardanta amo al la propra nacio kaj kompato kun la suferanta homaro. Kaj jen al kio lin venigis la nekompromisaj meditoj!

Fine de septembro la ŝipo atingis la bordojn de Anglujo.

Johano Amoso opiniis, ke li vojaĝas kiel nekonata migranto, kiu sin modeste kaŝos ĉe Hartlib kaj provos kompari siajn meditaĵojn kun la liaj. Li ne sciis, ke malantaŭ la invito de Hartlib staras kuraĝa parlamenta grupo, kiu enpaŝis en opozicion kontraŭ la arbitreco de la reĝo Karolo I kaj ankaŭ kontraŭ mispaŝoj de episkopoj kaj prelatoj volantaj ĉiupreze firme teni sian regadon; en la kapo de tiu grupo staris eminenta revolucia politikisto John Pym, ĝia ano estis ankaŭ la poeto John Milton. La anoj de la grupo estis unuecaj en la opinio, ke la disvolviĝo de sciencoj povas garantii vojon al la ĝenerala libereco. Kaj tiel tuj en la haveno bonvenigis Komenion grupeto de signifaj viroj, kaj lia restado en Londono dekomence evoluis alie, ol li imagis.

Hartlib lin loĝiĝis en sia domo sur Duke Place kaj havigis por li blankan talaron, kian portis la anglaj klerikuloj. Komenio estis invitata al signifaj personoj, kia estis episkopo Williams, antaŭ nelonge liberlasita fare de la parlamento el reĝa karcero. Ĉiuj homoj, kun kiuj li rilatis, atendis de li, ke li helpas ilin daŭrigi la ideojn de Bacon kaj helpas rebonigi la homan socion. Specialan plezuron kaŭzis al Komenio tio, ke li renkontiĝis kun sia juna protektato kaj disĉiplo Petro Figul Jablonský, kun kiu li iam kiel eta knabo fuĝis eksterlanden el Bohemujo, post studado en Lešno li foriris vojaĝi kaj fariĝis sekretario de John Dury. Interesa estis ankaŭ renkontiĝo kun alia ekzilito, kun pentristo kaj gravuristo Vaclav Hollar, kiu intertempe akiris en Londono respektindan nomon kaj nun li uzis la okazon kaj gravuris portreton de la fama samlandano.

Entuziasmigita per la nova medio Komenio unue inklinitis plenumi la petojn, ke li restu en Anglujo. Li estis trairanta Londonon kaj alia maniero de la vivo incitis lian esploremon. Dimanĉe estis la preĝejoj plenaj. Komenio rimarkis, ke multaj junuloj notas la vortojn de predikantoj per strangaj signoj; kiam li demandis la novajn amikojn, ili klarigis al li, ke tio estas stenografio. Tiu rapida skribo plaĉis al li, kaj li antaŭdiris kiel bone ĝi estus aplikebla ĉe sciencaj disputoj aŭ por kurtigi eltirojn el verkoj. Alifoje li estis atestanto, kiel zorge la londonaj urbanoj elektas librojn en la librovendejoj; imponis al li, ke multaj lernas la grekan kaj hebrean. Kun siaj gastigantoj li kunsentis indignon kontraŭ la episkopa malico, kvankam li ne opiniis, ke pro tio necesus detrui altarojn, kolorajn fenestrojn kaj aliajn artaĵojn, memorigantajn la katolikan diservon. Konfliktoj, konsumiĝantaj en kolero kaj detruado, lin ĉiam fortimigis. Tio ne donis certecen. Kaj ankaŭ, kion oni diris hodiaŭ, ne estis vero morgaŭ. Episkopo Williams konfidis al li ĉe la renkontiĝo: Mi ne scias, ĉu mi apartenas al la vivaj aŭ al la mortaj. Kaj tiu ĉi

aserto validis pri multaj homoj, kaj eĉ pri tutaj grupoj da homoj luktantaj por potenco.

Kiam la reĝo revenis el Skotlando en Londonon, ŝajnis, ke ekestos trankvilo. Kunvenis la parlamento, kaj la episkopo Williams estis rangaltigita je ĉefepiskopo. Kaj kun Komenio kontraktis la partianoj de Pym, ke li kun dek du filozofoj komencos la preparon de la universala scienco. La revo de Bacon pri korporacio de sciencistoj laborantaj sen zorgoj pri la vivtenado por suprenleviĝo de la mondo staris sursojle de la plenumiĝo kaj tiel la realeco superis ĉiun nekuraĝan atendadon de Johano Amoso. Se la korporacio de sciencistoj, por kiu jam estis elektita la kolegio de Chelsey, sukcesos fini almenaŭ parton de la tasko, ĉu la mondo ne ricevos belegan donacon kaj instigojn por plua kuraĝo? Li rapide preparis du ampleksajn informojn por povi informi la plej larĝan rondon de personoj, kaj ankaŭ proponis dividon de la laboro. Li jam vidis en la animo, kiel el Anglujo disvastiĝas ideo pri la paca aranĝo de la mondo en ĉiujn landojn, kiel ĉie oni fondas novajn lernejojn kun ĝenerale kompreneblaj difinoj, kiuj instruos sur bazo de rigora sistemo ekkonon evitantan dusencan kaj disputeblan klarigon de ideoj kaj ebligantan male internacian interkompreniĝon.

Sed poste ĉio subite renversiĝis.

En Irlando eksplodis insurekcio de katolikoj, kaj iliaj kontraŭuloj pagis por sia malakordo kaj neantaŭvidebleco per multnombraj viktimoj perdintaj sian vivon. En la tuta lando denove estiĝis senmezura ekscitiĝo turniĝanta antaŭ ĉio kontraŭ la reĝo, akuzita pro krimoj, kiuj kostis Anglujon tiom da sango.

La amikoj trankviligis Komenion, ke li atendu, ĝis la cirkonstancoj stabiliĝos; sed li prave ne kredis, ke tiel ŝtorma atmosfero povus en mallonga tempo kvietiĝi. Ĉar li malgraŭ tio devis travivi la vintron en Anglujo, li ne volis perdi tempon. Li studis novan literaturon kaj verkis. Originajn ekskluzive didaktikajn projektojn li ŝanĝis por la principo de pli ĝenerala rebonigo, kaj nur tiam, kiam li estis certa pri tio, li eklaboris pri la definitiva propono. En manuskripto nomita Via lucis (Vojo de lumo) li volis montri, kiel devus esti direktata la laboro de la korporacio de sciencistoj, kiam en pli trankvilaj tempoj oni sukcesos ĝin krei; li pensis pri universala lingvo, kiu ebligus universalan interkompreniĝon, antaŭ liaj okuloj elstariĝis planoj pri libroj de universala scienco, kiuj devus havi rebonigan influon. Ĉiujn ĝis nun fragmente aluditajn temvariantojn li klopodis kunigi en unu sinoptika sistemo. Tamen provizore ĉio ĉi restis nur vizioj, eksperimento realigi belajn viziojn denove prokrastiĝis, ne eblis eĉ pensi pri la eldono de Vojo de lumo.

La senioroj de la Unuiĝo ne rekomendis al li pluan restadon en Anglujo plena de maltrankvilo. Ankaŭ lia edzino sendis al li leteron plenan de larmoj, ke li ne forlogu ŝin en la landon, kies lingvon kaj vivmanieron ŝi ne komprenas.

Komenio ankaŭ mem vidis, ke plua restado en Anglujo estus senutila, kaj tial la anglaj amikoj mem fine konsentis, ke li provu trovi rifuĝejon aliloke.

Sed kien turni siajn paŝojn?

Antaŭ ĉio ekzistis invito el Francujo, interpretita de la sekretario de kardinalo Richelieu. La sagaca politikisto jam antaŭ kelkaj jaroj primeditis, kia danĝero estas la kreskanta supereco de Habsburgoj, kaj eniris la militon sur la flanko de Svedujo. Pro tio ne ĝenis lin, ke Komenio, kies avantaĝojn li evidente konis, estas evangeliانو; li intencis fondi pansofisman akademion.

Sed venis ankaŭ invito el Svedujo. La plej riĉa homo tie estis probable la holanda industriisto Ludoviko de Geer, kiu posedis kuprominejojn kaj kies fabriko liveris kanonojn al la sveda armeo; cetere li armis regimenton de infanterio, kiun la holandanoj sendis helpe al la ĉefaj insurekciuloj antaŭ la batalo sur Blanka monteto apud Prago. Li ankaŭ zorgis pri la suprenlevo de la edukado kaj lia polmo estis donacema al ĉiuj, kiuj suferis pro sia konvinko. Komenio jam antaŭe estis en skriba kontakto kaj kun la edukisto de liaj filoj, Hotton, kaj kun la administranto de lia havaĵo, Wolzogen, al Geer pri Komenio rakontis jam ankaŭ John Dury. Danke al tiuj ĉi rilatoj sendis Ludoviko de Geer al Komenio jam unufoje inviton al kunlaboro kaj Komenio al li ankoraŭ antaŭ la forveturo en Londonon respondis per du rezonadoj pri reformo de eklezio kaj pri religia konkordo. Kiam Ludoviko de Geer ricevis en Svedujo nobelecon kaj ekonomie stabiliĝis tie, li ripetis la inviton, kiu trovis Komenion en fora Londono. Li eksciis el ĝi, ke unu riĉa armil fabrikisto volonte garantius vivtenokupon al kelkaj doktaj kaj piaj viroj en sia restadejo en Flinspang. "... mi Vin volonte konsiderus kiel unuan inter ili," skribis li al Komenio. "Estos tre agrable por mi, kiam mi ĝuos Vian ĉeeston, interparoladojn kun Vi, kaj se mi povos kontribui al Vi per ĉio bezonata..."

Johano Amoso bone sciis, ke nek la katolika Francujo, nek la luterana Svedujo estas por li la plej bona medio, sed Svedujo sin preparis al reformo de lerneja sistemo, la reĝina instruisto Jan Matthiae favoris la opinion pri instruado en patrina lingvo, kaj Janua la de Komenio en Stokholmo estis tre favorata. Kaj plue, Svedujo estis la ĉefa kontraŭulo de la aŭstria politiko, kaj ties favoro povis signifi ne nur materialan helpon al la ĉefaj ekzilitoj, sed entute renverson de la malfeliĉa eŭropa evoluo kaj vojon al savo.

Johano Amoso do preparis sin por reveno. Ĉar li, post la unua danĝera sperto sciis, ke la homa vivo ne estas sekura sur ŝipo en maraj ŝtormoj kaj ĉar li volis, ke estu konservitaj la ĉefaj ideoj naskitaj el traktado kun amikoj dum la Londona restado, li finis unue sian Via lucis kaj nur poste li preparis sin por nova migrado.

En junio 1642 li forlasis la anglajn bordojn akompanata de la juna Petro Figul kaj de John Dury, kiu denove veturis kun sia repaciga misio. Kun li kaj kun Hartlib Komenio kontraktis la tiel nomatan fratecan interkonsenton, laŭ kiu ili devis sin reciproke informi kaj entrepreni nenion por komunaj celoj sen antaŭa intertraktado. Ili reciproke promesis al si, ke ili revenos al la komencita verko, post kiam silentiĝos la militaj maltrankviloj. Komenio certigis Hartlib on, ke li devligos sin al neniuj kaj en la venontaj jaroj cedos nek de la pansofiaj pensoj, nek de la volo helpi al la mondo for el konfliktoj kaj konfuzoj.

Li mem al tio denove en pensoj revenis. Didaktikaj taskoj klaris por li: lernejoj, saturitaj de vana kaj senfrukta instruado, tio estis ebenaĵo prikreskita de dornoj kaj ĝin necesis favore al estonteco de ĉiuj estontaj generacioj ŝanĝi en ĝojan ĝardenon. Sed la restado en Anglujo profundigis ankoraŭ pli lian ekkonon, kiel oldiĝas la ĝisnunaj ideoj sistemoj, skuitaj de la klopodoj de reformacio kaj de la idealoj de renesanco. La nacioj suferis de perforto kaj de interna malharmonio, la aŭtoritateco de unu sola eklezio ne estis plu konservebla, kiel bremsilo efikis ankaŭ la rigora ideo limigiteco de la eklezioj protestantaj; pro tio li favoris ideojn ekumenajn, sopirojn pri la unuiĝo de la Kristanaro. Tio povis fariĝi kondiĉo por trovi fundamentojn de nova vivcerteco de la homaro en tempoj, kiuj ĉiam malpli similis al la historio de la pasinteco.

Kaj la senton de soleco venkis Johano Amoso per konscio, ke li estas por ĉiam ligita kun ĉiuj, kiuj ili parolu ĉiun ajn lingvon kaj diveni de ĉiu ajn sango portas en la animo la saman pasian deziron kiel li: konduki la homaron sur la vojon de saĝeco kaj amo.

MIGRADO DE HONORO KAJ ANKAŬ DE PARADOKSOJ

Tiun jaron estis Komenio en sia kvindeka jaro. Neskuita de suferado korpa nek de senĉesa spirita streĉo, li estis sur la supro de siaj kreaĵoj fortoj. La restado en Londono ankoraŭ plifortigis lian memkonfidon kaj deziregon igi la ideojn realaĵoj. Antaŭis lin bona famo, antaŭis lin liaj libroj kaj ilia gloro, kaj tial ĉie, kie li haltis dum la revena vojo el Anglujo, ĉu en Holando aŭ ĉu pli poste en Svedujo, li renkontiĝis kun intereso kaj respekto.

Hagon li ekkonis jam antaŭ dek kvar jaroj, kiam li ĉi tien venis kiel nekonata sendito serĉanta Frederikon Palatinatan, por transdoni al li favorajn antaŭdirojn. Hodiaŭ li alveturas kiel estimata verkisto, kaj instruisto de instruistoj. El la voĉo de tiuj, kiuj lin alparolis, sonis espero je liaj kapabloj: Heligu la ĉielon, ŝargantan la mondon per tenebro, dediĉu al ni donacon de via saĝeco, helpu nin.

En Lejdeno renkonte al li venis aro da klerikoj kaj profesoroj. Profesoro Golius havis por li ĝojan mesaĝon: lia frato ĵus sendis al li el la siria urbo Haleb leteron, en kiu li dankis por la "Pordego de lingvoj" kaj anoncis, ke la libro estas tradukata en la araban, turkan, persan kaj mongolan lingvojn. Vi ne estas nur inventisto de nova lingva metodo, eksciis ĉi tie Komenio, sed vi malfermas ankaŭ vojon de instruisteco al paganoj.

Akompanata de kelkaj amikoj, ekiris Komenio de Lejdeno al Endegeest, kie en kvieta kasteleto, ĉirkaŭita de akvofoso, loĝadis filozofo kaj matematikisto Rene° Descartes, nomata ankaŭ Cartesius (Karteziio). Li ofte ŝanĝis loĝejon, por ne esti ĝenata de la konatoj en obstinaj meditoj, kaj la spirita soleco estis por li samtempe delico kaj turmentado. Komenio ne ŝatis vanajn disputojn kaj konfliktojn, sed inter liaj amikoj estis sufiĉe da "kartezianoj" (ankaŭ de Geer estis favoranto de Descartes) kaj persvadis lin ekkoni la aŭtoron, kies fundamenta certeco estis nur propra pensado kaj kiu kredis al nenio, kion li mem ne ekkonis kaj ne nomumis. De siaj konatoj Komenio eksciis, ke Descartes favore akceptis liajn ideojn de pansofio, kiel ilin presigis Hartlib, kaj prijuĝante la verkon li proklamis, ke ĝia aŭtoro meritas honoron, kvankam li eble ie eraris.

La komenco de la renkontiĝo estis malvarma kaj sub signo de malkonfido, sed ĝi degelis, seriozeco kaj afableco de la ĉeĥa ekzilito efikis je fermiteco de Descartes, eble tial, ke sur li ankoraŭ pezis tristo pro antaŭ nelonge perdita kvinjara filino Francina. Li rememoris pri sia restado en Bohemujo: por ekkoni la mondon kaj homojn, li propravole eniris en armeon de la katolika ligo, sub ĝiaj flagoj li venis en Bohemujon kaj staris sur la Blanka monteto en la vicoj de la venkintoj. Kaj dum la ceteraj riĉigis sin en Prago, li klopodis elserĉi eminentajn kaj klerajn homojn, multajn tagojn li restis ĉe la astronomo Johanes Kepler, kiu lin super la memoraĵoj postlasitaj de Tycho de Brahe detale informis pri siaj esploroj rilate la movojn de la planedoj ĉirkaŭ la Suno. Ankaŭ Moravion li ekkonis kaj nun li renkontiĝis kun Komenio en homaj rememoroj; sed ili ne povis bone akordiĝi en opinioj filozofiaj.

Komenio estis homo de la renesanco, en filozofio li vidis porvivan bezonon, kaj ĉar li estis ĉeĥo, kiu tiom dolore spertis la ĝisnunan sorton de sia nacio, lia renesanca ĉiuflankeco estis bazita sur humanismaj tendencoj vivantaj inter la ĉeĥa intelektularo ekde la tempoj de Hus. Descartes jam estis filo de la 17 a jarcento, kiu sin dediĉis al preciza analizado de unuopaĵoj kaj por kiu la filozofio jam fariĝis vera scienco. Li koncedis kuniĝon de la Skribo kun homaj spertoj, sed li sin defendis kontraŭ kunigado de filozofio kun teologio kaj en tiu ĉi rilato li restis kontraŭulo de Komenio, por kiu la religia kredo kreskis el la vivo, al la vivo ĝi revenadis kaj akceptis etikajn kaj humanismajn elementojn. Malgraŭ tio Komenio ne povis akcepti fidon al la menso de unu homo, eĉ se tiu homo estus li mem; li povis aprobi nur la fidon al kapabloj de la homa saĝo, per kiu eblas

percepti eĉ la Dian revelacion. Sed tio ne estis disputo de furioza sektulo kun trofiera filozofo, ili atente aŭskultis siajn diferencajn opiniojn kaj fine ili akordiĝis ĉe plendoj pri malfacilaĵoj de scienca laboro, kontraŭ kiu la mondo kondukas malamike. Descartes konfesis, ke antaŭ nelonge post elperfortita revoko de la Kopernika herezo, kiun devis eldiri "arestito de la sankta inkvizicio" Galileo Galilei li prefere unu el siaj manuskriptoj neniigis. Ĉe la adiaŭo diris Descartes al Komenio paceme: Mi ne transpaŝas la limojn de filozofio. Ĉe mi ĝi verŝajne estas parto de tio, kio ĉe vi formas la tuton.

En Komenio lasis tiu ĉi renkontiĝo profundan impreson. Kaj kiam li pli poste dediĉis al Descartes kritikan atenton, li lernis ĉe li postulon de klareco kaj precizeco, kaj impresita de filozofiaj pruvoj de Descartes li reverkis kelkajn siajn pansofiajn manuskriptojn.

En Amsterdamo, urbo de kanaloj, de stretaj domoj kaj de seninterrompa havena trafiko, restadis la rememoroj de Komenio el tempoj, kiam li foje estis veninta ĉi tien kiel junulo kun miroplenaj okuloj kaj emociĝema koro, ankoraŭ kiel studento de akademio de Herborn. Nun lin ĉi tie bonvenigis Laŭrenco de Geer, la plej aĝa filo de la riĉa industriisto, estis ĉi tie la edukisto de Laŭrenco Hotton, estis ĉi tie palatinata pastro Jan Ruĝltz, konfidato de Geer. Ĉe ili povis Komenio distingi ne nur estimon kaj ĝentilecon, sed ankaŭ sinceran interesiĝon, ĉefe ĉe la juna Laŭrenco. Nevolonte li forveturis de ĉi tie. Ŝajnis al li kvazaŭ tra ĉi tiu urbo, kuraĝe konstruita sur arbaro de palisoj super malprofundaĵoj kaj sabloj, senĉese blovas de la maro la vento de libereco.

Post holandaj urboj venis la germanaj. En Bremeno atendis Johanon Amoson nova tento. En la latina lernejo studadis nome multaj ĉeĥoj, kiuj poste ofte restis en la urbo. Aron da ili alkondukis la kuracisto Jan Koza^ok el Horaĝdovice, kun ili venis ankaŭ instruistoj kaj ili akordiĝis en deziro: Akceptu gvidadon de nia lernejo! Li estis kortuŝita de ilia fido sed ĉu li povis perfidi sian mision?

Ankaŭ en Hamburgo anonciĝis amikoj inklinaj al liaj ideoj. Ĉi tie instruis eminentaj profesoroj Jung kaj Tass, kaj Komenio anticipe provis certigi ilian kunlaboron por la verko pri la universala scienco.

Sur plua vojo en Lubeko lin rekonis la nobeloj de Malgrandpolujo, anoj de anti Trinitata religio, kaj per promeso de altaj rekompencoj kaj atakante lian prijuĝemon, ili provis deturni lin de la vojaĝo en Svedujon. Li bezonis ĉiam pli da firmeco por povi rezisti ĉiujn promesplenajn tentaĵojn, kvankam ĉi tiuj turniĝis al lia bonfamo kaj fontis de sincera estimo.

La navigado en Svedujon estis trankvila.

En Norrko"ping lin bonvene salutis ĝis nun nekonata lando, nova lingvo, novaj homoj. Li sciis, ke ĉi tie plu oni decidis pri la estonteco de lia vivo kaj verko, eble ankaŭ pri la estonteco de lia nacio, sed ĉar en la korespondado kun Hotton vidiĝis neniue certa devligo por Ludoviko de Geer, Komenio ja venis en absolutan necertecon. Li tamen sentis, ke li enpaŝas sur la svedan bordon kiel sendito de la tuta ĉeĥa nacio, kvankam lin neniue nomumis tia, kaj ke tial tiom pli grandas lia respondeco.

La renkontiĝo kun Ludoviko de Geer, kiu en Norrko"ping kontrolis surŝipigadon de armiloj, lin iom trankviligis. Potenco kaj meditema armilfabrikisto lin certigis, ke la svedoj vidas en li saĝan reformiston de lernejoj, kaj ke ankaŭ por la luteranoj havas la indiko "husano", kiel oni nomas lin, bonan eĥon, kaj ke ne temas pri senfruktaj disputoj, sed pri praktika helpo. Ĉar oni ĝuste pritraktis la eblecon de edziniĝo de la juneta reĝino Kristina al la brandenburga princo elektisto Frederiko Vilhelmo, kaj liaj senditoj venis por peni forigi kelkajn religiajn malkorektaĵojn inter la gefianĉoj, problemo de kreo de forta evangelia grupiĝo estis grava ne nur por svedoj, sed ankaŭ por ĉiuj, kiuj atendis ion de la pripacaj traktadoj, kiuj estis venontaj; ĉi tio povis signifi multon kaj por evangelianoj en Germanio, kaj por la samaj en la aŭstria landoj.

En O"rebro", ĉarma loko sur la lago Hjalmarena estis al Komenio permesita la feliĉo renkontiĝi kun la juneta reĝino. Ŝi flue alparolis lin latinlingve kaj certigis lin, ke ŝi ĝin ellernis el lia lernolibro. Ŝia instruisto Jan Matthiae estis influhava subtenanto de klopodoj de Komenio; tial li preparis lin ĉefe por interparolo kun kanceliero Oxenstierna, de kies rezulto ĉio dependos.

La renkontiĝo kun "La Aglo de la Nordo" Axel Oxenstierna okazis en Stokholmo. La batalema politikisto estis jam multajn jarojn animo de Svedujo kaj signifis por ĝi pli multe ol ĝiaj reĝoj. Dum kvar septembraj tagoj li aŭdiencigis ĉe si Johanon Amoson, kaj la interparoloj, kiujn ili havis en la kancelierejo kaj fine en lia domo, estis elĉerpaj kiel universitataj disputoj. La kanceliero, kiu jam transpaŝis sian sesdekan jaron de la vivo, scipovis akre rigardi la eŭropan politikan situacion, trovadis kaŭzojn kaj divenis sekvojn; liaj konkludoj estis kvazaŭ el metalo. Pri mankoj de svedaj lernejoj li estis konvinkita; li jam studis opiniojn de Ratke, sed kiel li esprimis sin li kredis pli al Komenio, ĉar liaj proponoj estis kompletaj kaj sistemaj kaj liaj lernolibroj modelaj; tial li jam igis la regnan konsilantaron aprobi lian komision reformi ĉiujn lernejojn en la reĝolando. Sed pro tio Komenio ektimis: sincere li konfesis al la kanceliero, ke kiel fremdulo li eble ne estus bonvena ĉe ĉiuj tavoloj, kaj la envio de enlandaj pastroj kaj profesoroj povus bari la vojon al bone intencita laboro. Oxenstierna la antaŭvideman objeton agnoskis kaj tial li devligis Komenion almenaŭ per promeso helpi al tiuj, kiuj estos komisiitaj fari la tutan reformon. Ĉar antaŭ ĉio mankis bonaj lernolibroj, promesis Komenio, ke li ilin

sen kunlaboro de pluaj sciencistoj ellaboros. Ili kontraktis plue, ke Ludoviko de Geer ebligis al Komenio ekloĝi en Elbląg, ne malproksime de Gdansk, en urbo, kiu por certa tempo apartenis al svedoj. Dum la traktadoj Komenio konsciis bone, ke estas grave certigi al si kun la svedoj plej intiman rilaton por havi rajton por ilia bona volo.

Sed kion fari kun la promesoj al la anglaj pansofiistoj? Kion kun la skizoj de grandioza verko por rebonigi la mondon? Ĝis nun li sekretigis ilin antaŭ Oxenstierna. Nur la lastan tagon, mallonge antaŭ la adiaŭo, li menciis pri ili. La kanceliero estis forta rivalo kaj tro bone li konis la fonon de la politiko de potenculoj, por ke li povu ekkredi, ke pli bona epoko sur la mondo estos restarigita per interveno de Dia povo. Komenio akceptis la opinion de la kanceliero, ke sen la homa diligento nenio en tiu ĉi mondo ŝanĝiĝos, sed li konvinkis lin, ke devas veni epoko de trankvilo kaj bono, por ke estu eble saĝe regi la mondon kaj doni al la homoj bonfarton, kiun ili meritas. Lia entuziasmo impresis la kancelieron. Espereble ni foje akordiĝos, li koncedis ĉe la adiaŭo, ĉar ankaŭ al mi ŝajnas, ke por la homaro restas neniu alia espero.

Sed tio estis privata starpunkto de Axel Oxenstierna en amika interparolo. Fakte li ne deziris, ke Komenio okupiĝu je planoj pri universala scienco, pri kunpaciĝo de eklezioj kaj pri tutmonda korporacio de sciencistoj. En la politiko li kredis nur je forto. Li skribis por Komenio propramane longan rekomendan leteron ke eĉ sinjoro de Geer miregis pri la favoro, sed li persistis, ke la ĉefa sciencisto dediĉu sin sole kaj sole al planoj didaktaj. Por la laboro pri lernolibroj, plenumitan en Elbląg, devis sinjoro de Geer kiu cetere tre ekŝatis Komenion pagi al la ekzilitoj en Leŝno kaj al iliaj fratoj en Hungarujo altan sumon kiel subtenon.

Komenion konsolis, ke per sia laboro li tiel almenaŭ nerekte helpas el mizero al siaj samgentanoj. Sed la devontiĝo, kiun li akceptis, lin peze premis. Li volis plenumi ĝin, li imagis la novajn lernolibrojn plej perfektaj sed ĉu restos al li inter tiom multa laboro tempo por realigi tion, kion li komencis plenumi en Anglujo?

Li dronis en maltrankviligaj antaŭsentoj, li kalkulis la tempon, la monatoj kreskis al li anticipe je jaroj. Kaj li sciis, ke la vivo rapidas kaj la historio ne atendas.

La ŝtormo, kiu dum la tuta navigado el Svedujo al la prusaj bordoj akompanis lian velŝipon kaj minacis ĝin frakasi, kvazaŭ estus fortimiga antaŭsigno de la futuro.

LUKTO KUN LA TEMPO

La regiono ĉirkaŭ Elbla,g estis la plej agrabla el ĉiuj, kiujn Johano Amoso ekkonis en la pola lando: strioj de fruktodonaj kampoj, ombraj montetoj, dometoj kun ĝardenoj. Karaktero de kampara pejzaĝo rememorigis al li la naskan Moravion, same la homoj. La urbo havis silentan kaj trankvilan aspekton; kalvinistoj vivis apud luteranoj kaj la pastroj ricevis malpermeson inciti religianojn unujn kontraŭ la aliaj. La urba konsilistaro akceptis Komenion kun honoro kaj destinis al li por loĝado komfortan domon. La konsilistoj certigis lin, ke kvankam la urbo estas sub sveda influo, ĝi estas fiera je sia pasinteco de bataloj kontraŭ la prusaj kavaliroj kaj ke ĝi proklamas sian apartenon al la pola krono.

Li deziris saluti la ĉefajn familiojn en Leŝno. Tie li ankaŭ transdonis duonon de la donaco de Geer, duonmilionon da taleroj, la saman sumon li sendis al Hungarujo. Li plilongigis sian liberigon de ĉiuj devoj kaj kun la familio li venigis al Elbla,g ankaŭ kvar junajn helpantojn, el kiuj li plej multe fidis al Petro Figul.

Li sciis, ke se li devas honeste plenumi siajn devligojn por Svedio, kaj promesojn por Anglio, kiuj interne ankoraŭ pli valoris por li, li devas iri samtempe du vojojn kaj ĉiun kun plene ebla oferemo. Tial li faris ion eksterordinaran: kvankam la skribaj kontaktoj kun la amikoj lin ĉiam ĝojigis kaj fortigis, li rezignis je ili kaj elpetis de ili unu jaron de silentado. Li esperis, ke tio ĉi eble faciligos al li koncentritan komencon de la laboro. Sed navigante trans la maron, li ankoraŭ ne supozetis, kiel li ne eraris en siaj malbonaj antaŭsentoj, kaj per kiom multaj manieroj estos tentata lia disciplinemo en la silenta kaj trankvila Ebla,g, kio ĉio rabos lian tempon ĉiam pli valoran.

La unua maltrankviligo ne lasis longe atendi je si. Dank^o al fido de la urbo posedanto grafo Do"nhoff kaj toleremo de Elbla,ganoj loĝis ĉi tie ankaŭ predikisto de la reformita eklezio Bartolomeo Nigrin, kiu akiris famon en tio, ke en kvartaga disputacio li superatutis la faman kapucenon Valerian Magni; li ricevis subtenon de la pola reĝo kaj ordinare li akceptis de li taskon traesplori kondiĉojn de repaciĝo inter la evangelianoj kaj envicigon de protestantaj religioj en la religion katolikan. Tuj kiam Komenio ekloĝis en la urbo, Nigrin vizitis lin kaj omaĝis al li; sed tuj poste li primokis la mon subtenon, pagataan al li de sinjoro de Geer, kiel almozon kaj proponis al Komenio kvaroblan salajron, se li eniros en la servojn de la pola reĝo. La tento ne efikis je Komenio, sed li maltrankviliĝis vidante la sinvendemon de la homo ĝuanta inter evangelianoj konsiderindan gloron.

Li ne eraris. Kontraŭ avantaĝa posteno en servoj al la reĝo lasis sin Nigrin akiri unue por sekreta, sed baldaŭ por publika konvertiĝo al la katolikismo. La

evangelianoj sentis sin trompitaj, la katolikoj primokis ilin kaj Komenio sentis moralan devon interveni. Li provis revenigi Nigrinon al bona vojo, vizitis lin, skribis al li ekscititajn leterojn. Apostateco ĉu tio estas via vojo al unuiĝo? li demandis lin. Tiu ĉi afero kostis multe da tempo kaj streĉo por Komenio, sed lia klopodo estis jam vana.

Kun tiu ĉi evento kuniĝis alia same ekscita. De Nigrin ricevis Komenio libron de Valerian Magni, en kiu la dokta kapuceno penis prui la neeraremon de la katolika kredo. La libro ludis ĉe apostatiĝo de Nigrin certan rolon, kaj pro tio estis necese konstrui ĝustatempe baron kontraŭ ĝia danĝera influo; tion devis preni sur sin denove Komenio. Dum noktoj li skribis duvoluman respondon, sed subskribis ĝin per pseŭdonimo (Ulricus de Neufeld), por ne inciti svedajn, nek anglajn favorantojn al riproĉoj, ke li ne dediĉas siajn fortojn al la kontraktitaj taskoj. Kontraŭ la opinio de la kapuceno, ke en la aferoj de religio apartenas decidado sole al Romo, li defendis rajton de ĉiu kristano pri la libereco de la konscienco. Sed la personan polemikon li altigis kiel ĉiam je nivelo de paca misio:

Dezirindas, ke estingiĝu militoj, ke revenu paco kaj akordo al la mensoj, al la eklezio kaj al la mondo... (Kiu scias, ĉu tiu ĉi disputo ne havis influon je Valerian Magni. Estas interesa ludo de sorto, ke tiu ĉi eminenta kontraŭulo de jezuitoj fine akceptis la opiniojn de Koperniko kaj en la jaro 1681 li mortis en Salzburg kiel arestito de papo survoje al juĝejo).

En tempo de la disputoj mortis la aŭguristino Poniatowska; ŝi ĝisvivis la vintron de sia vivo kiel zorgema edzino, kiu edukis al sia edzo, pastro Vetter, kvin infanojn. Ŝiaj profetaĵoj estis forgesitaj. Anstataŭe ekzaltis Komenion profetaĵoj novaj, kiuj venis el la slovaka urbo Lednica: ilia aŭtoro estis iama amiko Nikolao Drabiĉk, kiu intertempe ĉar li fordonis sin al drinkado kaj eĉ komercis kun vino estis ekskludita de pastra ofico. Komenio unue estis de liaj profetaĵoj eldiroj surprizita, eĉ indignita; sed kiam li ekzamenis ilin detale, multajn el ili li trovis veraj.

La grupiĝo de politikaj fortoj en Eŭropo nome iom ŝanĝiĝis pro tio, ke mortis kaj Richelieu kaj lia reĝo Ludoviko XIII, la alianceto de Francio malfortiĝis, kaj la svedoj klopodis krei tutprotestantan blokon. Ili komencis malpacienti pro la rezultoj de laboroj de Komenio, tiom pli pro tio, kiam ili eksciis, ke li kiel honora ano de profesora kolegio promesis prelegi en la urba lernejo de Elblago kaj ke kelkaj nobeloj devoligis lin lecionoj al iliaj filoj. Ili demandis pri la dato de la finpretiĝo de la lernolibroj. Komenio tiam sendis en Svedion Figulon, sed ne nur por klarigi, kiel progresis la laboro pri la lernolibroj; li ankaŭ devis demandi, kiel Komenio kondukis en la situacio, kiu ekestis post la duelo kun Nigrin, kaj li kunportis ankaŭ liajn sekretajn leterojn pri la procedo kontraŭ la eklezia displitiĝo kaj pri la estonta aranĝo de la mondo. En Osnabruck oni jam nome

komencis trakti pri fina repaciĝo post la elĉerpa milito kaj Komenio volis rememorigi al la sveda diplomatio la promeson, ke ĝi advokatos por la reveno al la politikaj cirkonstancoj de la jaro 1618; li deziris, ke ili ne forgesu pri la ĉeĥa afero. Li mem restis en Elbla,g por plu daŭrigi kun siaj helpantoj penegan lukton kontraŭ vortoj kaj suferis pro riproĉoj de Samuel Hartlib, kiu ne scipovis kompreni, ke Komenio devoligis sin por tia streĉa laboro nur pro tio, ke li gajnu ĉe Oxenstierna simpatiojn por la sklavigita ĉeĥa nacio. Kiam Hartlib eksciis, ke Johano Amoso dediĉas sin al verkado de lernolibroj kaj preteratentas la pansofion, li skribis al li kun konsterniĝo: "Kien vi enabismiĝas, mortemulo?"

Nova granda obstaklo falis sur la vojon de Komenio, kiam la pola reĝo Vladislav en kadro de sia unueciga programo kunvokis en Torunon la sejmon, kiu estis garantonta kunpaciĝon de ĉiuj eklezioj en Pollando. Evangelianoj invitis Komenion al antaŭkonsiliĝo en la litovan Orla. Ĉu li povis eviti la kunvenon, kiam li arde deziris la repaciĝon kaj tiom multe jam faris por ĝi? Li prezentis sian kontribuon en la kunsido kun tia decidemo, ke li tuj ricevis de princo Radziwill inviton al Litovujo, eĉ kun garantio, ke li povus dediĉi sin ankaŭ al planoj pansofiaj. Li devis rifuzi kaj revenis al Elbla,g, por daŭrigi la laboron; sed la maltrankvilo de la ekleziaj polemikoj tiris lin plu en sian vorticon. Por la sejmo en Toruno preparis sin ambaŭ partioj kvazaŭ al batalo: katolikoj intencis rekonduki la evangelianojn en la sinon de la papa eklezio, la evangelianoj male esperis defendi siajn privilegiojn. Komenio ĉeestis la inaŭguron de la kongreso; sed kiam montriĝis, ke en la kontraŭaj tendaroj ne estas sufiĉe da bona volo kaj kiam la traktado renversiĝis en koliziojn de neakordigeblaj opinioj kaj intencoj, konsternita li forlasis Torunon sen espero je pliboniĝanta situacio. Krom tio, ke li perdis multe da valora tempo, li renversis sur sian kapon denove malfavoron de la svedoj, kiuj intertempe denove gajnis aliancon kun Francio kaj tial perdis denove intereson pri tutprotestanta grupiĝo.

La riproĉoj vere ne malfruiis kaj estis ĉiam pli akraj; al Oxenstierna fidanta je forto de la sveda glavo, ne konvenis la repacigaj ekleziaj provoj, kaj sinjoro de Geer estante sub lia influo ankaŭ esprimis malkonsenton pri prokrasto de eldono de lernolibroj. Komenio sentis sin sub tiu ĉi premo ofte humiligita kaj ne plenrajta kaj plendis pri fallaciga laboro, kiun oni en Svedio eble eĉ ne kapablas imagi. Li eĉ rezonis pri ideo rezigni pri la kontaktoj kaj fuĝi en silenton de privateco, en kvieton, kiu ebligus al li anstataŭ la didakta dornejo

kulturi tiujn stimulojn, kiuj por li gravis pli multe. Sed li konvinkis sin mem, ke pri la plibonigo de la homaro estos eble pensi post la Dia juĝo, tio estas post la sveda venko, en pacaj kontraktoj, kaj tial li denove revenis al la honesta plenumo de la promesoj. Li jam delonge sciis, ke la ŝarĝo, kiun li akceptis, superas la homajn fortojn, sed malgraŭ tio li ne volis transdoni nur nefinitajn skizojn. Mi malamas ĉion supraĵan, li eksplikis la longdaŭrecon de laboro, ĉion

stumpan kaj konstruata sen fundamentoj. Kvankam la noktoj travivitaj en arbaroj kaj en malvarmaj kaŝejoj anonciĝis per kruelaj doloroj en la artikoj, paralizantaj la forton de la korpo, li ne laciĝis en la laboro kaj finis la plej gravajn ĉapitrojn en definitiva formo. Krom tio li dediĉis sin ankaŭ al kompleta reverkado de sia Pordo de lingvoj apertita, lernolibro entenanta cent ĉapitrojn kaj mil frazojn, li transdonis por preso en Elblago multe pli perfektan version, ol en la unuaj eldonoj.

En la jaro 1646 li mem forvojaĝis en Svedion por prezenti en Stokholmo la komencon de la verko *Methoda linguarum novissima* (La plej nova lingva metodo). La komisiono destinita por ekzameni la verkon eldonis recenzon, ke temas pri eminenta pedagogia verko.

Malpli agrabla estis la renkontiĝo kun la kanceliero Oxenstierna. La episkopoj, ĵaluzaj je komisiono de Komenio, lin akuzis pro kalvinismaj deflankiĝoj, pro lia partopreno en la Toruna kongreso, kaj Johano Amoso vane klarigis al la ĉefkanceliero, ke la Unuiĝo, kiu en Pollando trovis la rifuĝejon, ne povis rifuzi la alvokon de la reĝo. Reĝino Kristina estis pli afabla; ŝi eĉ proponis, ke Komenio transloĝiĝu en Svedion. Ankaŭ Ludoviko de Geer subtenis tion, ĉar li deziris havi Johanon Amoson en sia proksimeco. Sed severa ordono de Oxenstierna resendis Komenion en Elblago. Li forveturis senigita de imago, ke per la lerneja reformo li povus utili al la religia paco, kaj humiligita pro ekscio, ke en la svedaj lernejoj plu validos la malnova ordo.

Li revenis al sia malfacila laboro, kiu amariĝis ankoraŭ pli pro ĉiam pli mizera vivo, per kiu suferis lia familio kaj liaj helpantoj. Ludoviko de Geer, ŝancelita en sia fido, prokrastis sendadon de la subteno. Ne ekzistis alia vojo ol repuŝi dume la ideon pri granda pansofia verko, kiu devus kunvoki al la kunlaboro la plej saĝajn virojn kaj stimuli ilin por la provo rebonigi la mondon kaj skribi, skribi tage nokte kaj fini antaŭ ĉio la lernolibrojn por la svedaj lernejoj. Alie ne estis eble porti ŝarĝon de respondeco kaj devigi Svedion respekti la nacion de tiuj, kiuj por ili tiom ofereme laboris.

MALBONAŬGURA PACO

Pasis preskaŭ dudek jaroj de la tago, kiam Komenio kun siaj kunuloj forlasis la patrujon. Nekonata pastro fariĝis kreinto de admirata instrumentado, preparanto de nova filozofio, viro estimata de la sciencistoj kaj politikistoj. Sed kio estis ĉio ĉi kompare kun la ŝanco, ŝanco malfermiĝanta, kiam finfine estingiĝadis la flamoj de la milito, kaj la elsangintaj landoj vokis pri justa paco. La nostalgio pri la patrujo ne forlasis la ekzilitojn. Multaj ekzilitoj jam mortis, sed ilia lasta elspiro estis la vorto espero. La gepatroj per ĝi vivnutris siajn adoleskantajn

gefilojn. Iliaj filoj fordonadis por ĝi siajn vivojn en fremdaj regimentoj. Kaj nun fine la milita supereco decide klinis sin al la flanko de Svedio kaj Francio. Generaloj Banner, Torstenson kaj Wrangel venkadis la imperiestrajn, kaj la svedaj kaskoj jam brilis super la piedpremitaj kampoj de Bohemio kaj Moravio. La ekzilitoj kortuŝite ripetis la vortojn de Oxenstierna, ke la evangelianoj ne estos plu en la eŭropaj landoj nur tolerataj, sed ke ili devas fariĝi iliaj plenrajtaj civitanoj. Ĉiuj sekvis la traktadon pri la paco en Munster kaj Osnabrück kun angora atento. Ĉu fine oni redonos la liberecon al la ĉeĥaj landoj?

Ĝojaj mesaĝj anoncis, ke la generalo Koenigsmark jam ekstaris antaŭ Prago kaj konkeris la Kastelon; alia sveda armeo staris en la sudo de Bohemio.

Sed informoj pri la pactraktadoj forbruligis la esperojn kiel kruela frosto tro fruajn florojn. Taŭbor, pri kies forto la ĉeĥoj esperis, malrapide disfalis. La holandanojn ne plu minacis la hispana superforto. Francio okupiĝis pri siaj internaj konfliktoj. La germanaj protestantoj interesiĝis nur pri la propraj avantaĝoj. Kristina, malpacience sopiranta la regadon sen kuratorado de la kanceliero, insistis pri paca interkonsento, ĝi kostu kiom ajn, kaj Oxenstierna perdadis la influon; cetere lia interesiĝo pri la laboro de Komenio kaj pri la sorto de la ĉeĥaj elmigrintoj estingiĝis. La katolika partio ekvidis sian ŝancon, cedis de la religia linio kaj limiĝis je politikaj traktadoj. Tio permesis al la senditoj de imperiestro Ferdinando III, kiu sekvis spurojn de sia patro, resti surdaj al mencioj pri la ĉeĥaj landoj. Ĉiam pli akre konturiĝis terura eventualo, ke la politika situacio similos al la jaro 1624, al la situacio post la batalo sur la Blanka monteto, kaj per tio la sorto de la ĉeĥoj estus forsigelita.

Post morto de episkopo Justin la Unuiĝo elektis Komenion kiel lian anstataŭanton; li do devis forlasi Elbląg kaj transloĝiĝi denove al Lešno. Li decidiĝis por tio kun trankvila konscienco, sed treege deprimita; la celo de kelkjara peza laboro estis denove neniigita, estis senutile, ke li servu plu al la svedoj, kiuj lin preterlasis.

La reveno al Lešno estis turmentoplena. Lia edzino Dorotea grave malsaniĝis; ŝi kuŝis sur veturilo, la vizaĝo pala, la okuloj fermitaj, ĝemado. Kun Johano Amoso ŝin flegis la tri filinoj; la plej juna el la infanoj, Daniel, premis sin al la patrino, kaj ne komprenis ankoraŭ, kio okazas. Sed la rigardoj de la knabinoj estis malklarigitaj pro zorgemo, ĉar ili sciis legi en la vizaĝo de la patro kaj en ĝiaj profundigitaj sulkoj; ili komprenis, ke mortas ilia patrino, kiu al ili oferis ĉiujn fortojn de sia vivo, ke ili perdas la hejmon, kiu varmigis, eĉ se blovis en ĝin malvarmaj ventegoj, ili komprenis ankaŭ, ke estingiĝas la espero pri la reveno en la patrujon, kiun ili ja ne konis, sed kies lingvon al ili lernigis paroli la gepatroj, instruante al ili sopiri pri ĝi.

Baldaŭ post la reveno al Leŝno sinjorino Dorotea mortis, kvazaŭ ŝia vivo hezitus submetiĝi al nova peza doloro. Ĉar la informo pri la paco Vestfalia signifis por la ĉeĥaj ekzilitoj tragikan certecon, ke la habsburga malamiko restos mastro de ilia patrolando. La ŝtatoj, kiuj finmilitis, faris reciprokajn iomajn cedejn. Svedio ricevis Bremenon kaj Pomerion, Francio Alzacon, Bavario la Supran Palatinaton. La evangelianoj en la germana regno fariĝis egalrajtaj kun la katolikoj, kaj eĉ al la filo de la "vintra reĝo" oni redonis la rajton de princo elektisto. La danĝero de la Habsburga superforto estis forigita, sed en la ĉeĥaj landoj ne cedis la ŝargô de ilia perforta regado eĉ je unu spano. Eŭropo ne helpis al la lando de Hus. Kaj la lando, dezertigita, senigita de duono de sia loĝantaro kaj neesprimeble suferanta de la spirita opreso, fariĝis denove valorajo por elaĉetado.

Komenio, kiu je kosto de pluraj siaj vivjaroj donacis al la svedaj lernejoj novajn lernolibrojn, konsternita, prenis la plumon kaj skribis al la kanceliero Oxenstierna leteron, en kiu li rememorigis al li liajn promesojn, kaj plendis, kiel la ĉeĥoj estas forlasitaj. Ĉu estas juste, demandis li, se la ĉeĥa nacio per sia oferemo haltigis la atakon de Antikristo kaj mem ĝi falis, por ke la ceteraj prenu la instruon kaj prepariĝu? Sed ĉio estis vana, por Eŭropo gravis la trankvilo kaj ne la justeco. La stelo de la libereco, kiun la ekzilitoj dudek jarojn atendis, subiris, apenaŭ aperis ĝia pala ekbrilo. La ĉeĥaj landoj restis en la Habsburga sklaveco kaj iliaj plej bonaj filoj plu vagos tra la fremdujo. En pokalon de amareco, kiu jam ŝajnis senfunda, falis novaj gutoj de galo.

Post ĉio, kion li faris, Komenio sentis sin pli amare perfidita ol ĉiuj ceteraj, kiuj nur atendis kaj ne preparis la aferon de savo per siaj propraj manoj kiel li. Sed eble tial, ke li jam de la tempoj en Brandy's lernis tiom malmulte zorgi pri la propra prospero kaj per la tuta animo li kunfandiĝis kun la ideo savi la Unuiĝon kaj la nacion, estis ankaŭ lia heroa sindonemo senmezura. Li denove akceptis la zorgon pri la lernejo kaj pri la junaj pastroj. Li surprizis ĉiujn per sia insista postulado de la disciplino, kiu frakasiĝis sub la battoj de la elreviĝoj. Li haste preparis por presado la verkon de la pola pastro Lasitski pri la historio de la Unuiĝo, por ke la Fratoj lernu el ĝi la firmecon. El profundo de sia propra estaĵo li ĉerpis la lastajn rezervojn de fortoj kaj rektigis aliajn per sia ekzemplo kaj helpa faro. Kaj nur liaj filinoj kaj plej proksimaj amikoj lin vidis en la momentoj de la izoleco, kiam li longe restis sen movo kaj kun la vizaĝo ŝtoniĝinta de tristego, kun la okuloj rigardantaj en tenebran futuron.

Kaj poste li denove ekprenis la plumon. Li ankoraŭ havis antaŭ la okuloj la vizaĝon de la mortanta Dorotea. La maljusteco de la historio premis lian koron kaj trudis al li malbonaŭgurajn antaŭsentojn. Li komencis skribi libron nostalgian kaj varmegan, kiun li titolis Testamento de la mortanta patrino, la Unuiĝo de ĉeĥaj fratoj. Li imagis sian eklezion kiel patrinon, kiu vokas al sia

mortlito la infanojn, por adiaŭi ilin kaj disdoni al ili sian heredaĵon. En la unuaj linioj estis malĝojo, sed poste ekpostenis la firmeco kaj la imago pri futuro. La patrino Unuiĝo konsolis la fidelulojn, al la malfideluloj ŝi ordonis rekonsciiĝi, konsilis la disciplinemon kaj modestecon kaj antaŭ ĉio la akordiĝon, kiun ŝi heredigis al ĉiuj eklezioj evangeliaj. Al sia nacio ŝi donis kiel heredaĵon la amon al la vero, zorgon pri kulturado de la gepatra lingvo kaj sopiron pri bona edukado de la junularo. Sed kiam Komenio proksimiĝis al la fino kaj estis fermonta la Testamenton, ekscitiĝo trudis en lian plumon preĝon, frustratan el lia plej ardanta interno. Li ne povis akordiĝi kun la imago de pereco, li superis sian malgajecon kaj lia espero denove fortis pli ol la afliktiĝo. Li skribis:

Ankaŭ mi kredas al Dio, ke post forpaso de ventegoj de kolero la regado de viaj aferoj denove revenos al vi, ho popolo ĉeĥa....

De la momento, kiam li legis ĉi tiujn vortojn al la unuaj amikoj, ili fariĝis sorĉa formulo, heredata de generacio al generacio dum jarcentoj.

Kiam la reprezentantoj de la Unuiĝo kunvenis en Lešno, post la deklaro de la malbonaŭgura paco, ili meditis, kion fari. Sur ĉiuj horizontoj staris nigraj nuboj de necerteco. Kion fari? Kelkaj proponis, ke la Unuiĝo disiĝu kaj ke ĝiaj anoj intermiksiĝu kun fremdaj nacioj; sed plejparto de ili bedaŭris nuligi la ligan, kiu tiel heroe transvivis du jarcentojn de bataloj. Kaj, ĉar la reprezentantoj de la korporacioj el Hungario ne venis al la kunveno, estis al Komenio, kiel al viro ĝuanta plej altan fidon, konfidita nova tasko: forvojaĝi en Hungarion kaj anonci tie ĉie la decidon konservi la Fratecan Unuiĝon. Li estis plenrajtigita, ke li nomumu novajn seniorojn kaj aranĝu la ordon en la tieaj slovakaj korporacioj laŭ sia bontrovo.

Li akceptis la taskon obeeme kiel ĉiam. En la slovakaj regionoj li havis multajn konatojn, kiuj fuĝis tien el Moravio kaj kiujn li dum kvaronjarcento ne vidis. En Hungarion stimulis lin ankaŭ la invito, kiun li ricevis de la juna transilvania princo Zikmundo Rakoczi; ĉar la peto koncernis konsulton pri aferoj lernejaj, subtenis ĝin ankaŭ letero de la direktoro de lernejo en Sa ospatak (Ŝlimrivereto), Johano de Tolnai, konato de Hartlib.

Johano Amoso devis unue dediĉi sin al rearanĝo de siaj malkontentigaj familiaj kondiĉoj. Por povi konfidi al iu zorgon pri la hejmo de siaj infanoj, li eniris en trian edzecon, kun Johana Gajus, filino de la ĉeĥa paroĥestro el Ty^on, kiu trovis la rifuĝejon en la holanda Kempeno. Johana estis trankvila kaj kvieta virino, kiu volontis porti la ŝarĝon de la zorgo pri la familio ankaŭ la ŝarĝon de soleco, kiu ŝin atendis. Ambaŭ plej aĝaj knabinoj cetere baldaŭ forlasis la hejmon. Al Elizabeta edziĝis fidela disĉiplo de Amoso kaj lia juna amiko Petro Figulus, Dorotean Kristinan forkondukis Johano Molitor, filo de la paroĥestro en Pu^ochov. Lia patrino estis Johano Laneci, promesata iam dum la studado en

Přerov al Johano Amoso: ambaŭ familioj do kuniĝis almenaŭ en la sekva generacio.

En printempo de 1649 Komenio ekvojaĝis; ĉu li migros ĝis Rakoczi, tian decidon li lasis al la interkonsiliĝo kun la Fratoj en Slovakio. Ĉie li trovis bonajn konatojn el la junaĝo. En Skalice lin atendis kunveno de frateklezia moravia nobelaro, en Pu°chov korporacio de la ekzilitaj pastroj. Kaj ĉiuj rekomendis al li akcepti la inviton al Transilvanio; ja la lasta duko, Georgo I, ekstaris al batalo kontraŭ la Habsburgoj ĉeflanke de Svedio kaj Francio kaj li gajnis la liberecon por la protestantoj en Hungario. En Pu°chov ankaŭ aperis antaŭ Komenio Nikolao Drabi°k kaj prezentis al li siajn novajn profetaĵojn. Komenio riproĉis lin pro trompo kaj rifuzis lin, ĉar multaj aferoj de liaj iamaj profetaĵoj ne plenumiĝis. Sed Drabi°k lin persvadis kun ploro, ke li ne povas defendi sin kontraŭ siaj propraj profetaĵoj kaj ke en ili ne troviĝas trompa intenco; kun certeco li antaŭ ĉio asertis, ke Rakoczi fariĝos reĝo.

Komenio daŭrigis sian vojaĝon kaj post naŭ tagoj li atingis Sa°rospatak, urbon kuŝantan sur rando de la granda hungara ebenaĵo, ĉe piedoj de vitodonaj deklivoj; super la komunumo levis sin bela kastelo. Ĉie en la urbo kaj en la lernejo, en kiu antaŭe aktivis liaj estintaj instruistoj Alsted kaj Piscator kaj por kiu estis eldonataj prese liaj lernolibroj, li estis akceptata kun ĝoja estimo. Princino Suzana, vidvino de princo Georgo, deziris suprenlevi la edukadon en la lando, subevoluinta pro centjara milito kontraŭ la turkoj, kaj ŝian deziron samsentis la pli juna filo Zikmundo, okupiĝanta pri fiziko kaj astronomio; li kaj lia patrino postulis de Komenio, ke li ekloĝu en Sa°rospatak kaj provu tie konstrui novtipan lernejon. Ankaŭ Tolnai kaj aliaj instruistoj ripetis iliajn alvokojn kaj petojn. Liberigu nin de la barbareco, insistis ili.

Homoj, kiujn Johano Amoso ekkonis en la urbo kaj ankaŭ en la vilaĝoj, estis simplaj kaj bonkoraj. Proksime ĉe la urbo estis komunumoj de novbaptitoj, kies anoj nomis sin Moraviaj Fratoj; ili komune kulturis la teron kaj bredis brutaron, laboris en metiejoj, kies profito estis deponata en komunan kason. Johano Amoso rememoris la iaman Ta°bor kaj provis imagi, kion verŝajne estus dirinta Hartlib, se li ĉi tie trovus sian utopion efektivigitan. Sed li ankaŭ vidis, en kia mizero kaj malklareco vivas la kamparanoj, pro tio li kompatis la hungaran popolon; la kompato sugestis al li deziron helpi. Li ekhezitis. Fine li kapjesis.

Tamen li estis ligita per devoj ne sole en Leŝno, sed ĝis nun validis liaj devontigoj ankaŭ ĉe sinjoro de Geer; nur kiam la familio Rakoczi skribis petoplenajn leterojn pri lia liberigo, li povis pensi pri sia transloĝiĝo en Transilvanion. La pedagogia misio ĉe li denove kunfandiĝis kun la intenco politika. Ĉu li povas rifuzi helpon kaj esperigon al la lando, kies princoj ekstaros verŝajne tre baldaŭ ĉekape de la batalo kontraŭ la Habsburgoj? Rakoczioj certe poste ne trompos la esperojn, kiuj restis revo de ĉiuj elpelitaj ĉeĥoj.

Ankaŭ ŝajnis al li, ke sur ĉi tiu novalo li vere povus krei lernejon, kian la mondo ankoraŭ ne konas. Ĉi tie li ne riparus, ne aldonus kaj ne ŝanĝus, ĉi tie li konstruus de la fundamentoj la lernejon pansofian. Kaj se ĝi prosperus, jen kia ekzemplo por la lerneja edukado en la tuta Eŭropo!

Li sciis, ke tia eksperimento povas kreski nur sur fortikaj fundamentoj. Tial li postulis plenumi certajn kondiĉojn; ne pro memplaĉemo, sed por ke li povu plenumi, kion oni atendas de li. Antaŭ ĉio li postulis por la instruistoj tiajn salajrojn, ke ili povu plene dediĉi sin al sia profesio. Li akiris per sia insistado presejon de lernolibroj. Li postulis stipendiojn por la malriĉaj, talentaj studentoj, kaj li eĉ ne forgesis pri postenoj por pluraj junaj fratekleziaj teologoj el Leŝno.

Kiam li revenis al Polujo, ekminacis por certa tempo denove la turka danĝero kaj ŝajnis, ke ĉiuj novaj planoj kolapsos. Sed kiam la kondiĉoj heliĝis kaj la vojo estis sekura, estis Komenio liberigita de ĉiuj devoj. Li aĉetis de la Unuiĝo domon, kie li loĝigis la familion, adiaŭis la seniorojn kaj akompanata de la fidela Figul li forveturis por nova migrado, pri kiu li ne sciis, kiel longe ĝi daŭros, nek kiamaniere ĝi finiĝos kaj kion ĝi alportos.

Li estis en sia sesdeka jaro. Sed li subpremisis la laciĝon, streĉis la volon kaj ekrajdis kvazaŭ juna kavaliro en batalon konkeri per propraj agoj la rekonon de la ideoj, pri kies justeco li estis konvinkita. Li iris renkonte al la nove naskita espero, kiu ligis la revon pri la libereco de la nacio kun prospero de la junaj homoj en la tuta mondo.

LERNEJO EN SAROSPATAK

Dekomence atakis Johanon Amoson en la hungara urbo sento de soleco. Kaj kvankam ĉi tie kun li post la forveturo de Figul restis la fratekleziaj studentoj, la batalon por la nova lernejo li kondukis sola kaj sole je li koncentriĝis la streĉa atendado de la publiko. Li sentis sin kvazaŭ esploristo, faranta specialan eksperimenton; la sukceson akiros por li sekvantojn, fiasko fortimigos la aliajn. Tial li deziris havi atestantojn kaj li elpostulis al si nomumon de specialaj kontrolistoj; ĉion okazintan li protokoligis. Li hezitis malfermi la lernejon antaŭ ol ĉiuj latinaj lernolibroj havos hungarajn tekstojn; nur poste li inaŭguris per publikaj prelegoj la instruadon en unuopaj du klasoj kaj apartan paroladon li dediĉis al uzado de la libroj.

La nobelaj gepatroj estis jam malpaciencaj; ili aŭdis pri Komenio kiel pri miraklisto, kiu kvazaŭ per svingo de la magia vergo ŝanĝas la malklerulojn je kleruloj, kaj ili akcente urĝis malfermon de pluaj klasoj. Ili deziris antaŭ ĉio, ke iliaj filoj lernu kiel eble plej rapide la latinan lingvon, bezonatan por la servo ĉe

la kortego, kaj ili estis elrevigitaj, kiam ŝajne mirakla instruisto parolis pri longa kaj pena studado, ilian konvinkon incitis lia precizeco kaj solideco. Kaj tio ĉio estiĝis unua kaŭzo de malharmonio.

Pluan maltrankviligon alportis la profetaĵoj, kun kiuj Drabi°k mem venis la unuan vintron al Sa°rospatak, por prezenti ilin rekte al la princo. Kaj la evoluo de aferoj mirinde pravigis liajn asertojn. Zikmundo Rakoczi nome fianĉiĝis al Henrika, filino de la ĉeĥa "vintra reĝo" Frederiko Palatinata. Kiel tio povis ne ŝajni al ĉiuj speciala intenco de la historio? Ankaŭ al Komenio, kiam li kunligis la manojn de la gefianĉoj, entrudiĝis en la menson ideo, ke li eble metas la manon de filino de la lasta ĉeĥa reĝo en polmon de liberigonto de Ĉeĥujo. Al tiu ĉi ekzaltanta fabele historia momento li skribis por la juna princo literaturaĵon, en kiu li komparis sin mem kun profeto Nathano kaj Zikmundon kun Davido, elektita gvidi sian popolon al venko.

Sed okazis nenio tia, kio pravigus tiel kuraĝajn esperojn. Princo Zikmundo favoris siajn sciencajn interesojn, kaj la plolitikaj aferoj restis por li fremdaj; li posedis en Hungarujo kelkajn oficojn, kiuj portis al li honoron kaj profiton, tio lin kontentigis, kaj precipe post la edziĝo li ne emis entrepreni danĝerajn aventurojn. Fine, li eĉ ne havis tempon por tio. Jam post tri monatoj de feliĉa geedza vivo la ĉarma princino Henrika mortis, kaj princo Zikmundo adiaŭis la vivon kelkajn monatojn post ŝi.

Tial la situacio en Transilvanio multe ŝanĝiĝis. Nova princo Georgo II. ne havis intereson pri sciencaj kaj lerneaj aferoj kaj fordonis sin kun sia akompanantaro al gajaj drinkadoj kaj am aventuroj. La lukto por la bona nivelo de la lernejo estis ĉiam pli streĉa, kaj krome Komenio iom post iom perdadis la subtenon de la instruistoj. Li serioze meditis pri tio, ke li sian laboron interrompos kaj foriros.

Kiam li tion ĉi anoncis al la princino Suzana, ŝi persvadis lin, ke li ankoraŭ malfermu almenaŭ la trian klason kaj preparu por ĝi necesajn lernolibrojn. Certe lin ankoraŭ logis ebleco provi krei la lernejon laŭ liaj propraj imagoj kaj ankaŭ la profetaĵoj de Drabi°k neŝanceliĝe antaŭdiris favoran tempon, ĉar en la sekva jaro 1653 certe okazos ekstermo de la "Babilono."

Johano Amoso en sia sesdeka jaro ne cedis de la lukto, por kiu li bezonus tiom da freŝaj fortoj. Li predikis kontraŭ la malnoviĝintaj kutimoj, kiuj malhelpis la progreson. Per la paroladoj kaj etaj skribaĵoj li mallaŭdis tiel le leĝerecon de la instruistoj, kiel la neglektemon de la lernantoj, ofte kaŭzitan kulpe de la gepatroj. Fortius redivivus (Revivigita Fortius) laŭ la eminenta Antverpena profesoro Fortius el la 16 a jarcento alvokis al la konkorda kunlaboro ĉiujn destinitajn, ke la lernejoj anstataŭ belaj statuoj ne fabriku malgraciajn ŝtipojn, por ke anstataŭ noblaj arboj ne prosperu tie dornaĵoj. Persiste li pensis en tiuj ĉi

monatoj pri tia tipo de lernolibro, en kiu la ilustraĵoj formus kun la teksto organikan unuecon, kaj tio ebligus, ke la infanoj lernu la vortojn samtempe kun ekkono de la aĵoj. Por tia libro li serĉis gravuriston kaj igis pretigi provan ekzemplan presaĵon nomatan

Lucidarium ; kiel ĉe aliaj liaj verkoj en la prepara stadio li dissendis la presaĵojn al la amikoj, antaŭ ĉio kompreneble al Samuele Hartlib, por kolekti iliajn opiniojn.

Kiam fine de la jaro 1652 mortis Ludoviko de Geer, Komenio esprimis honoron al li per skriba panegiro. Streĉite li atendis la jaron 1653. Figulus en sia kaj lia nomo sin turnis denove al la svedoj esperante ilian helpon: Ne permesu, ke pro la tiraneco kaj malbona volo de Antikristo estingiĝu la febla flameto de la Dia vero, kiu tiom longe flamis en nia nacio, de kiu ekbrulis kaj disvastiĝis jenaj ardantaj torĉoj, kiuj nuntempe brilas tra la tuta Eŭropo. Sed se venis la decidaj agoj kaj la habsburga "babilono" eĉ ne ektremis.

La tri jaroj travivitaj en Saĝrodpatok en amaraj konfliktoj montris al Komenio, ke la nobelaro ne komprenis liajn pensojn, kaj eĉ ne la instruistoj aliĝis al lia klopodo faciligi kaj agrabligi por la lernantoj la studadon. Por ekŝanceli la opiniojn de la gepatroj kaj de la instruistoj, li decidiĝis rifuĝi al rimedo, kiu pruvis sian taŭgecon en Leŝno, nome al teatraj prezentadoj. Sed eĉ ĉi tie li renkontiĝis kun nekomprenemo. Tiajn stultaĵojn lasu al la jezuitoj, diris al li la lernejmastro Tolnai. Por la enviuloj estis kvazaŭ dorno en la okulo lia pensio, kiun li bezonis por vivteni sian forlasitan familion en Leŝno, kaj same la senpaga restado de dek du malriĉaj fratekleziaj studentoj. Johano Amoso do decidiĝis, ke li petos pri maldungo.

La princino Suzana, dum la aŭdienco, al kiu ŝi alvokis ankaŭ rektoron Tolnai, akceptis ĉiujn plendojn de Komenio; sed ŝi petis de li ankaŭ la bonvolon, ke li restu ankoraŭ unu vintron ĝis la printempo, kaj kun tiu ĉi kondiĉo ŝi rajtigis lin fari rilate al la afero de la teatraj prezentadoj kun la studentoj ĉion laŭ sia propra bontrovo.

Komenio sciis, ke tiun ĉi provon ĉiuj liaj malamikoj sekvos per pli granda malica atentemo kaj ke laŭ liaj sukcesoj oni prijuĝos la tutan novan lernejon. Pro tio li dediĉis al la preparo de la prezentadoj grandan zorgon. Por ke li evitu vanajn disputojn pri tio, ĉu la studentoj sin dediĉu al motivoj sekularaj aŭ ekleziaj, li elektis dramon adaptan de kelkaj ĉapitroj de sia Pordego de lingvoj . Li disdonis al la studentoj la rolojn laŭ iliaj kapabloj, la kondiĉo por ilia teatrado estis bonaj lernorezultoj, alie li lasis al la junaj aktoroj liberecon por ilia propra inventemo. Ili dankis lin pro la refreŝigo de la lerneja enuo; ekde la komenco de la studado ili dediĉis al la studado de la teatraĵo sian liberan tempon kaj ankaŭ sian eksterordinaran diligentecon.

Tuj la unua prezentado, ĉe kiu kvindeko da lernantoj prezentis dudekon da ĉapitroj de la latina lernolibro, havis surprizan sukceson. La instruistoj devis agnoski, ke la knaboj per la aktorado en la scenejo akiris nekutiman certecon; ankaŭ tiuj, kiuj antaŭ kelkaj semajnoj sciis apenaŭ elbalbuti kelkajn latinajn vortojn, senerare prezentis tutajn tekstopartojn; ili regis sin, kondukis nature, seniĝis de la malcerteco kaj la timo, ĉe multaj malkaŝiĝis ilia inĝenio, ĝis nun vualita.

La sukceso de pluaj prezentadoj ankoraŭ grandiĝis; ruliĝis al ili amaso da publiko, kiu fine povis vidi, ke iliaj deziroj plenumiĝas. Ĉiuj konvinkiĝis, ke la envicigo de la teatraj prezentadoj en la planon de la pansofia lernejo estas pravigita; Komenio montris, ke la dramoj scipovas lernigi ne nur la lernaĵon, sed ankaŭ bonan konduton kaj societan sinprezentadon, ke ili efikas pli ekzemplodone ol senfina admonado, altigas la diligentecon de la lernantoj kaj instigas ankaŭ ambicion de la gepatroj. Tion ĉi rekonis ankaŭ la instruistoj, kaj la superintendantato Tarsalli deklaris, ke la sukceso de Komenio signifas venkon super la malklereco, ŝarĝanta ĝis nun la hungaran nacion, kaj ke la lernejo en Sa^orospatak povus eble ekzisti jam pli frue, se oni sekvus la konsilojn de Komenio.

Laŭ deziro de la instruistoj Komenio kompilis ankoraŭ liston de dramoj, kiujn li rekomendis prezenti, kaj li preparis por ili la ordon. La dramigon de sia lernolibro li fermis per ĝeneraltrajtaj scenoj, en kiuj rolis la egipta reĝo Ptolemeo kun siaj konsilistoj kaj kie Komenio substrekis la signifon de la pansofio. La tuta granda verko portis komunan nomon Schola ludus (en signifo Lernejo sur scenejo, Lernejo ludas teatraĵojn).

Fine de majo 1654 alveturis en la urbon denove la princino Suzana kaj honore al ŝi kaj samtempe por la adiaŭo aranĝis Komenio ankoraŭ unu prezentadon; ĉar ĝin volis spekti ŝia tuta sekvantaro, oni destinis kiel teatran scenejon la kastelan korton kun terasoj kaj arkadoj. La prezentado de la 1 a de junio fariĝis nova granda sukceso kaj glorigo de la edukaj klopodoj de Komenio. Montriĝis en ĝi ankaŭ lia aparta belgusto kaj la sperteco de la teatra reĝisoro, kiu ne nur kapablis regi la multnombran teatran grupon, sed ankaŭ uzis eblecojn de la natura scenejo kaj de la kastela arkitekturo. Ĉiuj spektantoj aprezis kaj la scenojn instruajn kaj la draman realigon de la universitataj ceremonioj kun humoraj karakterizaĵoj de la pedelo, de la avarulo kaj de la ĉasisto de novaĵoj.

La princino kaj ŝiaj konsilistoj provis, sub influo de la prezentado, ankoraŭ foje haltigi Komenion, ke li restu en Sa^orospatak, sed li jam ne subiĝis. La eŭropa politika scenejo nome denove ŝanĝiĝis. Estis klare, ke post la abdiko de la reĝino Kristina, kiu inkliniĝis al la katolikismo, revenos en la frunton de la sveda politiko Axel Oxenstierna, kaj okazos reguligo de la aferoj pri Danujo kaj Polujo, eĉ ke Karlo, kuzo de Kristina, kiu devis reĝiĝi, ne sekretigis siajn

militajn intencojn. Johano Amoso heredigis al la junaj instruistoj ĉion, al kio li donis en Sa^orospatak la komencon, kaj li preparis sin por la forveturo. Kiam li adiaŭis, grandaj grupoj da studentoj akompanis lin malproksimen post la urbon.

Li estis revenanta trans Prešov kaj Levoča. En Pu^ochov li vizitis sian filinon edziniĝintan al Johano Molitor, kaj ĉar ili ne fartis bone, li lasis al ili, por vendi, parton de siaj latinaj libroj.

En Lešno li estis sopire atendata. Post longa tempo li alpremis al si la filon Danielon; li estis dankema al la edzino Johana, ke ŝi lin zorgeme edukis. Figulus ĉi tie ne estis, li akceptis la postenon de predikisto en Gdansk; sed lia edzino Elizabeta atendis la patron, por ke li povu beni la unuan nepeton; nur poste ŝi forveturis post la edzon.

Johano Amoso rapide adaptiĝis al la antaŭa vivmaniero, sed la laboron komencitan en Hungarujo li ne forgesis. Li alportis de tie manuskripton de nove aranĝita lernolibro nomita Orbis pictus (Mondo en bildoj), por kiu li en Hungarujo ne trovis bonan pentriston kaj gravuriston; krom tio li volis ĝin ankoraŭ en trankvilo kompletigi per ĉapitroj pri gravaj homaj agadoj, kiel la karbominado, navigado, libropresado. Plue li volis fini la verkon Gentis felicitas (Feliĉo de la nacio), kiu atestis pri tio, ke li restis kunigita kun la hungara nacio per profunda emocia ligo; en tiu ĉi verko li antaŭis per sia koncepto de la nacio la tiaman ekskluzive ŝtatan koncepton. Li finskribis la libron en la unuaj monatoj post la reveno al Lešno, kiam ĉiuj liaj rememoroj estis ankoraŭ freŝaj. Li vidis antaŭ si la fruktodonan hungaran landon kaj rememoris al si, ke ĝiaj regionoj estas duonmalplenaj, ĉar oni batalas tie malmulte kontraŭ la malsanoj kaj la mizero. Li skribis malkaŝe pri la mallaboremo de la homoj, kiuj ne amas sian laboron, ĉar ili estas devigataj plenumi ĝin sub sklava jugo. Li denove aŭdis en la animo egoismajn kaj orgojlajn kverelojn de la sinjoroj, kiuj neglektis kaj la metiojn, kaj la edukadon de la junularo. Li malkovris, ke la ĉefa kaŭzo de la malbono en Hungarujo estas malklereco, kiel cetere ĉie. Se la homoj ne scias ĝuste kulturi la kampojn, regas en la regionoj malsato kaj mortas la etaj infanoj.

Komenio supozios, ke Georgo II foje ekstaros kun armilo en la mano kontraŭ la Habsburgoj, kaj li do konjektis, kio povus en tiu ĉi kunpuŝiĝo la hungaran landon malfortigi. Li opiniis sia devo atentigi la hungarojn pri ĉio, kio malhelpas ilin sur la vojo al bonstata kaj forta futuro. Li deziris precipe, ke la ŝtato kaj ĝiaj reprezentantoj pli bone zorgu pri ĉiuj civitanoj kaj elpetadis por la hungara popolo pli bonajn leĝojn, fidindajn oficojn, trankvilon hejme, pacon kun la najbaroj. Li pruvis per tiu ĉi libro, ke en la anoj de ĉiuj nacioj li vidas antaŭ ĉio la homojn, kiuj estis same kreitaj por la bonstato en tiu ĉi mondo, kaj tiujn, kiuj havas same justan rajton je feliĉo.

DETRUO DE LEŜNO

Johano Amoso estis komisiita gvidi la eklezion, kies zorgoj plikreskis precipe de tiu tempo, kiam la mastro de Leŝno, Bohuslav Leczyn^oski, konvertiĝis al la katolikismo. La didaktikaj verkoj atendis sian finkreon. La volumoj de pansofiaj skizoj sopiris plumon por ricevi klaran definitivan formon. Tamen ĉion ĉi oni eble povus plenumi nur en tempoj de bona humoro kaj trankvilo; sed tiaj tempoj ne estis alvenantaj.

Aliflanke, la celo, por kiu Komenio dum la jaroj batalis, ŝajnis denove esti proksima. Kia sanktigo al ĉiu lia senespera strebado vidiĝus al li, se almenaŭ ĉe la fino de la vivo li estus atestanto de forigo de la maljustaĵo, kiu trafis la ĉeĥajn landojn! Tial li metadis flanken la komencitajn manuskriptojn kaj estis decidiĝinta dediĉi denove ĉiujn fortojn al venko de la justeco.

Lia foriro el Transilvanio ne disigis lin de la familio Rakoczi; male, en Leŝno li sentis sin kvazaŭ antaŭgvardio, tie li povis pli ekscii kaj sendi freŝajn informojn al Georgo II. De la germanaj princoj, kontentigitaj per la vestfalia paco, oni jam neniom pli povis atendi. Sed la batalema princo Karolo X Gustavo eksidis sur la sveda trono kaj brulis de la sopiro relevi denove la militan gloron de sia lando. Kape de Anglio staris la "lordo protektanto" Oliver Cromwell, kiu kiam li post venko en la intercivitana milito kaj post la ekzekuto de reĝo Karolo I batalis por la koloniisma superrego de Anglio kontraŭ Holando kaj Hispanio rolis en Eŭropo kiel protektanto de la evangelianoj, precipe ĉe la presekutado de valdenaj evangelianoj en Piemont. Kaj tial Komenio vigle korespondis kaj kun Svedio, kaj kun Anglio; ĉe tio kiel unua helpanto servis al li Figulus kaj juna nobelo Sa^odovsky^o, kolonelo de la sveda armeno, kiu estis taskita starigi kun materia helpo de Leŝnaj elmigrintoj taĉmenton, kiu en la estonta milita konflikto venus ĝis Bohemio. Ankaŭ al Hartlib sendis Komenio kopion de la profetaĵoj por montri al li, en kiaj esperoj vivas la Ĉeĥaj Fratoj, konsolantaj sin denove per revo pri alveno de miljara regno Dia kaj fidantaj foje la rusan helpon, alifoje la holandan, sed plej ofte la anglan.

Komenio bone komprenis, ke la unua ordono de la praktika politiko kontraŭhabsburga estas komuna avanco de la evangeliaj landoj; li klopodis konvinki pri tio la gvidajn virojn kaj certigi al ili reciprokajn garantiojn. La leterojn, kiujn distribuis liaj senditoj, li skribis per sekretaj signoj aŭ per nevidebla inko. Vieno bone sciis, ke en Komenio ĝi havas nepardoneman kontraŭulon, jam konatan ĉe multaj kortegoj, kaj ĝia polico provis kapti lin dum lia reveno el Transilvanio; sed la insido estis malkaŝita, kaj Komenio fuĝis. Nun li ankoraŭ multobligis sian fervoron; li volis krei fortan ligon de aliancanoj kaj timis la malkonkordojn inter la ŝtatoj, kiuj anstataŭ protekti la animajn valorojn klopodis pli pri sia egoisma sinriĉigado. Precipe ofte li estis seniluziigita de la konduto de Cromwell. En letero al John Dury li vidigis klare, kiel zorgeme li

sekvas ĉion, kio okazas en Eŭropo, kaj li plendis: Kio estas nova en la politiko? Nenio, dormo, senmoveco. Tiu via dormo nin ĉiujn nutris per malplena espero. Kiom valoras ŝiparo en Mediteraneo? Kaj kio alia en Hindio? Ĉu ĝi ne serĉas pli ol nur komercon kaj marmoron? Ni atendis de li ion tute alian, sed nun mi jam entute malesperas.

Nur post kiam la pola reĝo Kazimiro prezentis sian nepripensitan rajton je la sveda trono, ekmoviĝis la rigidiĝinta situacio kaj ŝajnis, ke povas okazi ŝanĝiĝo de la fortoj, ne per vojo de traktado, sed denove per milito. Printempe 1655 invadis la sveda armeo en Polujon. La pola nobelaro, kiu estis tiam vera mastro de Polujo kaj pro sia monavido samtempe ĝia nocanto eniris tuj en traktadon kun la sveda reĝo; en la nomo de la nekatolikaj sinjoroj gvidis ilin la administranto de Leŝno Johano Schlichtling. Kiam la reĝo garantiis, ke li lasos al ili la ĝisnunajn oficojn kaj bienojn, ili volonte promesis al li obeon. Inter la transdonitaj fortikaĵoj estis ankaŭ Leŝno. Komenio elrajdis kun du skabenoj renkonte al la svedoj kaj ricevis promeson, ke la urbo restos netuŝita. Ŝajnis, ke post la regado de la papa eklezio en Pollando ne restis eĉ unu spuro, kaj Komenio rapidis anonci tion al Georgo Rakoczi, ke li ĝustatempe aliĝu al la venka sveda potenco.

Schlichtling deziris, ke Komenio omaĝu panegire al reĝo Karolo Gustavo. Johano Amoso plenumis lian deziron, kvankam li ne certis pri taŭgeco de tia ago. Sed Schlichtling mem konfidis la manuskripton al la presejo, kaj Komenio atingis nur tion, ke tiu ĉi t.n. Panegyrik estis eldonita anonime, sen lia nomo. La teksto ja glorigis la grandanimecon de Karolo Gustavo, sed ĝi ne estis humila; li petis la reĝon, ke li distribuu la oficojn laŭ la meritoj, ke li liberigu la persekutatan religion, donu al la Pollando justecon kaj pacon kaj al ĝiaj civitanoj liberecon de konscienco. Simplaj civitanoj aprezis la alvokon pri forigo de superreĝo de magnatoj, pri abolicio de la servuteco, kaj per tio al suprenleviĝo de la kamparana tavolo. Pro tio la verketo estis ankoraŭ plurfoje eldonita ankaŭ en la tempoj, kiam jam longe ne temis pri glorigo de la sveda reĝo.

Sed Komenio pravis en la opinio, ke la tempoj ne estis favoraj al tiaj omaĝoj. La situacio nome komencis sin turni. La svedaj militistoj kiel iam en Bohemio ne kapablis reteni siajn soldulojn kaj ne malebligis al ili rabadon. Ĉu helpis, ke la sveda reĝo kondukis afable kaj malavare al la nobelaro? La popolo, plie incitata de la diskurintaj monaĥoj, ekflamis per justa kolero kontraŭ la krueleco de la invadintoj kaj propravole aliĝis al la malgrandaj militistaj grupoj, kiujn ekspedis la patriotaj nobeloj. Kiam pri tio eksciis la pola reĝo, kiu forkuris al Silezio, li revenis kaj komencis rekonkeri sian landon. La malamikaj trupoj scipovis defendi sin kaj tial la malamato satiĝis antaŭ ĉio je tiuj evangeliaj urboj, kiuj akceptis la svedan garnizonon, kaj per tio en la okuloj de la pasiiginta popolo perfidis la polan reĝon kaj la patrujon.

Leŝno troviĝis en malfacila situacio. Restadis ĉi tie ĉiam tre multaj fremduloj kaj nekatolikoj, ĝia administranto subiĝis al la fremda reĝo, la elmigrintoj kolektiĝis en help taĉmento, kaj en la urbo estis nur malforta sveda garnizono. Estis preskaŭ antaŭdestinite, ke ĝi fariĝu kolercelo de la popolaj katolikaj trupoj. Tial la loĝantoj de Leŝno vivis en kreskanta timo.

Ankaŭ Komenio sentis la danĝeron. La amikoj, zorgoplenaj pri lia sorto, konsilis al li forlasi la urbon, Hartlib kaj Figulus sendis al li propetojn, ke li fuĝu kaj sendu siajn librojn en sekuran lokon. La sveda reĝo mem invitis lin en sian bivakon. Sed Johano Amoso rifuzis, kvazaŭ li mem ne volus konfesi al si, ke la revo, kiu jam preskaŭ efektiviĝis, kuŝas denove en ruinoj.

Li ne ĉesis esperi. Por ke li klarigu sian opinion pri Polujo, kiun li ne volis perfidi, en frosta maltrankviliĝo li eklaboris pri verko, en kiu li volis montri la vojon al pli bona estonteco por la lando, kiu donacis rifuĝejon al la Unuiĝo. Li titolis sian proklamon Evigila, Polonia! (Vekiĝu, Pollando!), sed li jam ne finis ĝin. La katastrofo proksimiĝis. Tial, kiam aperis ŝanco, Komenio forsendis el la sieĝita urbo la manuskripton de la verko Orbis pictus en Nurenbergon.

Ĝuste la Paskan Dimanĉon (de la jaro 1656) elmarŝis el la arbaroj, ĉirkaŭantaj Leŝnon, taĉmentoj de nobelara soldataro, kaj post ili ruliĝis amasoj de armitaj vilaĝanoj. Hororo ekkaptis Leŝnon. Ekscitita barono Schlichtling devoligis ĉiujn civitanojn de la urbo per glora ĵuro de fideleco. La garnizono eĉ kuraĝis kontraŭataki, sed la batalo ne alportis liberigon.

La nokto, malbonaŭgure prilumita de brulegoj en la antaŭurboj, estis plena de angoro. La urbanoj gardis la bastionojn. Iliaj edzinoj kaj infanoj preĝis sur la placoj.

La mateno ne alportis senpeziĝon, male ĝi signifis turniĝon al plia malbono. Montriĝis, ke barono Schlichtling, hieraŭ vokanta pri la konkordo, mem sekrete fuĝis. Kiam eksciis tion la riĉaj urbanoj, ili rapide surveturiligis la plej valorajn havaĵojn, pagis al si armitan gardistaron kaj rapidis for el la urbo. Dume la sieĝantoj malproksimiĝis de la urbo, opiniante, ke la muregoj estas atente gardataj. Sed la vico de veturiloj atentigis ilin, ke la urbon obsedis timo, kaj ke ne estos problemo konkeri ĝin. Tial ili revenis. La Leŝnanoj estis trafitaj de malkuraĝo; ili forkuris de siaj gardolokoj, neniuj volis batali. Tra la malantaŭa pordego forveturis la sveda garnizono, forkuris la urba konsilantaro, ĉiuj, kiuj havis sanajn krurojn, povis savi almenaŭ la nuran vivon. Komenio ankoraŭ ĉiam kredis je ebleco de amika traktado kun la pola armeo; pro tio li restis kun la familio kaj kelkaj amikoj en sia domo.

La polaj regimentoj invadis en la urbon. La unua tago estis kvieta kaj ŝajnis, ke venkos la sana prudento. Tiuj, kiuj restis en Leŝno, penis konvinki la soldatojn,

ke ili neniel perfidis kaj ke ili deziras la pacon. Sed la sekvan tagon, la 29 an de aprilo, eksplodis ĉe la konkerantoj blinda venĝemo. Hordoj sen disciplino ĵetis sin samtempe en la domojn, ili komencis rabi kaj mortigi ĉiun, kiun ili trovis, ĉu sanulon aŭ malsanulon. La malamata urbo ekbrulis je pluraj flankoj.

Komenion konsternis la eksplodo de fratmurda malamo. Sed la rebrilo de la incendioj kaj pluvo de la fajreroj, sinkanta en la stratojn, ne permesis plu la meditojn. Li koncedis la fuĝon por savi la vivon de siaj familianoj. Ne estis eble kunpreni multajn aĵojn. Kaj tial li igis haste elfosi kavon sub planko de sia loĝejo kaj meti en ĝin la librojn kaj manuskriptojn, tiujn, kiujn li taksis plej valoraj el sia havaĵo kaj kiujn forporti ne eblis. Riskante la vivon, ili fuĝis el la urbo kaj per suferplena vojo inter marĉejoj ili atingis sekurejon. Ili rifuĝis al proksima teritorio de Silezio, kie ili trovis kaŝejon ĉe suzereno Venceslao de Budov.

Leŝno brulis tri tagojn.

Por konsoli la korpremitan maljunulon, sinjoro de Budov ekspedis kelkajn rajdistojn kun veturilo al la brulloko en Leŝno. La skribisto, kiu antaŭe ĉeestis la fosadon de la kavo por kaŝi la manuskriptojn, kunveturis. Ili konstatis, ke la domo de Komenio ĝis funde forbrulis kaj kun ĝi lia tuta posedaĵo, ĉio, kion li dum la tuta vivo akiris, ankaŭ la biblioteko kaj la verkoj preparitaj por la preso. En la subplanka kavo ili trovis nur malgrandan parton de bruldifektitaj manuskriptoj. Ili malgaje revenis.

Per teruriĝintaj okuloj rigardis Komenio tion, kio restis el lia multjara laboro. Singarde prenis liaj fingroj folion post folio. Estis tie kelkaj partoj de pansofiaj verkoj, nenio pli. Li demandis, kvazaŭ li ne volus kredi, kaj la skribisto per moroza voĉo respondis. La metafiziko? Forbrulis. La kolekto de pansofiaj difinoj? Forbrulis. Valoraj presaĵoj de la Historio de ĉagrenoj? La kolekto de predikoj dum ĉiuj jaroj? Ili cindriĝis. Kaj la Trezoro de la lingvo ĉeĥa? Trezoro kolektata vorton post vorto dum kvar jardekoj? Por ĉiam neniigita. La kompatinda maljunulo ekploris. Tiu ĉi perdo estis por la ĉeĥa nacio nekompensebla, kaj tial la aflikto de Johano Amoso estis nekonsolebla.

Li staris en la mondo denove kiel mizerulo. Sed li sukcesis savi vivon sian kaj de siaj familianoj, kaj necesis pripensi, kiel vivi plu.

Reveni al Leŝno estis danĝere. Ankoraŭ pli danĝere estis resti en Silezio, subigita al la imperiestra potenco. Li devis foriri kiom eble plej rapide de ĉi tie.

Komenio unue decidiĝis por Frankfurto, kie li estis konata de multaj profesoroj. Por certa tempo li transloĝiĝis al Szczecin. Sed poste kiam la informo pri la

katastrofo de Leŝno atingis Amsterdamon li ricevis inviton de sinjoro Laŭrenco de Geer, interpretita de Johano Rulicius. Nur ĉi tio redonis al li iom da trankvilo.

Por ses monatoj li ankoraŭ haltis en Hamburgo, antaŭ ol estis nete kopiitaj kelkaj partoj de la manuskripto, per kiu li volis prezenti sin en Amsterdamo. Dume li en konciza verketo priskribis la pereon de Leŝno por refuti la falsajn famojn kaj sugesti kompaton de Eŭropo favore al mizerigitaj Fratoj el la ĉeĥaj kaj polaj korporacioj.

Denove li adiaŭis la familianojn kaj la amikojn. Kaj en aŭgusto li ekvojaĝis serĉi ankoraŭ unufoje rifuĝejon por sia frakasiĝinta vivo.

RIFUĜEJO DE MALJUNAĜO

De la jaro 1581, kiam Nederlando sukcesis elŝiriĝi el la katenoj de hispanaj Habsburgoj kaj kiam ĝi cesis suferi same pro minaco de la inkvizicio, kiel pro monavideco de fremdaj soldataroj, startis la libera lando al disvolvo de la liberigitaj fortoj. La kapabloj kaj kapitalaj ebloj de junaj burĝaj tavoloj kreskigis la bonstaton, kies bazo estis la transmaraj riĉaĵoj. Per la nombro de ŝipoj Nederlando iĝis grandpotenco. La aŭtonomio de la civitoj favoris disfloriĝon de la industrio kaj de la metioj. Kaj la libereco de la konscienco kaj de la kredo, kiu kostis tiom da sango, faris el Nederlando rifuĝejon de multaj viroj, aliloke persekutataj, per kio ankoraŭplifortiĝis la tradicio de humanisma reformacia klereco. La nederlandaj burĝoj favoris sciencon kaj arton, ĉar ili bone sentis, per kio kreskas ilia juna ŝtato interne, kaj kio akiras al ĝi estimon en la okuloj de najbaroj. Vivis ĉi tie ankaŭ rememoro pri bonaj kontaktoj de nederlandaj artistoj kaj komercistoj kun Prago, kontaktoj rompita per la Blankmonteta katastrofo; tial ankaŭ iris de ĉi tie al Leŝno plurfoje ne malgranda subteno.

Komenio vizitis Amsterdamon jam trifoje (unufoje antaŭ 44 jaroj) kaj li amis la urbon, kie kiel diris Erasmo de Roterdamo loĝas homoj kiel frugilegoj en suproj de arboj. Nun li proksimiĝis kun aparte feliĉa sento al ĝiaj fieraj turoj, enspiris akvan aromon de ĝiaj kanaloj kaj ĝuis riĉan vivon de la grandurbo en havenoj kaj svarmoplenaj stratoj. Kaj kiam li troviĝis inter la muroj de la domo Ĉe diamanta rozo, kiun destinis por li komence Laŭrenco de Geer, kiam li eksidis al la tablo kaj dronis en sekura silento, li sentis sin post la tempo de seninterrompa danĝero kvazaŭ ŝiprompulo, kiun pereiga ŝtormo elĵetis en lasta momento sur firman bordon, kaj kiu sub la kvietiĝanta ĉielo ekkonscias, ke li spiras kaj vivas.

La unuaj paŝoj tra la urbo estis necertaj. Li konfesis al si, ke li havas malantaŭ si jardekon de fiaskoj kaj afliktoj kaj ke li estas ĉi tie pro kompatato. Sed li

renkontiĝadis kun honorigo kaj afableco. Ĉie li trovis malfermitajn pordojn kaj afablan akcepton. La homoj ĉi tie pensis klare kaj trankvile kaj scipovis interkompreniĝi per precizaj vortoj. Nia lando favoras la klerecon kaj bezonas kiom eble plej bonajn lernejojn, li aŭdis plurfoje. Kiel la urba magistrato, tiel Laŭrenco de Geer interesiĝis ne nur pri liaj verkoj didaktikaj, sed ankaŭ pri la libroj pansofiaj. La honoran profesorecon li ja rifuzis, sed la salajro, kiun ili mezuris al li, ebligis al li baldaŭ inviti al si ankaŭ la familion, kiun intertempe elpelis el Frankfurto la pesto, kaj ebligis al li subteni la malriĉajn samreligianojn, kiam ili rifuĝis al li petante helpon. Li ekloĝis poste en la kvartalo Jordaan (nomita tiel laŭ la nomo Jardin, ĝardeno, kiun al ĝi donis la francaj hugenotoj), kaj filoj de la magistratanoj venadis al li por privata instruado; ĉi tiuj lecionoj baldaŭ famiĝis kaj frekventis ilin ankaŭ tiuj, kiuj volis konatiĝi kun liaj opinioj.

La didaktikaj verkoj el la tri periodoj de lia vivo en Leŝno, en Elblag kaj Sa^orospatak estis entute pretaj, sed necesis ilin kontroli kaj ordigi. Plejparton de la tago do Komenio pasigis super siaj manuskriptoj kaj tralaborado de la ĉapitroj, kun kiuj li ne estis kontenta, poste en kompostejo, en presejoj, ĉe lignogravuristoj. Li kontraŭbatalis la laciĝon kaj ne permesis al si eĉ ripozon por plenumi la deziron de la gastigantoj kaj samtempe por montri baldaŭ sian dankemon.

La unua libro, kiun li en Amsterdamo eldonis, estis volumo de la teatraĵoj ScholBa ludus (Lernejo sur scenejo). Svisa pastro Redinger, kiu fariĝis sindona sendito de Komenio en eksterlando, rapide tradukis la tutan verkon en la germanan lingvon. Samtempe aperis en Nurenbergo Orbis pictus (Mondo en bildoj) kiel nova tipo de lernolibro, kiu prave vekis ekzaltiĝon; Komenio estis nomita "princo kaj kreinto de la klereco". Sed li ne lasis sin delogi per sukcesoj, merititaj jam per la agado en la pasinteco; male, li mem submetis siajn ĝisnunajn verkojn al severa kritiko en Ventilabrum sapientiae (Kaptilo de saĝo). Plue li reverkis grandajn partojn de siaj libroj kaj ekigis ankaŭ la laboron pri nova lernolibro de la latina lingvo, ĉiam nekontenta pri la ĝisnunaj rezultoj. Havante riĉajn spertojn li scipovis pli bone ol iu ajn alia diveni, kiu el la manuskriptoj atendantaj longajn jarojn la presadon konservis sian vivopovecon, kaj kio restos nur komenco, kiun devos daŭrigi aliaj, pli junaj aŭtoroj. En verketo bele titolita Traditio lampadis (Transdono de la torĉo) li vortigis sian didaktikan testamenton, en kiu li vokas la disĉiplojn por fini lian verkon.

Grava turnopunkto, montranta, kien li jam venis sur la vojo al rebonigo de la lernejo, fariĝis giganta volumo, enhavanta liajn ĝisnunajn pedagogiajn verkojn, kunigitajn per klarigo pri ilia ekesto kaj nomita resume Opera didactica omnia. Ĝi aperis en kvincent ekzempleroj kaj reprezentis nome aŭtobiografion de ĉi tiu verko, kiun Komenio devis kaj volis prezenti al siaj gastigantoj. La titolan paĝon

antaŭis lignogravuraĵo prezentanta Komenion inter lernejoj kaj simboloj; ĝi vidigis, kian estimon li ĝuis en sia ĉirkaŭaĵo kiel malkovrinto kaj solvinto de ĉiuj misteroj de instruado. La recenzantoj de la verko denove aprezis, kiel en liaj imagoj la lernejo ŝanĝiĝas el loko de timo kaj malfacilaĵoj en ĝojigan laborejon de humanismo, kie oni ne nur instruas, sed ankaŭ edukas al harmonio de plej bonaj homaj kvalitoj. La devizo, kiun li precipe akcentis, estis: Omnia sponte fluant, absit violentia rebus (Ĉio fluu spontane, sen partopreno de perforto). Kiel dankon por la gastamo li dediĉis la libron al "Okulo de la urboj, al fiero de Nederlando, al plezuro de Eŭropo" al Amsterdamo, kaj en la dediĉo al la patroj de la urbo kaj al la admiralitato li komparis literaturon kaj armilojn: ke ili ne estas antitezaj, se la armiloj estas ilo de la justeco kaj ne de la malamo, se oni uzas ilin ne por la perforto, sed por la defendo kontraŭ la maljustaĵoj. Li klarigis per tio ankaŭ sian starpunkton, ĉar li sciis, ke la ĉefan malamikon de la ĉeĥa nacio, la Habsburgojn, estas eble venki nur per batalo. Militon, profitavidan kaj raban, kiu sklavigas pli malfortajn naciojn aŭ indiĝenojn en transmaraj landoj, li neniam ĉesis kondamni. Se homo apartiĝas de homo, se homo ne scias toleri homon, se homo furiozas kontraŭ homo, tio estas evidenta danĝero por la homeco.

Pro la dediĉo de la libro li ricevis ne nur honorajn donacojn, sed ankaŭ unikan honorigon, ke estis konfidita al li ŝlosilo de la urba biblioteko, lokita en la kapelo de sankta Agnesa. Plie la urba magistrato elpetis, ke pentristo Juriaen Owens kreu portreton de Komenio instruisto de nacioj.

Komenio eĉ meze de tiaj sukcesoj ne forgesis tiujn, kun kiuj li vivis multajn jarojn kaj de kiuj disigis lin nur la flamoj de Leŝno. En frua junaĝo, li konfesis en letero sendita al la eldonisto Montan, kaptis min sopiro, ke mi sole por mia nacio verku en la gepatra lingvo kelkajn librojn kaj ke mi utilu al ĝi tiamaniere; tiu sopiro ne forlasis min dum la tutaj kvindek jaroj. Plena de zorgoj li rimarkis, ke la Unuiĝo disfalas, se ĝiajn membrojn kunigas nek loko, nek ordeno, eĉ ne komuna espero. Kaj tial li provis eldoni en Amsterdamo ankaŭ librojn ĉeĥajn, kiuj alportas fortigon al la forlasitaj familioj kaj unuopuloj kaj li pensis ĉe tio pri tiuj, kiuj restis en la hejmlando kvazaŭ en arestejo, en Bohemio, Moravio, Supra Silezio, Slovakio. Li ĉe tio rezignis pri kia ajn profito, kaj tiel li sukcesis, ke el la nederlandaj presejoj eliris ankaŭ ĉeĥaj libroj, kies manuskriptoj eltenis jarojn de militaj katastrofoj, kiel ekzemple eltiraĵo el Biblio Manlibro kaj pli poste ankaŭ Kantlibro, en kiun li envicigis kaj malnovajn tradukojn, kaj ankaŭ novajn proprajn kantotekstojn. Li ĝuste konkludis, ke la vivo, kiu ŝanĝiĝas, bezonas novajn kantojn, ankaŭ tiujn por tempoj tristaj; li rememorigis la biblian ekzemplon de reĝo Davido, kiu ankaŭ plej multajn kantojn komponis en ekzilo kaj en turmentoj. Kiel poeto li kun amo traktis la gepatran lingvon, ligis prozodion kun rimoj kaj donis al la versoj nacian kaj popolan intonacion.

O by mne muoj ženich věčný

s milosti svou sá mně vděčný

polibením úst svých poctil

Ho, se mia fianço eterna

kun amo sia al mi danka

per kiso de la buŝo min honorus!

Venis la tempoj, kiam li ne povis kirasi sin kontraŭ malĝojaj pensoj, kaj liaj zorgoj pri la estonteco eksonis per Trista voĉo de paŝtisto al dispelita, mortanta grego; kies nostalgio impresis kiel eĥo de Testamento de la patrino, eldonita antaŭ dek jaroj: Fartu bone, amikoj karaj! Kaj al mi, ne alie ol kvazaŭ en tombon vi metus min, rerigardu! Ĉar kvankam spirado mia ankoraŭ hodiaŭ restis ĉe mi, ĉu morgaŭ restos ĝi, ne scias mi. Eĉ kiam la unuaj jaroj en Amsterdamo estis nekutime fruktodonaj, plenan koncentriĝon li tie ankaŭ ne trovis. Lia pasinteco akompanis lin. Baldaŭ post la alveno lin vizitis kuracisto Daniel Zwicker el Gdansk, ankaŭ elpelito kaj siciniano, kiu volis provi proksimiĝon de la eklezioj. Komenio volis eviti daŭrigon de malnovaj disputoj, sed kiam Zwicker eldonis siajn opiniojn kaj vortigis suspekton, ke Komenio lin almenaŭ sekrete aprobas, li opiniis grava, ke li por intereso de la Unuiĝo puriĝu. Li rapide riparetis siajn du polemikojn faritajn antaŭ dudek jaroj (kontraŭ Jonaso Schlichtling kaj Melchior Scha"fer) kaj skribis pliajn; temis precipe pri la problemo de supereco de la homa intelekto super la Skribo kaj pri la demando de homeco de Kristo; nur nun publikigis Komenio ankaŭ flugfolion, kiun li iam ricevis de la polaj nobeloj en Lubeko. La polemiko kun Zwicker plilongiĝis kaj tio devigis Komenion revizii tutan sian rilaton al la socinianoj, ke estu klare, ke li jam antaŭ longe proklamis sian malkonsenton kun ilia instruo. Necesas diri, ke tiu ĉi tipo de polemiko ne apartenis al la plej fortaj bataliloj de Komenio. Kvazaŭ li devus batali kun siaj propraj duboj kaj kvazaŭ li ektimus esti suspektata pri kontaktoj kun tio, kion oni ĝenerale nomis "verko de diablo", li vidigis en la respondoj al Zwicker malpaciencon kaj ekscitiĝon kaj tute escepte li uzis eĉ tre durajn kaj malĝentilajn vortojn.

Li sendube estis ekscitita de tio, ke li devas dediĉi tiom da energio al tiuj ĉi purigaj disputoj, kaj dume la politikaj cirkonstancoj en Eŭropo evoluis tre malfavore kaj li ne havis la povon influi ilin. Por certa tempo ŝajnis, ke Rakoczi,

kiu invadis en Polujon, havos sukceson. Sed kiam neatendata malamikeco de Danujo forkondukis la svedojn el la batalejo, Rakoczi izoliĝis en la batalo kaj devis fuĝi. Lia soldataro fariĝis militakiraĵo de tataroj kaj estis fortrenita al Krimeo, nur li mem kun areto da fideluloj sukcesis trabatali al si la vojon hejmen. Komenio tuj skribis emfazan peton al Cromwell, kiu promesis peradon, kaj turniĝis ankaŭ al la turka sultano; sed tiu, ĉagrenita, ke Rakoczi agis en Polujo sen lia scio, persistis pri lia detronigo. Iom pli poste mortfalis Georgo Rakoczi en vana batalo kontraŭ la turkoj, kaj per tio estis entombigitaj ĉiuj esperoj je la fina venko de ĉi tiu dinastio, tiomfoje profetitaj kaj de Johano Amoso subtenataj.

La stranga maljunulo el Lednice Nikolao Drabi°k tamen ne ĉesis sendi siajn profetaĵojn al Amsterdamo. Komenio ordonis al unu de siaj helpantoj, ke li ĉe speciala kunveno en Lednice ekzameni la verdirecon de Drabi°k; sed li sciis, ke tiuj ĉi profetaĵoj estas parto de religio de popolamasoj, por kiuj la ĥiliasmo, kredo pri alveno de Kristo en la mondon, estis garantio, ke Dio helpas al la suferantoj. Li sciis, ke la tuta lia ĉirkaŭo, tiomfoje trompita per promesoj de potenculoj, revivigas sin almenaŭ per espero, ĉerpata el fontoj tiom malfortaj. Li do preparis por preso libron, en kiu li resumis la profetaĵojn de Kotter, Poniatowska kaj de Drabi°k kaj titolis ĝin *Lux in tenebris* (Lumo en tenebroj): li volis eldoni ĝin en minimuma eldonkvanto kaj esperis, ke li per ĝi klinos la menson de la regantoj al la flanko de justeco. Sed la eldono de tiuj ĉi revelacioj enkondukis lin en pluan labirinton de suferoj kaj malfacilaĵoj; multfoje poste li devis klarigi, ke li estas nur tradukisto kaj interpretisto, kaj li devis eniri en polemikojn, el kiuj plej multe dolorigis lin la disputo kun iama disĉiplo, profesoro Nikolao Arnold. La maljunaĝo ne aldonis al li galon, nek vantemon; volonte li proponis, por ekzameni, ĉiujn siajn librojn kaj manifestis sian komplezon akcepti, eĉ estante centjara maljunulo, ĉiun honestan konsilon.

La profetaĵoj neniam por li estis mesaĝo, antaŭ kiu la kristano metas la manojn, en pacienca atendado, en la sinon. Tial, kvankam li ankoraŭ tradukis la revelaciojn de la tajloro Stefano Meliŝ el Leŝno, li turnis sin per speciala verketo al la germanaj princoj, por instigi ilin al korekto de la vestfalia paco. Tio ankaŭ estis kaŭzo, pro kiu li sendis fidelan Johanon Redinger kun la libro de revelacioj al Ludoviko la XIV. kaj iom pli poste al la granda veziro en turkan bivakon apud Mohacs.

Kiam Redinger feliĉe revenis, Komenio ĝuste estis finpresanta novan volumon titolitan *Lux ex tenebris* (Lumo el tenebroj). Li ne destinis la libron por la publiko; sed li dediĉis ĝin al la imperiestro Leopoldo kun peto, ke li finu la pekojn de sia dinastio per akto de justeco, al la papo Aleksandro VII ke li vekiĝu el la ebriiĝo kulpita de flatado, antaŭ ol li suferos pro Dia kolero, al Ludoviko XIV ke li kunvoku koncilion por resanigi la eklezion, kaj ankoraŭ al

ceteraj regantoj kaj princoj. En la enkonduko deklaris Komenio eksplicite, ke li volas neniun ofendi, sed ke li deziras nur, ke la nacioj finfine veki[^]gu kaj kuniĝu por elradikigi la pereigan malamon.

Ĉiuj tiuj ĉi agadoj, eĉ eble plej frenezaj, atestis pri tio, ke Komenio scipovis levi sin super la kompaton pri suferado de la propra nacio kaj ke li komprenis, ke la tuta Eŭropo estas en daŭra dolora krizo. Pri tio, ke li scipovis kompreni ankaŭ la maljustaĵojn, eĉ se ĝi okazas al iu fora gento aŭ al iu eklezia tuto, atestas lia indigno, kiam la saksa duko Karolo Emanuelo II komencis en Piemont kruele persekuti la sekton de valdenanoj. Krom buŝa raporto Komenio sciigis pri tiu sanga maljustaĵo el la verko de Jean Le^oger, kiu per tio sukcesis vekti interesigon pri la opresatoj en Svislando, en Nederlando kaj en Anglujo. Komenio enigis tiam tiujn ĉi okazaĵojn en sian

Historion de ĉagrenoj, kaj kiam preskaŭ la tuta eldonkvanto de la libro forbrulis en Leŝno, li denove envicigis la raportojn de Le^oger en novan eldonon de la libro en Amsterdamo. Kun Jean Le^oger li poste amikiĝis kaj tiu en sia libro reciproke dediĉis sian honoran rememoron al Komenio.

Johano Amoso estis en tiu tempo ofte malsana kaj multfoje li jam timis, ke li devos adiaŭi la vivon. Sed lia spirito defendis sin kaj la volo sin streĉis. Unu el la plej fortaj ligoj, kiuj lin tenis ĉe la vivo, estis la sopiro, ke li povu transdoni al la mondo verkon, de kiu li atendis plej multe, dum jaroj kaŝe preparitan kaj korektatan Ĝeneralan konsulton pri la rebonigo de la homaj aferoj."

Li atendis, ĉu venos en Eŭropon almenaŭ iom pli favoraj kondiĉoj por tio, ke lia verko aperu, kaj ke liaj sugestoj realiĝu. Sed li atendis vane; montriĝis, ke la akordiĝo de la regantoj estas neebla kaj ke eĉ la armiloj de justuloj ne povas forigi la regadon de maljusteco kaj opreso. Do sur kian fundamenton li povis starigi sian konstruaĵon de la nova humanismo ol sur imagon de alveno de miljara paco, kiu nur poste certe permesos enkonduki en la vivon ĉiujn intencojn pri la granda internacia interkompreniĝo?

Nur kiam li finis la sepdekan jaron, printempe de la jaro 1662, li konfidis al la presisto almenaŭ du partojn de Ĝenerala konsulto en la latina lingvo. Tiam li ricevis tristan sciigon, ke mortis tiu, kun kies sugestoj estis senpere kunligita la estiĝo de la verko kaj pri kiu li dum sia laboro ofte rememoris, amiko malproksime, sed pli ol aliaj sindona kaj fidela, Samuele Hartlib.

REBONIGO DE LA HOMAJ AFEROJ

Al la lumoj Eŭropaj, al viroj doktaj, piaj, eminentaj ... dediĉis Komenio la Ĝeneralan konsulton⁰, verkon, en kiu li aŭdacis la plej altan suprenleviĝon. Li pensis pri ĝi dum ĉiuj pasintaj jaroj, li laboris super ĝi, plejparte sekrete, plenumante aliajn devojn, li volis eksciti per ĝi la mondon por komuna batalo kontraŭ la homaj konfuzoj. Li agnoskis, ke tia laboro superas la fortojn de unuopulo; sed la sento de respondeco por la homaro ordonis al li, ke li entreprenu tiun taskon. Jen, mi, la plej eta el ĉiuj, eliras, havante sopiron alporti al la mondo aŭ novan torĉon aŭ almenaŭ novajn fajrerojn...

Se li devus elserĉi, kie ardiĝis la unuaj el la fajreroj, li devus reveni ien en la infanan aĝon, kiam lia sentiva animo varmiĝis en la atmosfero de la Unuiĝo de ĉefaj fratoj. Tie ĉiuj edukadis sin reciproke, simplaj kaj piaj homoj faris mallonge post fondiĝo de la Unuiĝo el la edukado kaj el la seninterrompa prefektiĝado aferon de la tuta komunumo. Frateklezia pastro estis egalrajta kun la kredantoj, sed plie li plenumis instruistan mision. La edukado estis ligita kun disciplino, al kiu submetiĝis ĉiuj ekde la infana ĝis la maljunula aĝo, la servutuloj same kiel la nobeloj, konfliktoj estis forigataj per frateca maniero. Dum la obskuraj tempoj de forkuroj kaj ekziloj kreskis en li imagoj, kiel utili per la edukado al la nacio kaj al la tuta homaro. Kaj la ideo de edukado fariĝis la fundamento de la grandioza plano pri rebonigo de la tuta mondo.

Post kiam li alportis el Anglujo la verkon Lumo de vojo, en momentoj forŝiritaj de aliaj devoj, li provis tralabori siajn opiniojn kaj devizojn en pli detalajn analizojn. Jam en la Didaktiko li baziĝis sur la principo: Nenio ekzistas en la mondo, kion ne povus kompreni homo, dotita per sensoj kaj per prudento. La edukado fariĝis por li rimedo de iom post ioma turniĝo al pli bona futuro; ĝi povis garantii belajn rilatojn inter la homoj, okupiĝantaj pri fruktodona kaj utila aktivado kaj ĝojantaj pro ĉarmoj de la vivo. La unuaj paĝoj de la verko, kiu diskreskis en sep librojn, estiĝis jam en Elbla, g, la pluaj en Lešno kaj en Hungario. Komenio preparis la verkon en sekreto, ĉar li deziris, ke ĝi tiam, kiam ĝi aperos heligu la tenebron kiel fulmo. Li sciis ankaŭ, ke multaj aferoj povus vekti kontraŭstaron; tial li konfidis al la presado singarde provizore nur la unuajn du partojn.

La unua parto, Panegersio (Ĝenerala vekiĝo el sonĝo), determinis la fundamentan taskon. La homajn aferojn aranĝas la scienco, religio kaj politiko, diris en ĝi Komenio; sed ĉio ĉi difektiĝis kaj malboniĝis. La scienco ja naskiĝis pro sopiro pri la vero, sed eraroj kaj fendoj en la ekkonado malebligas atingi ĝin. La religio devis garantii bonon en la mondo, sed ĝi ne plenumis la atendojn, ĉar en tiu aspekto, al kiu ĝi evoluis, ĝi malkoincidas kun la Dia karaktero. La sociaj formacioj estiĝis, por ke estu juste administrataj la aferoj; sed anstataŭ la ordo regas kvereloj kaj tiuj kondukas al militoj. La homoj kondutas unuj al aliaj pli

malbone ol bestoj. Sed ke ili deziras la rebonigon, tion atestas lernejoj kaj libroj, eklezioj kaj sektoj, diversaj ŝtataj formoj kaj leĝoj. Sed ankaŭ tiel ĉio senĉese malboniĝas. Tial necesas provi progresi per novaj vojoj, kiuj devas esti simplaj kaj libervolaj. Al sincera konsulto pri tio ĉio invitas la aŭtoro ĉiujn homojn sendiference.

En la dua parto, Panaŭgio (Ĝenerala klereco), Komenio pliprecizigas, ke la rimedo de la rebonigo devos esti la saĝo, kiu efikos prosperige kiel la lumo.

Pansofio, kiun li lasis ĝis nun en sekreto, devis montri filozofian sistemon kiel ŝlosilon al konvena kaj sistema edukado kaj al la rebonigo de malbonaj ordoj. Kaj kvankam por li la naturaj fenomenoj estis nur reflektiĝo de la Dia povo, li volis koni iliajn kaŭzojn kaj postsekvojn; li kredis al potenco de la scienco, ne timante aserti, ke la atendata ora epoko estas epoko de la prudento.

En pluaj partoj de la Ĝenerala konsulto li klarigis, kiel eblas akiri sciojn kaj kiel ĉiuj homoj povus interkompreniĝi. Ĝenerala edukado, tio signifis komunan klerigadon de ĉiuj, en ĉio, per plena kaj ĝusta maniero, por ke ni vere estiĝu homoj. La unuecon kaj la tutecon de la mondo li aparte akcentis. Maljuste do agas kontraŭ la homaro tiu, kiu ajn serioze deziras, ke bone ne fartu la tuta homaro... La mondo estas nia komuna kaj unika sorto.

Komenio bone sciis, ke lia verko bezonas la epokon, kiu ĝin akceptus trankvile kaj indulge. Tio rilatis precipe al la sesa parto, \ Panorthosio (Ĝenerala rebonigo), kiu devis fariĝi instrukcio, kiel elradikigi rapide kaj defundamente la grandan Babilonon ... konsistantan el senfinaj trompoj, perfortoj kaj konfuzoj, por ke jam estiĝu sur la tero bildo de reĝolando ĉiela. Tion oni povas atingi nur tiam, kiam estos rebonigitaj universale ĉiuj kaj en ĉio. La obstaklojn li vidis ne sole en la kondiĉoj publikaj, sed ankaŭ en antaŭjuĝoj, en la apatieco, en partianeco por ĉio propra kaj malamao al ĉio fremda. Paradizo de la ĝojo ne povas esti fondita per violento. La homa naturo denaske, li sciis bone, preferas esti gvidata ol trenata, kontraŭ ĉia ordonado nia menso sentas subkonscian spitemon. Li venis al vere kuraĝaj ideoj: Ni devas celi senkondiĉe al tio, ke la homa gento revenu al la libereco de pensado, la libereco religia kaj al la libereco civitana. La libereco, mi asertas, estas la plej brila posedaĵo, kreita samtempe kun la homo kaj de li nedisigebla... Konduku ni la homon, se eble, al la libereco!

liberiginte lin de ĉiuj ordonaj dogmoj, kultoj kaj obeoj! Tio estas pensoj, kiuj sonas kvazaŭ elparolitaj hieraŭ. Kaj prave li demandas, ĉu eblas publikigi ilin en la tempo, kiam la regantoj sian regadon super la animoj de siaj regatoj ankoraŭ pli fortikigas.

Same kiel li deziris en la fako de filozofio anstataŭigi la herezojn, konjektojn kaj perfortadon de la prudento per scienca kono de la aferoj, kiel li volis, ke anstataŭ la sektoj, malamantaj unu la alian, dominu ĝenerala kaj vera kristana religio, tiel

li postulis de la politiko, ke ĝi garantiu al la homoj la pacon kaj kiel ĝiajn monstrojn li deklaris la despotismon, anarkion, perfortojn, karcerojn, ekzekutojn kaj militojn. Por la plej supera direktado de ĉiuj aferoj li proponis establi tri arbitraciajn korporaciojn: ili devis esti korporacio de lumo por aferoj de filozofio, monda konsistorio por aferoj ekleziaj kaj paca tribunalo por aferoj politikaj (kiun jam ducent jarojn antaŭe proponis la ĉeĥa reĝo Georgo el Poděbrady).

Sed la rebonigon, li instruis, devas ĉiu komenci ĉe si mem, poste oni daŭrigos en la familio, en la lernejo kaj en la ŝtato. Por ne doni eblon reveni al la malamikeco kaj al militoj, necesas forigi la armilojn... Kion fari per la fusiloj kaj kanonoj? Mi respondas: La fusilojn oni uzu kontraŭ rabobestoj, dum el kanonoj oni fandu sonorilojn por kunvokado de la popolo aŭ muzikilojn ... Tio estis pli poetaj fantazioj ol la politikaj planoj, sed por ili necesis multe da kuraĝo kaj kapablo altiĝi super la krudan realecon. Sed en aliaj konkretaj imagoj li manifestis profundan komprenon por la sociaj rilatoj. En la senco de la Biblia principo kiu ne laboras, tiu ne manĝu, li volis, ke en la ŝtato ĉiu okupiĝu pri utila agado. La laboro por li ne estis puno por la peko de la unuaj homoj, sed digna instrumento por fari la mondon pli bela. Tial la estonta ŝtato estu sen almozuloj, sed ankaŭ sen monopoloj, per kiuj kelkaj homoj forprenas de aliaj panon de la buŝo, sed ankaŭ sen denuncantoj, tiu plej pereiga speco de homoj. Li priskribis zorgon pri publikaj vojoj kaj pri vojaĝado de junaj homoj, li proponis instrukciojn pri vestado. Li antaŭsentis kaj skribis, ke la ŝtato ne fariĝos Dia reĝolando sur la tero, kiso de paco kaj de justeco antaŭ ol elĉerpiĝos la malfeliĉa fonto de la konfliktoj, la MIA kaj la VIA. Per tiaj imagoj li lasis sin porti al la vizioj, per kiuj li ege antaŭiris ĉiujn eblojn kaj sonĝojn de siaj samtempuloj. Tial ĉi tiu lasta reformacio, kiun ni sopiras, forvokas ĉiujn homojn de la partianeco kaj la sekteco kaj ĉiujn amasigas en estularo de la mondo... t.e. ne esti nur platonanoj, aristotelanoj, stoikuloj ktp., sed filozofoj, ne esti luteranoj, kalvinistoj, papanoj ktp., sed kristanoj; ne aŭstrianaj, hispanoj, francoj ktp., sed egalrajtaj civitanoj de libera tutmonda ŝtato; kie ajn kiu estu, li estu egale libera persone kaj egale servanto de la socio.

Prave scipovis imagi Komenio, kia malamikeco leviĝus kontraŭ tiaj meditadoj. Li do prokrastis la finan redaktadon kaj laboris pri aliaj libroj. Sub la impresoj de la tiutempaj malkovroj li adaptis sian antaŭan Fiziko n kaj ŝanĝis en ĝi ĉefe la eksplikon pri la homa korpo laŭ la malkovroj de Harvey pri la cirkulado de la sango. Kiam li preparis por nova eldono sian Labirinto n, li aldonis al la scenoj priskribantaj la bildon de la mondo ankaŭ priskribon de ŝtormo, kiel li spertis ĝin dum sia ŝipado al Anglujo. Li ankaŭ ekvilibrigis sian rilaton al Koperniko. En la verko Lexicon reale pansophicum (Pansofia vortaro) li rekonis ĉe la temvorto Planedo almenaŭ nerekte la teorion de Koperniko: Planedo, suna astro, kiu havas la Sunon kiel sian centron... Diversaj fazoj de la planedoj, kiuj

malkreskas kaj plikreskas kiel la Luno, montras, ke la planedoj de si mem ne estas ardantaj, sed reflektas la sunlumon...

La burĝoj kaj metiistoj en la kvartalo Jordaan vidadis ĉe vesperiĝo majestan figuron de la ĉeĥa filozofo, kurbigitan de la maljuneco, kiel li post la tago plena de laboro promenas laŭlonge de la kanalo. Sporade kun li promenis lia silentema grizhara edzino; de tempo al tempo alveturis la adoleskanta filo Danielo el la lernejo en Leuwarden aŭ iu el la amikoj, kiujn gvidis Komenio en la havenon, sed ankaŭ en gastejon por trinketi bonan vinon. Sonorilludo de la preĝejo Westerkerk lin ankoraŭ ĉiutage invitis plenumi la devon de predikisto. En tiu ĉi preĝejo estis ankoraŭ dum lia restado entombigita granda pentristo, kiu vivis en la sama kvartalo; pri unu el liaj portretoj oni asertas, ke ĝi povus prezenti Komenion. Tio estis Rembrandt.

La sopiro de Komenio pri la paco estis en tiu tempo vundata de malamikeco inter la landoj, al kiuj ambaŭ ligis lin dankema amikeco, inter Anglujo kaj Nederlando; la milito, por certa tempo forpelita antaŭ dek jaroj, eksplodis kun nova forto kaj kaŭzis al ambaŭ grandpotencaj landoj nemezureblajn damaĝojn. Tial, kiam la reprezentantoj de ambaŭ landoj kunvenis en Breda, por provi kontrakti la pacon, opiniis Komenio sia devo, ke li helpu sukceson de la paca traktado. Li rapide skribis specialan verkon, kiun li simbole titolis Angelus pacis (Anĝelo aŭ Sendito de la paco) kaj li mem veturis en Bredan, por transdoni ĝin al la delegitoj de ambaŭ landoj. Tiuj, kiuj en la tempo de grandaj enspezoj fare de hindaj korporacioj, jam kutimiĝis pensi en ekonomiaj nocioj kaj ciferoj, probable miris pro bibliaj alparoloj de la maljuna pastro. Sed kiu legis iliajn liniojn pli profunde, vidis, ke la verkisto bone analizis la veran bazon de la konfliktoj. Al Amsterdamo, same kiel al Londono, al Venecio kiel al Lisbono li rememorigis la pekojn kaj fortimigan punon de Tiro (Tyros), iam la plej fama havenurbo en la mondo, kaj li sentime predikis al ili: Venos tempo, kiam via spekulado kun ĉiuj reĝolandoj de la mondo estos trafita de la sorto... Ne estas eble amasigi trezorojn por privata prospero, sed estas necese pensi pri ĝoja vivo de ĉiuj. Benata epoko, se la sorto permesos vidi ĝin iam. Kaj en tiu ĉi spirito li kuraĝigis la delegitojn: Se vi defendos komune la komunan aferon de la libereco, kie estas dotaĵo de la homa naturo, kiu venkos vin?

En la sama tempo li zorgis ankaŭ pri la traduko de Biblio en la turkan lingvon kaj kun respektoplena delikateco li invitis en la enkonduko la reprezentantojn de la islamo al konatiĝo kun la kristanaj libroj. Interesis lin jam nur planoj pri principa solvado de la monda situacio kaj la etaj kvereloj de teologoj lin laciĝis. Li proksimiĝis al la opinioj, ke atingi kontentiĝon eblas nur per absoluta absorbiĝo en la kredo, kaj ke plej multe valoras la vereco de persona rilato al Dio. En Nederlando ĉi tiu konvinko, nomata pietatismo, trovis multajn adeptojn. Precipe grandan impreson je Johano Amoso havis francino Antoinette

Bourrignon, kiu deziris, ke anstataŭ ĉiuj eklezioj establiĝu komunumo de kredantoj sen pastroj. Ŝiajn leterojn tradukis al li Pierre Serrurier, valona protestanta predikisto, eksigita el la eklezio pro ĥiliasmo, al kies verko pri Descartes ligis Komenio sian anoniman kritikan mediton pri filozofiaj metodoj de Descartes.

La ideoj pri la religio, kondukanta en la profundon de la animo, rezultigis kortuŝan verkon *Unum necessarium* (Unu necesajo), enskribita en dediĉo al Ruprecht Palatinata, servanta ĉe la angla kortego. En la unuaj paĝoj Komenio konfesis sian laciĝon pro senĉesa serĉado kaj perdado de la esperoj. Tio ja ne povas esti la homa destino, li konjektis, kial alie Dio metus en nian internon tiom da neniigebla sopiro? Ni devas eliri el niaj labirintoj. La kaŭzoj de ĉiuj konfuzoj baziĝas en nia nesciado distingi en la vivo la necesan disde la nenecesa. Kaj tial li konsilis al la leganto: Trovu la feliĉon en si mem. Tenu vin nur ĉe plej bonaj libroj, por ke vi evitu la distritecon. El labirinto de leĝoj vin savos la simpla vorto de Kristo: Amu Dion kaj vian proksimulon. La militon, revenis li al la dolora temo de sia vivo, necesas rifuzadi kiel ion bestan, ĉar por la homoj konvenas la humanismo, kaj la kvereloj povas esti finitaj per juĝo ĝuste gvidata. Li akuzis la religion, ke ĝi ne disponigas la konsolon, ĉar ĝi mem jam fariĝis labirinto pli ol iu ajn alia en la mondo. La sektoj kulpigas sin reciproke pri la herezeco. Ĉe kiu flanko staras la vero? Reveni al Kristo – jen la ĝusta vojo el la angoroj.

Dum mia tuta vivo mi estis viro de sopiroj, konfesis Johano Amoso. Mi mem falis en multajn labirintojn. Mia tuta vivo, rememoris li, estis migrado, kaj mi ne havis patrujon ... neniam kaj nenie mi havis konstantan loĝejon. Kio restas post tiom da labirintoj antaŭ la forpaso el la vivo? La lasta okupo de mia vivo estos, ke mi lernos formorti de ĉi tiu vivo kaj naskiĝi por la venonta, tekstis lia decidiĝo.

Sed la kvieta rezignacio, per kiu spiras la paĝoj de ĉi tiu testamento de la koro, ne estis rezulta melodio de la lastaj jaroj de Komenio. Kiam aperis ŝanco, li eldonis ankoraŭ verkon skribitan antaŭ kvarono de jarcento en Anglujo, *Vojo de lumo*, kaj en la antaŭparolo li dediĉis ĝin al Reĝa dokta societo en Londono; li aŭdacis riproĉi al ĝi troan intereson pri la demandoj natursciencaj kaj instigis la societanojn al la zorgo pri la veroj, kiuj estas en ni kaj ekster ni, estras la mondon. La enhavo de *Vojo de lumo* estis posta klarigo de multaj liaj klopodoj. Mi devas rekte diri klare, legis oni tie, ke la ĉefaj politikaj teorioj, sur kiuj apogas sin la nuntempaj regantoj de la mondo, estas perfidaj marĉoj kaj la propra kaŭzo de ŝanceliĝanta kaj pereanta stato de la mondo. Sub la dediĉon li enskribis: Unu el la humilaj viroj de sopiroj, oldulo Komenio, kies vivo finiĝas en doloroj kaj jaroj en ĝemado.

Efektive li ofte estis malsana, eĉ plurajn monatojn, kaj tiam li ĝojis, se lin elserĉis iu el la disĉiploj aŭ iamaj kunlaborantoj, kia estis precipe Magnus Hesenthaler el Tubingo. Plezurigis lin, kiam li eksciis, ke lian Pordegon de lingvoj oni eldonis, kvankam sen nomo de la aŭtoro, eĉ jezuitoj en Prago. Kontraŭe lin kolerigis la polemiko kun profesoro Samuel Maresius de Gromingo. Ambaŭ viroj estis pasintecce amikoj, kaj kiam Komenio presigis la unuan parton de

Ĝenerala konsulto[^], li veturis kun ĝi al Maresius; tiam lin Maresius, laŭdevene franco, kuraĝigis, sed post certa tempo lin tre akre atakis pro "monstra revo pri religia akordiĝo" kaj eĉ pro lia Ĝenerala rebonigo, ĝis tiam ne eldonita. Komenio koleriĝis, ke Maresius ne diris al li la objetojn rekte, kaj li alvokis Maresiuson al repaciĝo. Sed la varmsanga Maresius superŝutis Komenion repage per kalumnio kaj moko; li asertis, ke lia pansofio estas trompo, kaj ke Komenio helpe de tiu ĉi trompo ĉantaĝas siajn protektantojn, liajn klopodojn li nomis "perversa fervoreco."

Komenio rapide ekprenis plumon, por defendi sin; sed la febro ĝin elŝiris el lia mano. Ree li estis adiaŭanta la vivon. Timante, ke li ne plu havos eblon fini la respondon, li lasis Maresiuson al la juĝo de konscienco kaj provis almenaŭ en konciza supervido amasigi siajn rememorojn pri sia vivo vojo, por ke montriĝu vereco kaj honesteco de liaj agoj; li priskribis precipe, kiel li estis kontraŭ sia volo elirigita de Hartlib el la ombro de privateco antaŭ la publikon kaj per kiuj taskoj li estis ŝarĝita pro petoj de aliuloj prospere al la tuta mondo.

Liaj detalaj taglibroj, bedaŭrinde, perdiĝis. Tamen, en Polujo, konserviĝis manuskripto kaj koncepto de la verko nomita Clamores Eliae (Vokado de Eliaso), kie Komenio dum la lastaj kvin jaroj de sia vivo enskribis la iniciatojn; li tien algluadis diversajn aldonojn kaj kun menso ofte jam erarvaganta, per mano malfortiĝanta de alta aĝo kaj de malsanoj, li notis ideojn pri granda reformo de la mondo. Ankaŭ en ĉi tiu verko li turnis sin al ĉiuj registaroj, nacioj kaj eklezioj, per afabla agado li volis por ili gajni eĉ la papon kaj la jezuitan ordenon, kvankam alie li restis fidela al la instruo de Hus. En rolo de nova profeto Eliaso li anoncis al la mondo, ke Vespero de la mondo venis, granda Sabato, horo de kunua kaj ke do estas necese forigi ĉiujn konfliktojn, atingi interkomprenon kaj por fina kaj konkorda unueco eduki la homon senigitan de ĉiuj katenoj. La korporacion de lumo li vidis en tiu ĉi verko sesii iam en Amsterdamo, alifoje en Prago. Liaj notoj havas iam trajton teologian, alifoje filozofian kaj poezian, kelkfoje ili falas en nekularan mistikon, sed alifoje denove tra ili ekbrilas bildoj de klare vidata estonta mondo, kies alvenon devas helpi ĉiu homo, kiu eksentas en si la Dian inspiron.

(En la dediĉo, hazarde ligita al tiu ĉi volumo, estas propramana enskribo de Komenio, rajtiganta difini lian precizan nomon. Li subskribis sin Johano

Amoso, komencis skribi Ko , trastrekis tion, kaj poste li alskribis Segeš Nivnický°, laŭ patro nomata Komenský.)

En la lastaj jaroj estis por Komenio senpeziĝo, ke Petro Figulus estis laŭ lia peto elektita senioro, kaj sekve ankaŭ la kapo de la ĉeĥa branĉo de la Unuiĝo. Sed ankaŭ tiu konsolo ne estis al li permesita, ĉar en januaro 1670 falis sur lian animon pezo de nova tomboŝtono: Figulus antaŭis lin en la morto. Komenio denove fariĝis episkopo kaj alvenis al li nova zorgo pri la Unuiĝo, kaj ankaŭ pri la vidviniĝinta filino kun kvin infanoj.

Sed lia menso ne estingiĝis. Li revis ankoraŭ pri novaj libroj, kiujn li volis dediĉi al sia patrujo. Kaj kvankam li jam atingis sian sepdek okan jaron, li igis serĉi novan materialon pri la historio de la Unuiĝo, li skribis en Slovakion petante pri ĝi, li deziris kolekti la verkojn de Milič de Kroměříž kaj sinodajn aktojn de la pasintaj tempoj.

Neeldonitaj verkoj rebonigaj restis lia granda doloro. Li vidis kun teruro, ke li apenaŭ finos ilin, kaj plenigis lin tragika sento, ke li ne realigis ilian eldonon kaj ke tiel li ne ekparolis al la mondo per tiom averta kaj stimula voĉo. Tial li foje venigis al sia lito la filon Danielon kaj devoligis lin per solena ĵuro, ke li kun sia helpanto Kristiano Nigrin prizorgu laŭ liaj manuskriptoj kaj malnetaĵoj prilaboradon kaj eldonon de ĉiuj partoj de la Ĝenerala konsulto.

En oktobro 1670 li estis trafita de nova atako de suferiga malsano. En longaj tagoj kaj noktoj li ofte vidis antaŭ si la pasintecon, en kiu li per kruda vivo kaj per senĉesaj turmentiĝoj elaĉetis la novajn ideojn, per kiuj li volis utili al la mondo. Ĉu lia tuta penado ne estis vana? La duboj estis malesperigaj.

La vivo jam ne povis respondi al li.

La 15 an de novembro (laŭ reformita kalendaro la 25 an de novembro) de la jaro 1670 Johano Amoso Komenio mortis en Amsterdamo.

Post unu semajno li estis entombigita sub la pavimŝtonoj de valona preĝejo en Naarden.

Kun lia vivo estingiĝis ankaŭ la restintaj esperoj de la ĉeĥaj ekzilitoj, kiuj estis enkorpigataj en li pli ol duonon de jarcento.

TRANSDONO DE LA TORÇO

La vivo de Johano Amoso Komenio estas per si mem granda homa verko; ĝi estas rava bildo de lia heroa volo, kiu venkis tiom da malfeliĉoj kaj malfacilaĵoj, ke tio estas preskaŭ nekredebla.

Li nomis sin viro de sopiro. Tio signifas, ke li estis homo de malkontenteco kaj de eterna serĉado, pasie sopiranta pli bonan vizaĝon de la homaro. Atestas tion ne nur lia verkaro, nombranta 250 laboraĵojn, sed ankaŭ la brava historio de lia vivo, kvankam ĝi en la batalo kontraŭ la egoisma kaj la perforta mondo devis finiĝi per tragika malsukceso.

Lia universala spirito, ampleksanta la homan klerecon ekde la medicino ĝis la astronomio, de la poezio kaj muzika edukado de infanoj ĝis la administrado de ŝtato, troviĝis multfoje sur la krucvojoj de la epoko, sur kiuj la scienco karambolis kun la religio. Kvankam per sia eduko kaj naturo li ankris en humileco de la kredo, per nelacigebla laboremo de la spirito kaj per fido je la homaj kapabloj li enkorpigis en si la mision de sciencisto; de tempo al tempo tiuj ĉi du pozicioj de lia animo koliziis, precipe tiam, kiam li kiel pastro devis obei konservativan koncepton kaj kiam la scienca pasio lin turnis kontraŭ li mem. Li tamen ne povis kaj ne kapablis apartigi la sciencon disde la teologio; sed li estis granda ankaŭ en siaj eraroj; kaj estas honorinde por li, ke li ne defendis sin kontraŭ la duboj pri leĝoj ŝajne nerefuteblaj, kaj kie ajn li vidis la falsecon, li rifuzis ĝin kaj fordonis sian tutan vivon al la laboro pri iniciatoj tiom grandegaj, ke li eĉ mem ektimis ilin. Ni precipe devas aprezi, ke li senĉese okupiĝis pri imagoj de kompletaj verkoj kaj sistemoj, kiajn ĝis tiam ne havis eĉ nacioj kun multe pli malnova kultura tradicio, kaj li ekde la komenco enspiris al la ĉeĥa scienca klopodo insistan tendencon al demokratieco kaj al konkretaj problemoj de la vivo. Kio do signifas esti kulturata ĉiuflanke? Tio signifas ne por ekstera ŝajno, sed por la vero, kun sekura utileco por si kaj por la venonta vivo. Li deziris, ke tiu, kiu estas klerigata kaj edukata, estu ne scivolemulo, sed doktulo, ne babilemulo, sed elokventulo, ne memlaŭda komencanto de laboro, sed kapabla plenumanto de laboroj, ne masko de honoro, sed la honoro mem. Lia devizo estis: Aktiva vivo estas vera vivo, pigreco estas tombo dumviva por la homo. Lia ĥiliasmo, t.e. kredo pri alveno de miljara regno de Kristo, ne signifis por li pasivan atendadon, sed viglan preparadon kaj insistan plibonigadon de ĉiuj homaj aferoj. Li vivis preskaŭ seninterrompe meze de humiligaj kaj malamikaj historiaj faktoj, sed li ne subordiĝis, ne cedis, li klopodis trovi kaŭzojn de la mankoj kaj eraroj kaj li ne ĉesis sopiri, ke li povu meritiĝi pri la unuecigo de la homaro.

Kiam li mortis, ŝajnis unue, ke per lia morto finiĝis ankaŭ ĉiu lia signifo. Danielo kun siaj helpantoj ne povis plenumi sian ĵuron, donitan al la patro, ĉar Komenio, kvankam li mem estis antaŭinto de la renesanco, estis forgesita de la

renesanca epoko, kaj pri liaj planoj kaj rebonigaj proponoj neniuj interesiĝis. La kontraŭreformacio klopodis mutigi lian voĉon, kaj parto de tiu klopodo estis ankaŭ ekzekuto de la viro, kiu fariĝis kelkfoje ombro de Komenio, de Nikolao Drabi°k. Al pli ol okdekjara maljunulo oni en Bratislava dehakis kun la kapo samtempe la dekstran manon kaj poste oni elŝiris lian langon, kaj kun la korpo estis bruligitaj la manuskriptoj kaj libroj, eldonitaj de Komenio, tio ĉio tial, ke voĉis la verdikto "li atakis majestularon, hontigis la regantan dinastion kaj la sanktan romanian imperion, la regnestron li nomis morta tombomonumento kaj lian familion generacio de vipuroj, per kio li provis ribeli kaj konspiri kun danĝero por la tuta kristanaro." Ĉi tiu kruela fino de Drabi°k justigas ne nur liajn profetaĵojn, sed ankaŭ la librojn pri revelacio de Komenio; ĝi montras, ke tio estis tre efika maniero de batalo, kaj tiuj, kontraŭ kiuj ĝi estis adresita, ĝin vere timis. Do tio devis esti ankaŭ finkalkulo kun Komenio. Sur lian verkaron faladis ofendoj, li estis nomata frenezulo kaj ĉarlatano. Sed al lia Labirinto kaj al aliaj konservitaj libroj restis la ĉeĥa kamparanaro fidela, kvankam oni povis legi ilin nur post ŝlositaj pordoj. Kaj juna germana filozofo G.W. Leibniz esprimis en poemo, per kiu li adiaŭis Komenion, respekton al lia verkaro kaj sian inĝenian klarvidecon: Venos tempo, kaj amasoj da nobluloj estimos vin, Komenio, kaj viajn agojn, kaj la revon de viaj esperoj.

La 19 a jarcento denove trovis Komenion. La ĉeĥa nacio denove naskiĝanta al la vivo revenis al la memoro de sia granda filo. La signifa ĉeĥa sciencisto J.E.Purkyně kaj historiisto Antonio Gindely trovis en arkivoj de Lešno ducent jarojn perditajn ĉeĥajn verkojn, precipe la Didaktikon. Nur poste resonis de ĝiaj paĝoj la angora voĉo de Komenio, ĝis tiam mutigita: Ni ne estu, mi petas, tiel maldiligentaj, ke ni nur post aliaj ĉiam rigardu kaj post aliaj de malproksime ni volu krabli! Almenaŭ en io la aliaj vidu nin antaŭ si! Liaj vortoj fariĝis kuraĝigo por la nacio, kiu nur post ducent jaroj pli poste povis ekmarŝi sur la vojo, al kiu ĝin invitis Komenio. La historiisto František Palacký°, kiu tiom signifis por la vera repurigo de nia pasinteco, skribis (1832) lian biografion kaj aljuĝis al li meritan signifon: "Al ĉiu amanto de nia literaturo estas konate, ke ĝis nun en lingvo nia pli ĝojigan kaj per pli kerna prozo skribitan verkon super tiun ĉi Labirinto n ni ne havas. Post tiu ĉi libro, kiu koneksis sciencan instruadon kun amuza formo, ekkonadis nia publiko dank° al oferemaj esploristoj pluajn verkojn, kaj lante aperadis nekredebla universaleco de Komenio; li enkreskadis en la konscion de la nacio kiel giganto, kvankam malmulte rekonita, kaj pro tio eble oni akcentis pli multe lian instruistan gravecon ol lian signifon por homa kunvivado entute. Pro tio ĝis hodiaŭ multaj lin rememoras el la bildo kun suprenstreĉita fingro, kvankam li devus esti bildigata pli multe kun malfermitaj brakoj.

La unuaj pilgrimantoj ekiris laŭ spuroj de lia vivo. Sed kiam ili volis kliniĝi antaŭ lia tombo, ili ne trovis ĝin. La preĝejo en Naarden estis ŝanĝita je kazino

kaj la tero super la tomboj trafalis. Nur per komuna laborado de nederlandaj kaj ĉeĥaj sciencistoj, el kiuj la plej grandan meriton gajnis dr. R.a.B. Oosterhuis, estis la tombo en la jaro 1929 trovita kaj digne aranĝita.

Fameco de la ideoj de Komenio ne restis limigita de la ŝtatlimoj. La germana filozofo J.G.Herder lin nomis "apostolo de la homaro" kaj pri liaj opinioj li diris: Piaj deziroj de ĉi tiu tipo ne flugas al la luno. Ili restas sur la tero kaj kiam venas ilia tempo, ili fariĝas videblaj agoj. En Germanujo estis fondita Societo de Komenio, kiu eldonadis pedagogian monatgazeton, en Ruslando estis Komenio multfoje proklamita la plej granda monda pedagogo. La franca historiisto Jules Michelet lin nomis "Galileo de edukado".

La intereso pri la verkaro de Komenio kreskis. Sed ĝi, disigita, persekutata kaj kaŝata, nur elmergiĝadis el la tenebroj. En Leningrado estis trovitaj (1931) kvar latinaj kaj du ĉeĥaj verkoj. En heredaĵo de S. Hartlib trovis nur antaŭ nelonge G.H. Turnbull leterojn kaj ĝis nun nekonatajn erojn de manuskriptoj kaj de preparaj laboraĵoj pansofiaj. Nur post 250 jaroj ekde ĝia estiĝo trovis prof. Dmytro Čyževskij en biblioteko de orfejo en Halle manuskripton (resp. kopion, verŝajne el la mano de Nigrin) de pluaj partoj de Ĝenerala rebonigo, krom tio pansofian vortaron kaj aliajn manuskriptojn. Nur ĉi tiuj trovaĵoj kompletigis la sciencon kaj homan profilon de J.A.Komenio kaj pruvis kaj larĝecon, kaj trapenetremon de liaj pensoj.

Nur post la lasta mondmilito oni eldonis en nia lando la Ĝeneralan edukadon, en kiu Komenio unuafoje en la historio de pedagogio postulas klerigadon dum la tuta vivo, kaj Ĝeneralan rebonigon (en traduko de prof. J.Hendrich), verkon de praktika politiko, mirinde progreseman je tempo, en kiu ĝi ekestis. Indas rigardi en la Ĝeneralan deklaron de homaj rajtoj (el la jaro 1948), por ke ni mirigitaj konvinkiĝu, ke ĝiajn plej elstarajn ideojn proponis Komenio jam antaŭ tricent jaroj. Ĝenerala rebonigo, tiu ĉi unika projekto de ŝanĝiĝo de la mondo diferencas de ĉiuj ĝisnunaj utopioj ĝuste per tio, ke ĝi kalkulas kun ĉi tiu konkreta mondo kaj ke ĝi supozas kaj ebligas la efektivigon; ĉiuj liaj proponoj estas partoj de la trapensita sistemo.

Nur al nia tempo estis donite, ke ĝi ekvidu Komenion en lia tuta grandeco, por ke ĝi konvinkiĝu, kiel inĝenieran armilon por plibonigo de la mondo li volis forĝi el la edukado, kaj ankaŭ kiel la harmonio, kian li imagis, estas proksima al niaj sopiroj. Plenrajte la monda pacmovado aliĝis en la jaro 1956 dum la kunsido de UNESCO en Dilli al Komenio. Unu jaron poste en Prago okazis memore al la unua eldono de la didaktika verko antaŭ tricent jaroj komeniologia konferenco, kiu pruvis altan aktualecon de Komenio kaj starigis antaŭ la esplorantojn novajn taskojn. La reeĥon de tio ĉi estas eble ankaŭ sekvi en la Arkivo por esploroj pri la vivo kaj verkoj de J.A.Komenio (mallonge: Acta Comeniana), en kiu publikigis siajn malkovrojn kaj studojn sciencistoj de diversaj nacioj. Iam

skribis Pierre Bayle, ke por la senmorteco sufiĉus al Komenio, se li estus eldoninta nur Pordegon de lingvoj. Ekde tiu tempo oni omaĝis al "pedagogia genio" kaj "heroa filozofo" pro multaj aliaj kaŭzoj. Sed nur kiam nia akademio komune kun UNESCO eldonis en la jaro 196 du foliantojn de Ĝenerala konsulto, eblis ekscii, ke kvankam la preso de ĉi tiu verko prokrastiĝis je tri jarcentoj ĝi ne prokrastiĝis post la nuna tempo kaj en multaj direktoj ĝi ĉiam ankoraŭ signifas por la homaro urĝan programon. Nek la pedagogia scienco, nek la praktiko scipovis ĝis nun plenumi lian postulon pri la libervoleco, ĝoja karaktero de instruado kaj de seriozeco de la instruistoj, la lerneja sistemo ĉie malantaŭis post liaj deziroj pri estetika edukado. Ankoraŭ pli malbona situacio regas koncerne la plenumiĝon de la Komenia sopiro pri saĝa kunvivado de la homaro kaj pri reciproka interkompreniĝo sen uzado de perforto flanke de la pli potencaj. Plenrajte eksonis la atributo, kiun eldiris itala esploristo: "Komenio nia samtempulo."

Tiun ĉi admiron meritis Komenio ne pro majesta kapjesado al la ĝenerale konataj scioj, sed male pro seninterrompa atakado kontraŭ la antaŭjuĝoj, duboj, serĉado de la lasta eksciebla vero. Li konsideris plezuro de la homa vivo esti preta je ĉio, kion predikas la justeco, kaj li kredis, ke venos la tempo, kiam la trezoroj de la mondo servos al prospero de ĉiuj. Nur el la estaĵoj tiom modestaj pro sia natura distriĝemo kaj tiom nemodestaj kaj pasiaj pro sia oferemo kreskas la homoj montoj. Pro tio ĝis nun la tuta mondo kliniĝas antaŭ la viro, kiu kvankam dum la tuta vivo persekutata neniam ĉesis demandi pri la feliĉo por ĉiuj kaj al ĝi li dediĉis ĉiun sian laboreman amon.

Komenio restas kun ni. Kaj ĉar li kun sento de la unuaj mondcivitanoj pensis pri la venontaj generacioj de ĉiuj nacioj de la mondo, sonas al ili ĉiuj ĝis nun lia plena voĉo:

Necesas, ke ĉiuj nacioj strebu pri la komuna bono, ke ili serĉu la pacon, la veron kaj dissemu amon al la proksimuloj.